

Lumo



Memoroj pri la Montreala UK en Almanako de *Lumo*!

De la redakcio

Karaj legantoj,

Tiu ĉi numero de *Lumo* estas, laŭ mia scio, la rekorda kaj por nia revuo, kaj por mi en mia tuta kariero kiel redaktoro. Mi komencos per pardonpeto, ke mi ne aperigis ĝin pli frue en la jaro. Mi tamen havas bonan senkulpigon — la laboro pri la UK prenis mian tutan eksterlaborejan tempon. Fakte, sentiĝis, ke mia tuta vivo estas centrata je la organizado de la UK, kaj tiel jam de pluraj jaroj ne nur por mi, sed por la tuta LKK... Nun ni rajtas ripozi kaj ĝui la vivon post la UK — kaj eĉ prepari la 92-paĝan numeron de *LumEGo!* :)

Gratulojn al ni ĉiuj — la LKK, la estraro de KEA, kiu senkondiĉe subtenis la kongreson, al ESF, kiu donis signifan donacon, al ĉiuj individuoj, kiuj donacis, kaj al ĉiuj volontuloj Kanade kaj eksterkanade, kiuj laboregis por sukcesigi la plej grandan eventon en Esperantujo! Kaj,

kompreneble, al ĉiuj vi, kiuj ĉeestis la kongreson. Sen homoj, oni ne havus la kongreson! Ĝi estis mirinda, memorinda, historia. Ĝi estis la unua dumpandemia UK, kaj la unua post la 3-jara kongresa vakuo. La laboro ne estis facila, pro la malfacilegaj cirkonstancoj, sed kune ni sukcesis! La tuta LKK portis plurajn ĉapelojn, ĉar ni ne nur organizis la UK-on, sed ankaŭ faris prelegojn,

gvidis ekskursojn, verkis kaj aktoris en teatraĵo, gvidis mil projektojn, kuris farante mil taskojn.

Post la fino de la UK, nia laboro tamen ne tute finiĝis. Mi persone dediĉis min al la verkado de kelkaj longaj artikoloj kaj intervjuoj — mi aperigas ĉi tie unu el ili — tiun al la revuo

Esperanto. Legu alian artikolon en la oktobra numero de *La Ondo de Esperanto*, kaj la 15-an de decembro aperos plia longa intervjuo en la revuo *Esperanto* pri mia unua teatraĵo “1910”, kiu premieris dum la UK. **La tuta teatraĵo estos spektebla en YouTube-kanalo “Exploring Esperanto”, same, la 15-an de decembro!** La raportoj de pluraj partoprenantoj pri la UK aperis



La unua ĉeesta renkontiĝo de KEA-estraro. Maldekstre: Garry Evans, Andrew Sly, Bob Williamson, Raymond Brisebois. Dekstre: Ĵenja Amis, Geoffrey Greatrex, Elizabeth Holden, Paul Hopkins

diversloke kaj en diversaj revuoj, retejoj, blogoj kutimaj kaj videaj. Estis plezuro legi kaj spekti ilin!

Sed restas ankoraŭ multe da laboro — la arkiviga laboro. Mi volas, ke niaj montrealaj memoroj ne perdiĝu, kaj mi volas, ke esploristoj povu trovi informojn pri la UK eĉ 100 jarojn poste — iom kiel ni povis trovi la memorojn pri la UK de 1910, kaj eĉ produkti teatraĵon surbaze de ili dum nia UK.

Parto de tiu arkiviga laboro estos trarigardo de

ĉiuj fotoj kaj videoj — oficialaj kaj neoficialaj — kaj la elektado de tiuj por arkivigo, aldono de metadatenoj (ekz., kiu estas sur la foto, kiu estas la fotisto, kie okazis la evento, ktp.). Mi volas arkivigi ilin ĉe kelkaj lokoj, por

maksimumigi la ŝancon, ke ili travivos: en Bitoteko, en la Viena Esperanto-Muzeo kaj Arkivoj, en la arkivoj de Kebekio kaj Kanado. Necesos ankaŭ arkivigi la gazetaran rikolton — ĉar kun la tempo, tiuj ĉi raportoj malaperas el la reto, kaj, eble, eĉ el la elektronikaj arkivoj, kiam mankas spaco. Se iu pretas helpi pri la arkiviga laboro, skribu al mi (yevgeniya.amis ĉe gmail.com). Unu el la kialoj por arkivigi estas, ke



en la cifereca epoko la arkivaj materialoj estas eĉ pli facile malapereblaj... Niaj fotoj estas en niaj durdiskoj aŭ sur la nubo, kaj ne estas eble serĉi aŭ trovi ilin, kaj tiaj portiloj certe ne longe daŭras, do, necesas arkivigi ĉion gravan, antaŭ ol ĝi malaperos...

Ni estis bonŝancaj havi ne nur profesion fotiston — John Huang, el Halifakso, kiu kreis tiom da belaj memoroj (cetere, tri el liaj fotoj aperis kiel

kovrilpaĝoj de la revuo *Esperanto* ĉi-jare, kaj ankaŭ sur tiu de *La Ondo de Esperanto*!). Mi dankas ankaŭ plurajn aliajn homojn, kiuj fotis profesie aŭ neprofesie. Vi vidos tiujn fotojn sur pluraj paĝoj de tiu ĉi

numero. Dankegon al vi, la fotistoj — John Huang, So Jinsu, Kang Hon-gu kaj ĉiuj, kiuj kontribuis al la komuna fotujo (mi aparte danku al Tamara Koziej, kiu kaptis la foton, kiun mi aperigas sur la kovrilo). Eble, el tiuj belaj fotoj ni eldonos fotolibron de la memoroj — eventuale, kiel aldonaĵo al la ESK-memorlibro por ĝia 40-jariĝo (kiu, cetere, okazas ĉi-jare!).

Plia — kaj, certe, la plej freneza ideo estas krei

veran tempokapsulon kaj sendi iom da memoraĵoj al estonteco — ekzemple, al 2122! Jes, mi celas ujon, kien oni metas aĵojn de nia tempo, por ke la homoj de la estontaj generacioj ricevu ilin. Estas jam provizora loko, kie la tempokapsulo povus resti dum jarcento, kaj estas intereso de montrealanoj fari tion. Laŭ mia scio, tio estus la unua tempokapsulo kun Esperanto-objektoj en la historio! Se tiu projekto interesas vin, skribu al mi!

Intertempe, vokas min ankaŭ aliaj kreaĵoj — nova teatraĵo (kiu eble ligiĝos al la projekto de tempokapsulo), esploraj laboroj pri montrealaj Zamenhofoj (legu pri ili ĉi-numere), publikigo de la teatraĵo en la libra formo (kun la DVD Blu-Ray). Eble, parto de tiu libro traktos la kanadajn Zamenhofojn. Estas alia historio pri mondfama montrealano, kuracisto, kiu, kiel lastatempe evidentiĝis, estis esperantisto. Fascina persono, kaj mi promesas rakonti al vi pri li plie poste. Do jen, projektoj abundas, kaj la tempo ne tiom, eĉ post la fino de la UK. Kaj tio estas eĉ sen mencii miajn ne-Esperantajn



Ĵenja Amis ricevis Honoran Membrecon en KEA

projektojn!

Kiam mi fariĝis redaktoro, mi prenis tiun taskon portempe — ĉar ne estis alia persono, kaj ni volis nepre daŭrigi ĝian eldonon, kaj kun la kompreno, ke mi eble ne povos aperigi ĝin akurate pro ĉiu alia laboro pri la UK. Mi dankas al vi pro via komprenemo! **Se iuj el vi, karaj legantoj, ŝatus**

transpreni la redaktadon, bv. skribi al KEA. Ĝis kiam troviĝos daŭre redaktoro, mi pretas servi kiel portempa redaktoro, kaj denove, kun kompreno, ke mi eble ne estos akurata pri la aperigo de *Lumo...*

Plej fine, mi volas danki al la tuta estraro de KEA pro la Honora

Membreco en KEA. Mi estis tiom kortuŝita, kiam Bob Williamson transdonis al mi la diplomon sur la scenejo, post la fino de la teatraĵo. Dankegon al vi! Estas vera honoro!

Mi deziras al vi bonan legadon, belan kunlaboron, kreemajn projektojn, bonan Zamenhof-Novjaron kaj feliĉan Novjaron!


Ĵenja Amis, la redaktoro

Miaj impresoj pri la 107a UK

Trefleo Mercier

La lasta Universala Kongreso de Esperanto estis malpli grandnombra ol anticipe. Ĝi ne ricevis tiom da partoprenantoj kiel anticipis la aliĝoj, kaj inter la kialoj estis la problemoj rilate la pandemion, la neemisiadon de vizoj de la kanada registraro kaj la milito de Putin en Ukrainio. Tamen la nova skipo de UEA pri UKoj – nome Peter Baláž, Dorota Rodzianko kaj Sonja Zaretskaia de E@I – kaj la Loka Kongresa Komitato (LKK) sub la lerta gvidado de Normando Fleury laboregis dum pli ol tri jaroj (**efektive, ekde 2014 – Red.*) por fari

sukceson de la evento. Kaj la celo estis plene trafita!



La tradukinto, Trefleo, de *Anna de Verdaj Gabloj*, ĵus publikigita de la eldonejo Mondial, ĉirkaŭita de tri koreaninoj kiuj konis kaj aprezis la originalan verkon de L. M. Montgomery

Ĉi tiu 107-a en Montrealo estis varia kaj riĉ-enhava je multaj aspektoj. La kongresejo mem – la universitato UQÀM – riveligis konvena kaj bone situata loko. Bedaŭrinde, kiel kutime, estis tro da aktivecoj por povi ĉion partopreni. Ofte ne estis facile elekti inter du allogaj samtempaj eroj. Kaj alia bedaŭrinda afero, mi ne sukcesis renkonti kelkajn homojn, kiujn mi konas kaj ŝatintus

revidi.

Estis bonvena ŝanĝo ĉi-jare ne plu havi senfinajn kaj tedajn landajn salutojn ĉe la malfermo kaj limigi sin al kontinentaj salutoj.

Danke al la sindediĉo kaj kompetenteco de Sylvain Auclair, la Kongresa Kuriero, nomata ĉi-foje *Kongresa Sciulo*, aperis regule kun multaj utilaj informoj. Ni nun eĉ povas legi ĝin ĉe la [retejo de UEA](#). Alia aspekto de la kapablo de tiu landa skipo.

Bela kaj utila iniciativo estis la KEA/LKK-budo sub la respondeco de Andy Blair, kie oni vendis multajn interesajn varojn, interalie librojn verkitajn aŭ tradukitajn de kanadanoj.

Pluraj el tiuj titoloj estis vendataj en tiu butikoj, krom tiuj vendataj de la Kongresa Libroservo sur la dua etaĝo. La internaciaj vizitantoj povis konstati, ke en Kanado estas multaj literaturaj talentoj, kiuj meritas esti malkovritaj.

Estas ĝuste tio, kio ankaŭ okazis dum la Aŭtoraj Duonhoroj kun kanadaj aŭtoroj aŭ tradukintoj kiuj

konatigis siajn verkojn. Mi persone faris prezentaĵon en tri tiaj intimaj renkontiĝoj, sola aŭ kune kun aliaj tradukintoj, nome pri *Maria Chapdelaine*, *Anna de Verdaj Gabloj* kaj *La Kanada Verkaro*, kompilita de la neĉeestinta Wally du Temple pro sanproblemo. Ne estis multaj aŭskultantoj dum tiuj duonhoroj, sed homoj kiuj

vere interesiĝis pri specifaj titoloj. La plej sukcesa prezentaĵo miaopinie estis tiu de François Lorrain pri *La Eta Princo* kun aŭdvidaj helpiloj kaj plej riĉa informaro.

Alia varia aspekto estis la ekskursoj, tuttagaj kiel duontagaj. Mi elektis tiun pri *Ameriko en plena naturo*, lerte

ĉiĉeronita de Jean Alain, ĉar mi volis vidi de proksime bizonojn. Nia grupo povis ankaŭ vidi kanadajn cervojn (*wapiti*) en la sama loko. La posedantoj de tiu farmbieno estis tre afablaj kaj detale klarigis ĉion pri tiuj bestoj. Vizito al cisterciana monaĥejo en Saint-Jean-de-Matha apud Joliette estis inkluzivita en tiu tuttaga ekskurso. La plej moderna monaĥejo, kiun mi



Kongreseja enira halo

Kongresa butiko kun ĝia estro: Andy Blair



Dumekskursa vizito al monaĥejo




vidis ĝis nun, lokita en plena naturo; oni vidas naturan pejzaĝon tra ĉiu fenestro.

Tiu 107-a ankaŭ proponis multajn prelegojn kaj spektaklojn, inter kiuj en la kinejo/teatrejo *Imperial* je piedira distanco de la kongresejo. Estis multaj ravaj momentoj dum tiuj spektakloj. Mi aparte ŝatis la kantistinon Joëlle Rabu akompanatan de sia filo Nico Rhodes, la kebekian folkloran grupon, *La R'voyure*, kiu lerte dancas

per ŝu-klakiloj, kaj la teatraĵon verkitan de Ĵenja Amis, *1910*, kun Garry Evans en la rolo de S-ro Mann, kiu akompanis Zamenhof post la vaŝingtona kongreso al Montrealo por viziti parencojn. Garry rivelis alian sensacian talenton en tiu rolo kaj estis inde varme aplaŭdita. Post tiu prezentaĵo estis la taŭga momento prezenti al la aŭtorino specialan honoran atestilon pro ŝia nelacigebla sindediĉo prepare al la kongreso kaj dum ĝi.

Jes, memorinda Universala Kongreso, la dua en Kanado, realigita en la plej malfacilaj kondiĉoj pro la KOVIM-pandemio kaj ties multaj rilataj defioj. Ĝi montris, ke Kanado scias kiel akcepti vizitantojn, kaj ke Montrealo estas la ideala urbo por kongresi en samideana etoso.



Prezento de "La Ora Ŝipo" (poemo: É. Nelligan; trad. T. Mercier; muziko: D. Gaines, komponita speciale por la UK en Montrealo)



Partoprenantoj de la Infana Kongreseto salutis



Dum la fermo de la kongreso



Normando Fleury kaj Hans Becklin gvidis la aŭkcion



Bonan Martenon! Tri Martenoj el Montrealo en la Informejo



Sylvain Lelarge instruis kreeme!



La Kongresa Fako povis ĝui provekskurson kun Garry Evans




Zamenhof-taga donaco al la mondo: la teatraĵo “1910” spekteblas senpage rete!

Dank’ al sindediĉa laboro de Alex Miller (Usono), la teatraĵo “1910” estos spektebla en la YouTube-kanalo “Exploring Esperanto” ekde la 15-a de decembro, 2022. Se vi ŝatus subteni lian laboron, vi povas fariĝi patrono kaj eĉ havi vian nomon en la film-kreditoj kiel subtenanto de la filma projekto! Lernu pli pri tiu bela iniciato en la filmeto (anglalingva): youtu.be/hG28N0zUwkc. Vizitu lian kanalon: www.youtube.com/@ExploringEsperanto



Alex Miller



La teatra skipo reunuigita en legosalono!

Kadre de la Zamenhof-taga legosalono de Bobelarto, la partoprenantoj legis la tutan teatraĵon “1910”. Ĉeestis la verkinto: Ĵenja Amis kaj la aktoroj: Garry Evans (“S-ro Mann”) kaj Alena Adler (“Mary”). Garry diris, ke estas tre interese aŭdi aliajn homojn legi la teatraĵon, ĉar ĉiu havas sian manieron interpreti la tekston. La legado mem daŭris nur iom pli ol duonhoron (ĉar ne estis muziko, projekciado, ktp.), sed la tuta renkontiĝo daŭris horon kaj duono, ĉar estis tiom da demandoj al la tuta skipo. La teatra teamo ankaŭ dividis ideojn de la venontaj projektoj kaj eventualaj estontaj teatraĵoj.

Ĉeestantoj antaŭĝojis povi baldaŭ vidi la tutan teatraĵon en la reto: spektebla ekde la 15-a de decembro, 2022!

Kongreso en la tempo de KOVIM: la raporto pri Mirinda Montrealo!



Oficiala foto de la kongreso: John Huang

Ĵenja Amis

Jes ja, la unua postpandemia – aŭ, fakte, dumpandemia — UK, unu fojon prokrastita, venis al la fino! La plej longdaŭra LKK estas feliĉa, dankema, fiera... kaj... lacega! Ĵenja Amis respondas la demandojn de Revuo Esperanto pri la ĵus okazinta Kongreso, la unua en orienta Nord-Ameriko ekde 1910, kiam Zamenhof mem ĉeestis, kaj 38 jarojn ekde la lasta UK en Kanado: la Vankuvera UK de 1984, kiam ankoraŭ ne naskiĝis multegaj el la partoprenantoj de tiu ĉi UK montreala!

Kiel tiu ĉi kongreso estis malsama de aliaj UK-oj?

Por multegaj kongresanoj ĝi estis ilia unua UK iam ajn – kaj la unua Esperanto-evento. Estis do bela okazo “integri” en la Movadon tiujn esperantistojn,

kiuj “naskiĝis” dumpandemie, lerninte la lingvon per Duolingo kaj aliaj retaj rimedoj. La granda plejparto de ili estas el Usono kaj Kanado. Mi memoras kelkajn homojn miri, kiom da homoj venis al la programero por novaj kongresanoj en la unua sabato de la kongreso – la salono estis plene!

Estis ankaŭ simbole, ke la du kontinentaj salutantoj amerikaj (jen plia malsamo ĉi-kongresa: kontinentaj salutoj anstataŭ landaj salutoj) estis ekzakte de tiu ĉi generacio de novaj esperantistoj: Jaboti’ Potiguar, reprezentanto de du indiĝenaj nacioj de Brazilo (li portis belegan kap-ornamaĵon el plumoj) kaj Chelsea Rae Moses – nova esperantistino kaj jutubistino el Usono. Min multege feliĉigis vidi tiom da junaj, kapablaj,



talentegaj esperantistoj el Usono kaj Kanado – ĉirkaŭ duono de ili ja estis el Usono kaj Kanado! Multaj nord-amerikanoj estis niaj kernaj helpantoj, volontuloj kaj kontribuantoj al la arta programo. Do, vidinte tiom da energio, entuziasmo, kapablo kaj talento Nord-Amerika, mi absolute certas, ke la Esperanto-Movado estas en bonaj manoj! Mi ankaŭ esperas, ke ni inspiris esperantistojn en nia suda najbaro – Usono – esti aŭdacaj, kaj mi ne surpriziĝus se ni denove kongresos Nord-Amerike en la venontaj 5-10 jaroj!

La montreala UK estis ankaŭ la unua, en kiu la programo estis afiŝita per la reto / apo, kun ĉiuj priskriboj, la eblo serĉi, ktp. Estas grave kompreni, ke pli-malpli tuj post la presado, la programo en la



Kamila Koziej (maldekstre) elstare gvidis junularan programon

Kongresa Libro ne plu estas aktuala, pro la ŝanĝiĝoj, la konfliktoj, pri kiuj oni antaŭe ne konsciis. Tiaj ŝanĝiĝoj ĉe ni estis eĉ pli oftaj, ĉar ni estas dum la pandemio, kaj la apo multege faciligis la programajn ĝisdatigojn.

Dank' al helpego de Andy Blair, el Halifaxo, nia kongreso havis ne nur bonegajn panelojn por bonvenigi kongresanojn – perfektajn por fotiĝo kaj intervjuoj kun ĵurnalistoj – sed ankaŭ sukcesegan butikon kun dekoj da diversaj kongresaj varoj: (t-ĉemizoj, poŝtkartoj, poŝtmarkoj kun simboloj de Montrealo kaj la Montreala UK, ĉielarkoj, flagoj, surkudraĵoj por dorsosakoj, insignoj, ktp., plus pli ol deko da kanadaj libroj, pluraj, freŝe eldonitaj por la UK – legu pri ili aliloke ĉi-numere). En la kongresa butiko ni povis

ankaŭ pagi ne nur per kontanta mono, sed per ĉiuj kreditkartoj (la libroservo de UEA ankoraŭ ne akceptis kreditkartojn ĉi-kongrese).

Do kiuj estis la influoj de la pandemio al la UK?

Estas grave konscii, ke la Montreala UK ne estis postpandemia UK. Ĝi estis la unua UK en la nova realo de la vivo kun la pandemio – kiu verŝajne restos kun ni por ankoraŭ iom da tempo. Do, iusence, ĝi malfermis la novan ĉapitron de Universalaj Kongresoj, dum KOVIM estas simple parto de nia realo... La plej videbla sekvo de tio estas ke nia kongreso estis malpli granda ol kutime – efektive, ni havis malpli ol duono de la kongresanoj, kiujn ni atendis por 2020, kiam la kongreso estis nuligita pro la pandemio. Fine de decembro 2019 jam estis pli ol 500 aliĝintoj (kutime, ĉ. triono de kongresanoj aliĝas en la unua aliĝperiodo). Kaj eĉ

plurajn semajnojn antaŭ la fino de la dua aliĝperiodo (marto 2020) ni jam atingis ĉirkaŭ 800

registriĝoj – t.e., eĉ antaŭ la fino de la unua registriĝperiodo ni jam proksimiĝis al la kvanto de ĉiuj ĉeestantoj en la antaŭa eŭropa kongreso en Lahtio. Do, se ne okazus pandemio, la Montreala Kongreso estus sufiĉe pli granda kongreso, kun ĉ. 1500+ partoprenantoj. Sed ĉi-jare, eĉ semajnojn antaŭ la UK, ni ja ne povis ekzakte scii, kiom da homoj finfine alvenos – ja la kvanto de registriĝoj ne plu estis bona indikilo pri kiom da homoj alvenos... ĉar ni ne plu vivas en la komforta mondo de antaŭvideblo...

Finfine, ĉ. 850 homoj registriĝis (sufiĉe multaj registriĝis en la semajnoj tuj antaŭ la UK) kaj iom malpli ol 500 sukcesis veni – t.e., ĉirkaŭ triono de tio, kion ni

atendus antaŭ la pandemio. Multegaj ne povis



La kongresaj afiŝoj estis popularegaj por fotado



Resto Vego fariĝis unu el neoficialaj kunvenejoj



akcepti la riskon vojaĝi; en kelkaj landoj estas tre striktaj kvarantenaj reguloj rilate la revenon, sed por pluraj la decido partopreni aŭ ne estis pure ekonomia – ja multaj homoj perdis laborojn, kaj la kosto de ĉio – aparte de la aviadilbiletoj – kreskegis ekde la pandemio. Ekzemple, neniu personoj venis el Ĉinio kaj nur kelkaj personoj venis el Japanio (dum pluraj aliĝis por la UK 2020). Kaj jen aliaj homoj simple transiris al aliaj aferoj – ja teni

entuziasmon de homoj por la kongreso dum 8 jaroj estas ege malfacile...

Due, diri ke la pandemio malfaciligis la planadon estas diri nenion... Ni ne sciis ne nur kiom da homoj atendi (kaj tio estas la bazo de la kongresa planado), sed ni ankaŭ havis, esence, nur kelkajn monatojn por ĉion prepari ekde la decido, ke la UK okazu (aprilo 2022). Tio okazis post kiam la registaro konfirmis ke la eventoj povas okazi, kaj kiam UEA decidis definitive pluri kun la kongreso. Ni ne vere povis reuzi ĉiujn laborojn, kiujn ni faris por 2020, ĉar ŝanĝiĝis pli-malpli ĉio, inkluzive de la kongresejo kaj la teatrejo, kaj ni devis komenci de preskaŭ nulo rilate la ekskursojn, plus, necesis havigi ĉiujn informojn rilate la pandemion kaj ankaŭ havi la planon pri kiel zorgi pri eventualaj malsaniĝoj, ktp. Por doni nur unu ekzemplon: ĝis nur kelkajn monatojn antaŭ la UK oni ne povis scii, kiom da homoj povos eniri en la teatrejon (ekz., ĉu daŭre estos limigoj pri la kvanto de personoj en la publikaj ejoj): ĉu ni bezonas teatrejon por 800 personoj aŭ por 1600, se estas spacaj limigoj? Kaj kiun ejon elekti, se ni povas nur havi svagan ideon, pri kiom da homoj venos?..

La sama demando pri la busoj kaj la ekskursoj kaj eĉ la kongresejo: oni ne povis kalkuli la prezojn de aŭtobusoj sen scii, ĉu la distanciĝo inter la homoj estos daŭre deviga? Do, ni havis, esence, nur



La ero por la unuafojaj kongresanoj (en Efemera Artgalerio) estis popularega

tagojn por finaligi la prezojn por ekskursoj por la ĝustatempa apero de la Dua Bulteno, post kiam oni anoncis la finon de la postulata interhoma distanciĝo. Estis ege malfacile labori kun hoteloj kaj ekskursaj agentejoj, pluraj el kiuj perdis laborantojn kaj ofte ne respondis al informpetoj. Pri multaj aferoj, pri kiuj normale devus zorgi agentejoj, devis okupiĝi la lokanoj (ekzemple, postkongreso kaj aliaj ekskursoj), kaj ni ne havis lukson de plurmonata preparado... La Kongresa Fako devis fari multe pli ol oni faris antaŭe, laŭ mia kompreno – ekzemple, tenante mendilon malfermitan esence ĝis la komenco de la kongreso (kutime ĝi fermiĝas jam fine de majo).

Trie, la LKK devis sekvi kaj informi pri la konstante ŝanĝiĝantaj reguloj de la registaroj (la federacia kaj la provinca) pri la vojaĝoj al Kanado, la reguloj ene de la provinco rilate la portadon de maskoj,



distanciĝon, vakciniĝojn, ktp., kaj ankaŭ informi pri tio la kongresanojn kaj havi ĝisdatajn informojn en la retejo. Krome, en pluraj landoj la tempoj por ricevi pasportojn longiĝis – ni preskaŭ perdis unu el ĉefaj kontribuantoj al la arta programo pro tio, ke la longigo de pasporto daŭris duoblon de tio, kion oni normale atendus. Kaj same pri la vizoj al Kanado – pluraj homoj ne ricevis ilin ĉar la kanada registaro longigis la vizo-atendadon... La LKK kaj la Kongresa Fako laboregis por helpi pri la vizoj (sendante aldonajn leterojn, ktp.), sed bedaŭrinde, pluraj personoj ne sukcesis akiri vizojn ĝustatempe. Bedaŭrinde, nia kongreso ne estis la sola tuŝita de la “vizoŝtopiĝo”: oni raportis eĉ en la novaĵoj pri pluraj personoj kiuj ne povis ricevi vizojn por aliaj konferencoj (ekz., la konferenco pri aids, kiu okazis samtempe kun la UK). Eĉ teamo de ĵurnalistoj de Al Ĝazira, kiuj planis fari filmon pri nia UK, por aldoni al sia konata serio pri lingvoj, ne

ricevis la vizon. Kia domaĝo...

Kvare, okazis ne nur altiĝo de prezoj por la biletoj – sed pluraj personoj devis remendi siajn biletojn ĉar iliaj aviadilaj vojaĝoj estis nuligitaj...

Kaj tio estas nur kelkaj eroj de la longa listo de pandemiaj malfacilaĵoj kaj taskoj, kiuj aldoniĝis al la jam tro longa listo de la LKK-farendaĵoj... Duncan Charters bone resumis tion: “La LKK devis preskaŭ ĉion replani, en epoko kiam ne respondemis turismaj agentejoj, potencialaj loĝejoj, teatrejoj pro pandemia necerteco kaj antaŭa forlaso aŭ maldungo de laborantoj. La defioj estis neimageblaj, aparte kun nova sed feliĉe jam aliokaze sperta, lernema kaj klare direktita Kongresa Fako. Nenio estis facila, eĉ ne la liverado de la senditaj libroj por la Libroservo, ankaŭ sukcesa malgraŭ la pli malgranda kongresanaro.”

Ĉu okazis infektiĝoj dumkongrese?

Bedaŭrinde, jes. Kelkaj kongresanoj ŝercis, ke la kongresa kuracisto, D-ro Bolduc, eble estis same populara kiel D-ro Zamenhof. Sed pli serioze, la laboro de la kongresa kuracisto dum la montreala UK estis unu el la plej gravaj taskoj dumkongrese: li laboregis ĉiun sekundon de la evento. La portado de maskoj, cetere, estis ne deviga (ĉar oni ne plu devigas maskojn en Kebekio), sed forte rekomendita de UEA kaj de la LKK. Ni havigis al ni pli ol 400 rapidtestojn kaj disdonis skatolojn senpage al ĉiuj kiuj bezonis testiĝi (ekz., se iu havis kontakton kun iu, kiu fariĝis infektita). La sekvo de kontaktoj ne plu estas postulo de la kebekia registaro, sed la homoj faris tion volonte, por protekti la aliajn. “Mem-testiĝo por KOVIM estis unu el la plej popularaj programeroj de la



La Movada Foiro okazis en publika spaco de UQAM





Ne mankis ludoj kaj amuziĝoj!



kongreso”, diris Aleks Kadar dum la fermo. Ĝenerale, la homoj kiuj testiĝis pozitive agis tre mature: ili deklaris tion en Telegram-grupo de la UK por inviti aliajn homojn testiĝi, petis telefon-konsultiĝon kun la kuracisto, ktp. Kelkaj partoprenantoj, bedaŭrinde, devis izoliĝi por la tuta kongresa semajno (eĉ la sensimptomaj homoj kiuj testiĝis pozitive ne povis partopreni). Ni havis specialan telefonon por faciligi la kontakton kun la kongresa kuracisto kaj retpoŝton por atingi lin. Laŭ la nunaj reguloj, Kanado rajtas postuli PCR-teston je la alveno por hazarde elektitaj homoj, kaj ni ankaŭ laboris por faciligi tiun ĉi taskon. Vere, pensante pri ĉiuj malfacilaĵoj, kiujn homoj devis fronti venante al nia kongreso, mi estas des pli dankema al ĉiu persono, kiu venis!

Ĉu la ŝanĝiĝo de la Kongresa Fako ankaŭ influis la UK-on?

Jes, efektive. Ni havis honoron labori dum jaroj kun

Clay Magalhães (antaŭa Kongresa Sekretario) por la preparoj por la invito de la UK en Montrealo en 2017 kaj 2020. Li estas ankaŭ tiu, kiu elektis la kongresejon de la universitato UQAM – estis tre bona elekto: perfektaj, plene ekipitaj ĉambroj por prelegoj kaj kunvenoj; vasta halo por registriĝoj, butikoj, ktp.; pluraj lokoj interne kaj ekstere por neformala babilado / tabulludoj; bonega subteno de la laborantoj – vere, malfacilas imagi lokon pli bonan! Pri la ceteraj preparoj de la UK 2022 zorgis jam la nova fako. La transiro al la nova teamo okazis, bedaŭrinde, multege pli malfrue ol ĝi devintus okazi (nur fine de 2021 – komence de 2022), sed ni havis bonegan sperton labori kun E@I, eĉ se la tempo tute mankis, kaj la komplikaĵoj de la internaj datum-sistemoj de UEA kaj sufiĉe malnovaj iloj, bedaŭrinde, deprenis multe da tempo kaj atento de la Kongresa Fako kaj, certe, ne faciligis la laboron ĝenerale... Ankaŭ ne faciligis la fakto, ke E@I ne povis viziti la kongresejon (la vizito



Dum la Solena Fermo: danko al volontuloj

estis farita de la antaŭa KKS). Ni certas, ke la venonta UK en Torino kaj poste povos plene profiti de la teknika kaj organizada sperto de Dorota kaj Petro kaj ilia tuta teamo, kaj eble de restrukturigo de la datum-sistemoj / forigo de kelkaj, eble, ne plu necesaj manaj taskoj kaj eventuale forigo de kelkaj eble ne necesaj laboroj ĝenerale.

Kia estis la kultura programo?

Ĉiuvespere ni havis du kulturajn programerojn – io kion la kongresanoj aparte rimarkis, plus kelkaj tagaj koncertoj. La kultura programo okazis en la belega historia teatrejo Cinéma Impérial, 12 minutojn piede de la ĉefa kongresejo. Kaj same kiel ĉefa kongresejo, estas malfacile imagi pli bonan lokon por koncertoj kaj teatro! (Notu ke tiu ĉi ne estis la teatrejo, kiun ni originale planis uzi – la teatrejo de UQAM, bedaŭrinde, anoncis nur kelkajn monatojn antaŭ nia kongreso ke ili ne



povas akcepti nin... do, imagu kiom da streĉo kaj kromlaboro kaŭzis la serĉo de alia teatrejo, nur monatojn antaŭ la evento...). Sed la tuta teamo konsentis, ke la teatrejo Impérial estas eĉ pli bona loko. La teatrejo datiĝas de 1913 kaj elvokas la teatrejojn de la frua tempo de Esperanto, sed en plene komforta loko, renovigita, plene ekipita per son- kaj lumsistemoj. Plus, nin akompanis elstara teknika direktoro kaj teknika teamo, kiu faris absolute ĉion, por ke prezentoj en la teatrejo iru plej brile.

La koncertan programon inaŭguris la (ĉu, la unua?) Multnacia Nacia Vespero. Kial multnacia? Ĉar Montrealo estas multnacia urbo, kaj Kebekio estas multnacia provinco, en multnacia lando, Kanado. Do kiam ni planis la Nacian Vesperon, ni staris antaŭ dilemo: kiel prezenti multnaciecon de nia amata urbo? Tiel ni decidis inviti diversajn artistojn, kiuj montrus al vi diversecon etnan,

lingvan kaj kulturan.

La vesperon gvidis la prezidanto de la LKK, Normando Fleury kaj lia edzino Zdravka Metz, interalie, respondeculino pri volontuloj kaj ekskursoj). Ili komencis per la indiĝena legendo pri la kreo de la mondo. La unua grupo prezentita estis indiĝenaj tamburistoj kaj dancisto, bele vestitaj per tradiciaj vestaĵoj, kaj kunigitaj de la spirito de kanto kaj la Potenco de la tamburo, por paco, amikeco kaj frateco.

La dua prezento montris la tradician inuitan gorgo-kantadon. Ili klarigis, ke temas pri kvazaŭ konkurso inter la du virinoj kiuj kantas (kaj sciu ke ĉiam temas pri du virinoj) – tiu, kiu ridos unue, perdas la konkurson. Mi estis tre profunde impresita de tiu kantado, kiu sonas kvazaŭ kiel sonoj de alia mondo. Sekvis franckanada folkloro grupo kiu prezentis tradiciajn dancojn el Kebekio, kaj poste estis tradicia irlanda



**Normando Fleury kaj Zdravka Metz
brile gvidis la Multnacionan Vesperon**



**Maurice de Kinder (nask. 1926)
estas filo de la fondinto de
Montreala E-klubo**

kaj skota muziko – inkluzive de sakfluto. La vesperon finis 40-minuta prezento de la grupo Oktoecho [oktoeko], kiu miksas muzikon de Okcidenta Azio kun indiĝenaj muzikoj el Ameriko kaj tiel ĝi kreas originalajn kebekiajn verkojn, unuigante kaj kunfandiĝante malsamajn tradiciojn, kiuj trapasas ĉiujn limojn. Imagu miksaĵon de inuita gorgo-kantado kun la danco de turn-derviŝo, indiĝenaj drumoj, klavaro kaj mandolino. Malfacilas, ĉu ne? Sed tia ĝi estas, same kiel Montrealo, ĝi estas kunfandiĝo de diversaj etnoj, kulturoj kaj tradicioj, kiuj miksiĝas, kunfandiĝas kaj kreas ion mirindan.

En lundo okazis tradicia Kongresa Bankedo kaj Balo – tiuj okazis en la kongresa hotelo, Hyatt, nur kelkajn

minutojn piede de la kongresejo. La triteto de la organizo KlezKanada, kun violonoj kaj zimbalo, regaligis nin per gaja danciga juda muziko, por



Jones the Pipes:
James Alan kaj
Patrice Boucher



Montreala Multnacia Nacia Vespero estis neforgesebla!





Dum la ĉefa provludo en la teatrejo



Dum la spektaklo

omaĝi, interalie, la judan kulturon de Montrealo. Ni dancis kaj eĉ (pluraj, surhavante maskojn – eble strange, sed konsilinde en la cirkonstancoj!) labambumis ja ĝis la nokto-nokto-fin’! (Bonŝance, ni trafis la lastan metroon!)

En ĉiuj postaj vesperoj okazis po du koncertoj: en mardo kantis konata kanada kontralta kantistino kaj esperantistino Joëlle Rabu kun sia filo Nico Rhodes – mirinda pianisto! Ilia koncerto estis intima kaj kortuŝa. Sekvis folk-ĵazeca plurpersona ensemblo de Yves Desrosiers – konata kebekia artisto, granda simpatianto de Esperanto kaj nova esperantisto. La partoprenantoj de la VK eble spektis lian koncerton “Nokta Ŝoforo” – temis pri la sama bonega koncerto, kun kelkaj bonusaj aferoj fine (ekz., li kantis kanton de fama rusa bardo, Vysockij, en Esperanto!).

Ĵaŭdon vespere estis inaŭgurita la teatraĵo “1910”, ĵus verkita de mi mem. La stelulo de la spektaklo estis Garry Evans (LKK-ano, kasisto kaj gvidanto de unu el la ekskursoj), kiu rolis kiel S-ro Mann. Temis pri la rakonto pri la vizito de Zamenhof al Ameriko, per la vortoj de la brita esperantisto William Mann, tre aktiva en la fruaj jaroj de Esperanto. S-ro Mann akompanis lin la tutan vojon kaj verkis brilan rakonton pri la vojaĝo, kiu inspiris min verki la teatraĵon. Ni lernas pri la longa ŝipa vojaĝo, la vizito al Novjorko kaj Vaŝingtono, pri la kongreso, kaj fine,

pri la vizito al Montrealo, kie loĝis dekduo da Zamenhofaj parencoj. La rakonto okazas en du paralelaj tempolinioj: la nia – 2022 (kie s-ro Mann rakontas pri la vojaĝo de 1910) kaj la jaro 1919, dum li estas infektita de la hispana gripo kaj troviĝas en la hospitalo en Londono. La vojaĝo al 2022 okazas kaj fizike kaj spirite, dum li deliras en febro, dum la pandemio de la antaŭa jarcento... Alena Adler (“Helena” de Pasporto al la Tuta Mondo) estis reĝisoro kaj ludis subtenan rolon en la teatraĵo. La spektaklo estas multimedia (kun projekciaĵoj) kaj interaga, kaj ankaŭ enhavis “vivan” muzikon, kiu estis esenca parto de la rakonto (piano: Étienne [Stefano] Laflamme; kantistino: Kristina Miroŝkina – novaj esperantistoj talentegaj muzikistoj el Kebekio). La kongresanoj aŭdis du pecojn de muziko, kiun oni ankaŭ aŭdis en 1910: la himno “Patro Nia, Ni



“S-ro Mann” (Garry Evans) kaj “Mary” (Alena Adler) en la lasta sceno



Ĵenja Amis, la aŭtorino, instrukcias la krom-aktorojn: demandantojn

Alvenis” de Clarence Bicknell (kiun oni kantis dum la ekumena diservo, kiam ĉeestis Zamenhof mem)

kaj “Mi aŭdas vin” – perdita kaj retrovita komponaĵo de usona komponisto kaj orgenisto Herbert Harris, laŭ la vortoj de D-ro Leon Zamenhof. Ĝi estas la unua eldono de muziko en Esperanto en Ameriko. Tiu peco perdiĝis por pli ol jarcento... sed estis retrovita kaj repremieris en Montrealo, pli ol jarcenton post ĝia unua eldono. Mi promesas al la redakcio verki pri tiu mirinda eltrovaĵo apartan artikolon poste!

La vesperon daŭrigis prezentaĵo de pluraj kantoj el la muzikalo “Stelmanio” (Starmania) – ikona kebekia rok-opero. La prezentaĵon akompanis belegaj originalaj desegnaĵoj. Guillaume Armide (Gijom’)

estis la motoro malantaŭ tiu ĉi Esperanta premiero de la muzikalo. Li faris ĉiujn tradukojn

de la kantoj, ludis la pianon kaj brile kantis. Alena Adler bonege kaj kortuŝe prezentis plurajn aliajn kanzonojn, kun Guillaume. Bonŝance por ni, ili loĝis en loĝejo de montreala esperantisto kaj muzikisto (Jean-Claude Bélanger), kiu disponigis al ili la pianon kaj eĉ helpis fari projekciadon dum la spektaklo. Joëlle Rabu kaj Nico Rhodes ankaŭ partoprenis: per kantado (Joëlle) kaj absolute majstra ludado de saksofono (Nico). Ambaŭ vesperaj programeroj ricevis starantajn aplaŭdojn!

En vendredo ankaŭ okazis du prezentaĵoj: de la brazil-kebekia ensemblo Bia kaj Maracujá – alia simpatianto de Esperanto, kiun sekvis la tradicia Internacia Arta Vespero – kun dancoj, ludado piana, banĝa, kantado kaj la tradicia prezento de la Internacia Esperanto-Ĥoro. Ĝi omaĝis ne nur la kanadan kaj



Muziko dum la teatraĵo: Kristina Miroŝkina + Étienne Laflamme



Armel Amiot: Banĝo Esperanto ludis dum la ferma ceremonio

indiĝenajn kulturojn, sed ankaŭ dediĉis unu kanton al Ukrainio (laŭ la vortoj de famega ukraina poeto, Ŝevĉenko) – la homoj estis invititaj stari dum la prezento.

Estis du aparte elstaraj prezentoj de la ĥoro: la novaj komponaĵoj de David Gaines (usona klasika komponisto, aŭtoro de simfonio “Esperanto”). Temas pri la unua ĉeesta prezento de la komponaĵo “Ho, mia kor’”) fare de Stefano Laflamme kaj Kristina Miroŝkina. Plus, la lanĉo de tutnova kanto-komponaĵo “La Ora Ŝipo”, ankaŭ komponita de David Gaines. La formo de tiu ĉi komponaĵo estas sufiĉe nekutima: ĝi uzas plen-tonan gamon kaj trafegite transdonas la sentojn de la poemo de Émile Nelligan (unu el la plej famaj kebekiaj poetoj de frua 20-a j.c.), tradukita en Esperanton de Trefleo

Mercier. La kanton prezentis kelkaj membroj de la Internacia Esperanto-Koruso, kaj la komponisto mem ĉeestis kaj ekzercojn, kaj la prezenton. La aŭskultantoj denove feliĉe kunkantis “Haleluja” de fama montreala poeto, Leonard Cohen, en la traduko de Ĵomart: ĝi estis la lasta kanto de la Internacia Arta Vespero, invitanta al Montrealo 2020... (alia tempo... alia mondo – profunda suspiro...)

Alia bela debuto de tiu ĉi kongreso estis Banĝo Esperanto – Armel Amiot, el Francio. Li majstre ludis banĝon kaj kantis kaj prezentis unu tagan koncerton, kaj ankaŭ unu eron dum la Solena Fermo. Alia bela tuŝo de la Montreala Kongreso estis la viva ludado de La Espero komence kaj fine – komence kun unu gvidkantisto (Zdravka Bojĉeva) kaj fine kun la tuta Esperanto-Ĥoro. Laŭ mi, viva muziko estas multe pli kortuŝa ol simple uzo de registraĵo (eĉ se la plej bona registraĵo).



Margaret Zaleski-Zamenhof kaj Katalin Kováts

Kio pri la programo ĝenerale?

Ni havis ĉ. dekon da prelegoj pri Kanado, Kebekio, Montrealo: historio, kulturo, muziko, lingvoj, ktp. (notu ke la plejparton de tiuj prelegoj faris la LKK-anoj!). Mi mem prezentis, interalie, miajn malkovrojn pri la montreala parto de la Zamenhof-familio. Ni trovis la tombojn de ĉiuj Zamenhofoj kaj bo-Zamenhofoj, menciitaj en la artikolo de s-ro Mann (jes-jes, la sama kiu donis inspiron ankaŭ al la teatraĵo!). Fakte, la malkovro de montrealaj Zamenhofoj estis surprizo ne nur por Esperanto-historiistoj kaj la Viena muzeo, sed eĉ por Margaret Zaleski-Zamenhof (unu el la rektaj posteuloj de la linio) kaj aliaj anoj de pli larĝa Zamenhof-familio (de aliaj linioj). La homoj vere scivolis pri ĉiuj ĉi malkovroj kaj kelkaj eĉ iris al la tombejo por omaĝi – ni

plue laboros pri la esploro kaj publikigos la rezultojn!

Ankaŭ la Kongresa Kinejo estis populara – temis pri du filmoj pri Kanada kulturo, kun subtitoloj en Esperanto. Unu pri Leonard Cohen kaj alia pri la nuntempaj enmigrantaj lignohakistoj de Kebekio (ambaŭ de Nacia Film-Oficejo de Kanado – NFO). Estis ankaŭ du programoj kun filmoj faritaj de indiĝenaj artistoj – tri ankaŭ de NFO kaj alia de Wapikoni Mobile, kiu donas voĉon al junaj indiĝenaj artistoj, kiuj ofte iras al foraj vilaĝoj por filmi, kaj kiu provizas al ili kameraojn kaj ĉiun teknikan helpon por realigi ilian arton (ambaŭ indiĝenaj programoj estis montritaj la 9-an de aŭgusto, dum la Internacia Tago de Indiĝenaj Lingvoj). Aldone, estis montritaj kelkaj filmoj de Mateo Rankin – konata kanada kaj kebekia filmisto kaj plurfoja ricevinto de diversaj artaj premioj, kaj Honora Komitatano de la UK. Li mem enkondukis siajn filmojn (ankaŭ subtitolitajn en

Esperanto). Mateo kaj lia teamo, cetere, ankaŭ multe filmis dum kongrese (atendu filmon en Torino!) kaj eĉ prezentis novan artaĵon: brilantan buston de Zamenhof, dum la Internacia Arta Vespero!

Nia kongreso estis la unua, kiu havis Efemeran Artgalerion, kie okazis diversaj programoj de INK (Interkultura Novelo-Konkurso) kaj Bobelarto: ekz., legosalonoj, atelieroj, premi-donado al la gajnintoj de INK. Ties libron kun premiitaj / elektitaj nekonkursantaj noveloj, cetere, ĉiuj kongresanoj ricevis donace, kun bela metala akvobotelo portanta la logotipon de la montreala UK. Iu kongresano diris: “Estas interese, kial neniu



ĝis nun pensis fari legosalonojn, por kune legi literaturon?” Espereble, similaj aktivaĵoj kaj “Efemeraj Artgalerioj” kaj legosalonoj revenos ankaŭ dum la sekvaj UK-oj!

Kiaj aliaj apartaĵoj? La unua ero de la kongresa malfermo estis la tradicia teragnosko: agnosko de

la indiĝena aparteno de la tero – la tero, sur kiu situas Montrealo (legu ĝin plene ĉi tie: <https://mallonge.net/teragnosko2022>): ĝi venis eĉ antaŭ la malfermaj vortoj de la Prezidanto de UEA, Duncan Charters. Aldone al la montreala ĉefa lingvo – la franca, ni ankaŭ donis lecionojn pri unu el la kanadaj indiĝenaj lingvoj – la aniŝinabeka. La instruisto (Daniel Stoltzfus), fakte, pasigis plurajn monatojn en komunumoj, kie la ĉefa lingvo estas la aniŝinabeka). Por la fermo de la kongreso, Duncan Charters faris baton sur la tradicia indiĝena tamburo (aldone al la kutima kongresa marteletto). Ĉiuj aliaj programeroj pli-malpli sekvis la tradiciojn de la antaŭaj UK-oj: la antaŭkongresa kurseto kun Katalin Kováts, aŭtoraj horoj kaj duonhoroj, la KER-



Dum la prezentado de Stelmanio



Koncerto de Bía & Maracujá



Koncerto de Joëlle Rabu & Nico Rhodes

ekzamenoj (fakte, estis lanĉo de la plej supera ekzamen-nivelo: C2!), scienca programo kaj, kompreneble, Internacia Infana Kongreseto, plej diversaj programeroj ligitaj al la Kongresa Temo: la Jardeko de la Indiĝenaj Lingvoj, elstare reĝisorita de Mark Fettes. Estis kelkaj rezolucioj – inkluzive la nova kongresa deklaro, kiu mencias ankaŭ la novan tradukon en Esperanton de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (uea.org/gk/1057a1). Estis kantado organizita kaj spontana: en la kongresejo kaj la parkoj, kunmanĝoj, multe da ridado, amikiĝoj, kaj elstara kongresa etoso. Estis ricega junulara programo – majstre gvidata de Camille Koziej Lévesque. Okaze de la Solena Inaŭguro, estis ankaŭ akcepto de honoraj gastoj (inkluzive de reprezentantoj de Italio, Svislando kaj



Garry Evans (maldekstre) kaj Joel Amis (dekstre), ambaŭ LKK-anoj, gvidis ekskursojn



Andrew Sly (KEA-estrarano) orgenludis

Ukrainio, kaj ankaŭ reprezentanto de loka asocio por la UN). La konsulino de Italio eĉ jam komencis lerni Esperanton kaj mem verkis bonvenigan leteron por Torino, kiu impresis ĉiujn ĉeestantojn!

Pli ol sesdeko da esperantistoj ĉeestis la ekumenan diservon en la anglikana katedralo, bele ornamita per ĉielarkaj flagoj por la fiereca semajno. Du estraranoj de Kanada Esperanto-Asocio zorgis pri muziko (Andrew Sly ludis orgenon kaj pianon kaj mi mem kantis). La Pastro kaj LKK-ano Joel Amis prezidis, kaj Hans Becklin (akademiano kaj estrarano de ESF kaj de TEJO) predikis. Ni ricevis multajn bonajn komentojn pri la diservo.

Alia bela apartaĵo estis la Movada Foiro: ĝi okazis en la publika spaco: la transirejo inter la metroo kaj la konstruaĵo, kie okazis la kongresejo. Multaj personoj admiris la estetikon de tiu loko, kun roza fenestro kaj la fasado de malnova preĝejo, kiu

fariĝis parto de la konstruaĵo de la universitato, kie ni kongresis (UQAM). Estis bela okazo ne nur esperantumi en plej bona etoso, sed ankaŭ iom varbi por Esperanto preterpasantojn.

Kia estis la ekskursiva programo?

La antaŭkongreso ekis en Toronto kaj la Niagaraj Akvofaloj, kun multaj aliaj vidindaj urboj survoje al Montrealo. La postkongreso iris al alia direkto – ĝis la urbo Kebeko kaj la spektado de balenoj en la urbeto Tadasako – jen du neforgeseblaj kanadaj spertoj: la Akvofalegoj kaj la balenoj! La tuttagaj ekskursoj inkluzivis viziton al la tria plej malnova urbo de Kanado, nome Tririvero; vizito al Otavo, la ĉefurbo de Kanado; estis ankaŭ bela vizito "Ameriko en plena naturo", kun la ekskurso al bizona bieno kaj moderna monaĥejo. Krome, estis bicikla ekskurso (40 km!) kaj eĉ manĝado en tradicia kebekia acer-kabano, kun gustumado de



La gazetara rikolto dumkongrese estis elstara!



tipaj pladoj (ĉio kun acersiropo).

La duontagaj ekskursoj vendiĝis ege rapide – eĉ kelkaj aldonitaj lokoj tuj pleniĝis. Gvidate de lokanoj, la esperantistoj vizitis la montrealan metroon (sub lerta gvidado de specialisto pri montreala metroo kaj esperantisto, Mateo McLauchlin); vizitis plurajn belegajn preĝejojn urbocentre kaj (dum aparta vizito) la faman bazilikon Oratorio Sankta-Jozefo (ambaŭ sub la gvido de Pastro Joel Amis), vidis ĉiujn vidindaĵojn de la urbocentro de Montrealo (kun Silvano Auclair, la redaktoro de la Kongresa Kuriero: “Kongresa Sciulo”) kaj vizitis montrealajn insulojn kun Garry Evans (LKK-kasisto kaj la fama “s-ro Mann”). Mi mem kreis kaj gvidis la ekskurson Montrealo Juda – mi ligis ĝin ankaŭ kun la historio de Zamenhof-familio (mia edzo devis anstataŭi min por unu el la ekskursoj, ĉar mi mem devis ekzerciĝi pri la teatraĵo en tiu tempo).

Ĉar la ekskursoj elĉerpiĝis tiom rapide, ni kreis plurajn memgvidajn ekskursojn por Montrealo, por tiuj, kiuj ne povis jam aĉeti la duontagajn ekskursojn. Tiuj estis disponeblaj en la informejo en la papera formo kaj ankaŭ per poŝtelefonoj elektronike. Krome, estis detala Esperantlingva elektronika mapo de Montrealo (kiun mi kreis per Google Maps), plus, kompreneble, la kutimaj dulingvaj mapoj / gvidiloj por Montrealo.

Ĉu aperis multaj artikoloj / intervjuoj?

Multegaj! Estis almenaŭ dudeko da artikoloj, pluregaj radiaj kaj televidaj intervjuoj. La respondeculoj pri ekstera komunikado (Nicolas Viau: france kaj Joel Amis: angle), certe, ne enuis! Aperis eĉ raportoj en kelkaj indiĝenaj eldonoj – inkluzive de intervjuo kun Mark Fettes kun indiĝena radio en Montrealo. Aperigis informon pri nia kongreso ankaŭ unu el la ĉefaj distribuejoj de novaĵoj (La Presse canadienne / Canadian

Press), de kiu republikigis la artikolojn pluraj aliaj komunikiloj. Amuze, telefonis al ni patrino de 16-jarulo, kiu volis nepre ĉeesti la kongreson, eĉ se li ankoraŭ ne lernis la lingvon. Estis kortuŝe. Kelkaj programeroj estis malfermitaj al la ĝenerala publiko (ekz., unu taga koncerto).

Kiel kongresanoj perceptis Montrealon?

La homoj fotis multajn sciurojn kaj kunhavigis fotojn en la Telegram-grupo kaj en la komuna fotoalbumo! Unu fojon mi eĉ devis iom atendi la sciuran ekscitiĝon antaŭ ol komenci la ekskurson, kiu ekis en la parko. Sed serioze, mi aŭdis multegajn bonajn vortojn pri la urbo. Oni trovis la urbanojn ĝentilaj, afablaj kaj helpemaj, kaj la urbon



Ĉe placo Saint-Louis post la ekskurso Montrealo Juda (gvidis Ĵenja Amis)



Improviĝoj ĉe la publika piano estis aparte popularaj (ludas: R. Pavinsky)



Dum la Kongresa Balo

agraba. Bonŝance por ni, dum la pandemio oni multe bonigis la urbocentron – pluraj stratoj, inkluzive de tiu tuj apud la kongresejo, fariĝis piediraj en somero kaj havis plurajn belegajn publikajn terasojn, kun floroj, plantoj, ktp. Ankaŭ bonŝance, samtempe kun la UK okazis pluraj aliaj eventoj muzikaj kaj kulturaj, do, la partoprenantoj povis ĝui la kulturan programon de multaj aliaj eventoj ĉiun tagon kaj nokton de la kongreso – kaj multegaj tion plezure faris! Oni regule sendis la fotojn de diversaj aliaj kulturaj aferoj en la urbo por inviti la aliajn aliĝi. Plej grave, samtempe kun la UK okazis Internacia Indiĝena Festivalo. La ĉefa koncerto (malferma al la publiko), tute konvene, okazis merkredon vespere – do, kaj la homoj, kiuj ekskursis, kaj tiuj, kiuj restis



La Montreala LKK ricevis diplomojn de UEA por Elstara Agado

en la urbo, povis kune ĝui la prezentojn de kanadaj indiĝenaj artistoj.

Ĉu finaj vortoj?

Dankegon al ĉiuj vi, karaj, kiuj venis al nia kongreso! Mi esperas, ke ĝi estas same neforgesebla por vi, kiel ĝi estas por ni! Dankegon al ĉiuj kunlaborantoj (kelkaj el kiuj laboris de ekster Montrealo), al la brilaj artistoj, al la Kongresa Fakto de UEA, al Duncan Charters kaj al Fernando Maia, kiuj subtenis nin de jaroj, kaj al la volontuloj – ĉirkaŭ sesdeko entute – kiuj laboregis por realigi tiun ĉi kongreson (kaj ankaŭ dankegon al la volontuloj, kiuj helpis de distance!). Nia LKK ne estis granda, kaj ĉiuj el ni portis “plurajn ĉapelojn”. Dum ni gvidis ekskursojn, preparis teatraĵojn kaj

kantajn ekzercojn, donis intervjuojn, ktp., estis ofte aliaj montrealanoj – kaj ne nur montrealanoj – kiuj helpis funkciigi la informojn, helpis pri la akceptejo, libroservo, tekniko kaj mil aliaj taskoj. Sen via helpo, karaj, la kongreso ne eblus! Mi kuraĝigas ĉiujn esperantistojn volontuli en la venontaj UK-oj. Mi aparte dankas al la kongresaj fotistoj – aparte la ĉefa fotisto, John Huang, kaj la filmistoj. Ili kaptis tiom da bonaj memoroj. Ĉiuj ĉefaj programeroj estis filmitaj, kaj ni dividos kun la legantoj de Revuo Esperanto ĉiujn filmojn, tuj kiam ili estos haveblaj! Kaj ni, la LKK, post la 8 jaroj da laboro, estas vere pli ol amikoj – ni estas unu familio por ĉiam!

Aperis unue en Revuo Esperanto (kun modifoj)





La Solena Malfermo de la Usona Landa Kongreso
Lundon la 8-an de Aŭgusto 2022



El la gastlibro de la kongreso



Duncan Charters, Prezidanto de UEA, Usono, KN47

Ĉi tiu Kongreso estis unuavice en miaj planoj kiel nova prezidanto de UEA, ĉar mi aranĝis viziti Montrealon dum semajno en oktobro de 2019 okaze de la preparvizito de KKS Clay Magalhães, por kunsidi kun la LKK cele al detala konsidero de ĉiuj aspektoj de la atendata venontjara UK. Mia rolo estis konatiĝi kun la organizaj detaloj de la Kongresoj de UEA. Ni interparolis interalie kun reprezentantino de Tourisme Montréal,

deĵorantoj en la hotelo-konferenĉejo kie ni planis okazigi la UK-on, kaj vizitis hotelojn kaj loĝejojn por taksu ilian kvaliton kaj taŭgecon por niaj Kongresanoj. Ni dediĉis longan kunsidon kaj konversaciojn al ekskursoj, antaŭ, dum kaj post la UK. Mi ekkonsciis kiom da laboro atendas LKK-anojn por Universala Kongreso, kompare kun la epoko kiam la KKS loĝis en la Kongresa urbo preskaŭ tutan jaron antaŭe kaj povis konstante prizorgi la ĉiutagajn detalojn.

De 2020 ĝis 2022 multo ŝanĝiĝis. Ni konstatis pro la aliĝritmo al la UK antaŭ la pandemio ke la kostoj de la hotelo-konferenĉejo ne estis elteneblaj por la Kongresa buĝeto. La LKK devis preskaŭ ĉion replani, en epoko kiam ne respondemis turismaj agentejoj, potencialaj loĝejoj, teatroj pro pandemia necerteco kaj antaŭa forlaso aŭ maldungo de laborantoj. La defioj estis neimageblaj, aparte kun nova sed feliĉe jam aliokaze sperta, lernema kaj klare direktita Kongresa Fako. Nenio estis facila, eĉ ne la liberigo de la senditaj libroj por la Libroservo, ankaŭ sukcesa malgraŭ la pli malgranda Kongresanaro.

Tamen daŭre laboregis la relative malgranda sed

escepte laborema LKK, kun la kuraĝigo kaj la fido de Estraro kiu povis konstati de tre frue ilian kompetenton kaj sindediĉon, jes, dum ok jaroj post la unua ideo inviti Kongreson denove al Nordameriko. Persisto venkis, ofte lastmomente. Tute taŭga kaj akceptema universitata Kongresejo UQAM en la koro de vivplena Montrealo, kun ĵus renovigita kaj malfermita apuda hotelo Hyatt Place, perfekta por bankedo kaj akceptoj, kinejo-teatro de perfekta grandeco por la Kongresanoj, akustike kaj sidkomforte elstara. Kaj tiom da intervjuoj kun vaste spektataj kaj aŭskultataj amasmedioj (mi persone spertis du), precize kion devas ekspluati niaj Kongresoj. Kaj filmado de la Kongreso estis ankaŭ lastmomente ebla pro alveno de vizo tuj antaŭ la UK. Jes, ni povis konstati ke bone motivitaj intencoj povis produkti brilajn rezultojn!

Por mi kaj multaj aliaj ĉio grava sukcesis. La formalaj Malfermo kaj Fermo kun ĉeesto de gravuloj, la entuziasmo de ĉiu el ili kaj aparte la itala konsulino kiu lernis legi Esperanton sufiĉe por reveni al la Fermo por inviti nin al Torino venontjare, pli ol kutime profesiaj koncertoj, bone organizitaj ekskursoj, kompreneblo de la inspire Esperanto-rilata teatraĵo "1910" pro la klareco de la elparolo kaj enhavo, ofta uzado de subtekstoj por komprenigi la kantojn; bonega manĝaĵo, servado, muziko en la hotelo. La lastmomenta

decido hibridigi la Komitatajn kunsidojn, kaj la necesa rapida laboro kun teknikistoj por instali teknologion kiu ebligus ilin, tute sukcese. Kio memorigas danki la volontulojn pro la sindediĉo helpi ĉion glatigi anstataŭ elekti mem sian preferatan agadon. Jes, ili necesis por sukcesigi la laboron. Strategia Planado atingis multe pli ol mi atendis kaj esperis pro surloka partopreno de volontulaj gvidantoj kaj hibridigo de la forumoj. Tiom da helpemo!

Malsukcesoj? Plendoj? Por mi, kolizoj de ĝis 3-4 samtempaj prezentaĵoj pri temoj por mi gravegaj (mi ekzemple ne povis helpi pri la KER-ekzamenoj, nur deziri sukceson al la ekzamenotoj), aparte pro la ĝenerale alta kvalito de la prezentaĵoj, kaj la elstara organizado de la fakaj programoj, ekzemple la Kongresa Temo, la IKU/SK, Esperantologia konferenco, Tago de lernado. Tro varia kaj bunta programo por malgranda Kongreso? Iusence jes, sed LKK neniel volis cedi al malpli valora kaj diverstema UK ol kutime. Kaj la rezulto? Mi ne memoras pli ĝuindan Kongreson (pentu, neĉeestintoj!), ankaŭ pro kunlaboro de la klimato (jes, kaj vetero kaj etoso!). Kaj pri miaj plendoj? Kompreneble ne estas veraj plendoj pri la Kongreso, sed efektive laŭdoj pro la malfacila tasko elekti programojn. Certe la estontaj UK-oj estos pli hibridaj, kun pli da poste spekteblaj filmoj de

prezentaĵoj aŭ rektaj elsendoj. Kaj ni havos virtualajn Kongresojn por kiuj ne povas ĉeesti. Ni lernis kion ni bezonis de tiu UK. Tamen pluraj sukcesoj estos malfacile ripeteblaj, do restos kiel modelo por kreema pensado de estontaj LKK-oj. Neeviteble, pro ĝia unikeco, Montrealo nepre restos gravurita en nia memoro. Dankegon kaj gratulegon al ĉiuj kontribuintoj, kaj tute speciale al LKK kaj la Kongresa Fakoj, kiuj montris kion signifas kunlaboro en la aŭtenta spirito de Esperanto en pli ol normale streĉaj cirkonstancoj. Jes, ni ĉiuj venkis!

Normando Fleury, prezidanto de la LKK

UK ne povas okazi...

UK ne povas okazi en Montrealo ! Nu, ni aŭdis tion 2-foje dum la pasintaj 8 jaroj. Jes ja, la montreala LKK dediĉis sin al la organizado de UK en Montrealo, ekde 2014. Unue, UEA elektis Seulon, kaj due, la pandemio trafis la mondon. Sed nia LKK estis nekredible persistema, energia, mult-talenta, entuziasma kaj ĉefe kunlaborema. Ni volis oferti belegan UK-sperton al la kongresontoj kaj ni fieras ke ni sukcesis organizi bonegan, buntan, profesinivelan UK-on al la kongresintoj.

SED, UK ne povas okazi ... sen volontuloj. Pli ol 60 volontuloj aktivis dum la UK (kaj longe antaŭ ĝi) ĉe



bonvenigo, kongresejo, akceptejo, informejo, libro-servo, kongresa butikoj, teknikoj, artoj, prelegoj, instruado, ekskursoj, varbado, tradukado, verkado, infana kaj junulara programoj, informado kaj post kongresa ordigado. (Pardonu min se mi forgesis ion). Sen tiu volontularo, la UK ne povus glate kaj brile okazi.

DANKEGON al vi, plej estimataj volontuloj.

La montreala UK estas nun parto de la Esperantomovada historio kaj bona ekzemplo ke sindediĉo al kunagado alportas esperon al pli bona mondo.

Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA, Brazilo, KN 42

Kiam la UK finiĝis kaj mi alvenis hejmen, mi ne sukcesis vere kredi, ke ĝi okazis – kaj ne nur: ĝi kun granda sukceso okazis! Mi devas vere danki al tiom



da homoj, kiuj per internacia kunlaboro sukcesis fari el la 107-a Universala Kongreso realon.

Plej unue la lokan teamon, due la novan Kongresan Fakon de UEA, trie ĉiujn, kiuj kun fido malavare volontulis por la UK. La defioj estis enormaj, sed nia kredo kaj fido pri ni mem estis pli grandaj! La okazigo de tiu UK reprezentas la valoron kaj idealojn de Esperanto kaj tio estas granda kuraĝigo daŭrigi por nia afero. Belaj memoroj restas – la UK envere ne finiĝis, ĝi restas en ni: ĝiaj muzikoj, kantoj, teatro, la sonoj de tiom da amikaj voĉoj kaj konversacioj. Antaŭen, karaj! Antaŭen!

Imre Keményfi, Hungario, KN 89

Estis bone vidi, ke ankaŭ en Kanado kaj Usono estas tiom multe da Esperantistoj, kaj tiom multe da junaj Esperantistoj. La kongresa balo estis mojosa, kaj estis bonega junulara programo kun vizito de amuzparko. Mi ne kredis, ke eĉ en Nord-Ameriko estas konata la kanto "10 bovinoj".

Rafaelo Daŝgupto, Svisujo, KN 777



Mi ege ŝatis la Kongreson en Montrealo. Mi spektis malpli da prelegojn ol mi antaŭvidis,

anstataŭe ofte partoprenis la mojosan junularan programon kaj iomete helpis prelegantojn kiel voluntulo pri komputiloj kaj projektiloj. Interese estis lerni pri Tokipono de ĝia kreinto Sonja Lang kaj ŝia kunprelegintino, kiu lernis pri Esperanto per Tokipono, aŭ aŭdi pri la komuna historio de Esperanto kaj anarĥismo en Hispanujo.

Mi tre ĝuis la belegajn kulturajn programerojn: La plurajn koncertojn, la balon, la multnacion nacian vesperon, la internacian artan vesperon kaj la teatraĵon "1910". (Kaj mi plurfoje dum pli serena muziko en la koncertoj ekdormetis ne pro manko de intereso, sed ĉar mi tro malmulte dormis dum antaŭaj noktoj.) Sed dum ni estis en Montrealo, ne nur la kongresa programo ofertis

spektindegajn kulturaĵojn: Hazarde, mi vidis buntegan defilon de dancistaroj el la tuta mondo ĉe placo Dorchester kaj plie estis spektakloj ankaŭ en la parko Émilie-Gamelin (antaŭ hotelo Hilton Place; konata ankaŭ kiel “Square Berri”) kaj sur la placo de festivaloj (Place des Festivals), unu el ili belega koncerto de inuit-mohoka rok-kantistino Beatrice Deer.

Sed (kiel en ĉiu kongreso, kiun mi partoprenis ĝis nun) pli grava ol la programo estis kaj estas la komunumo de partoprenantoj kaj la ebloj kune babili, ekskursi, manĝi, trinki, diskuti kaj kelkfoje kvereli, kaj ĉies emo helpi unu la alian.

Viktoro Pajuk, KN 520



Fulmrapide forflugis kongresa semajno en Montrealo, kiun LKK preparis dum longaj 8 jaroj. Esperantistoj soifis je UK-E-komunikado, kiun gesamideanaro atendis dum 3 (ne du) “dezertaj” jaroj.

Sukcesa kongreso, mirakla intima etoso (nur 800 kongresanoj)! LKK funkciis precize, kiel svisa horloĝo. Dankon pro konstanta subteno de kaj


solidareco kun mia amata gepatra lando Ukrainio en tiu malfacila milita tempo!

Finiĝis 107-a Kongreso, vivu 108-a en Torino!

Ĵenja Amis, LKK (sekretario)

Ĉio bona venas al la fino... Venis al la fino ankaŭ nia unua postpandemia – aŭ fakte dumpandemia – kongreso, longe preparata, unu fojon prokrastita, Montreala UK. Kaj kio restas?

Restas dankemo... Mi vere emociiĝas pensante pri ĉiuj vi, kiuj diris “jes” al tiom da (frenezaj) aferoj... parkerigi liniojn por la teatraĵo, prepari kaj gvidi ekskursojn, muziki kaj teatraĵi, okupiĝi pri teknikaĵoj, filmi, foti, zorgi pri libroj, arto kaj artistoj, administrado kaj helpi pri mil kaj unu aferoj kongresaj... kaj – eĉ pli grave – zorgi pri unu la alia, aparte pri tiuj, kiuj malsaniĝis dumkongrese... Niaj bonkoraj helpantoj estis ĉiam en bona tempo en bonaj lokoj, kaj kune ni faris ion mirindan kaj neforgeseblan. Ni ne sciis ĝis nur kelkajn monatojn antaŭ la evento, ĉu la kongreso, fakte, okazos... ni ne sciis, ĉu programeroj devos nuliĝi... Ni prenis riskon – vi prenis riskon vojaĝi al alia lando – kaj alia urbo – kiam vojaĝi ne estis facile. Mi esperas ke ĉio indis la penon! Kaj mi estas dankema al ĉiuj el vi, kiuj venis kaj kiuj helpis fari montrealan kongreson reala! Dankon, dankon, dankegon, karaj!



Ĵenja Amis: maldekstre, kun la teatra skipo

Restas amikecoj. Amikecoj preter ĉio. Preter landoj, preter aĝoj, preter ĉio. Tiuj amikecoj restos. Ni helpis unu al la alia, ni zorgis unu pri la alia, ni kuraĝigis unu la alian. El tiuj amikecoj formiĝas vera komunumo. Komunumo diverseca, forta kaj kreema. Ni ĉerpu el tiu komunumo fortojn kaj ni plie subtenu unu la alian en arto, vivo, ĉio... Same kiel ni subtenis unu la alian ĉi-foje en Montrealo...

Restas inspiro. Vi inspiris min provi aliajn aferojn, aliajn artojn, kaj pluri eĉ kiam estis malfacile... Mi esperas ke same la Montreala UK inspiris kaj inspiras kaj inspiros vin provi, aŭdaci kaj ne timi stumbli. Aŭdacu! Viaj amikoj kaj nia komunumo estos tie por subteni vin!

Restas kunlaboro. Nian kunlaboron flegas niaj amikecoj. Ni plie kunlaboru kaj ni realigu jen novajn defiojn Esperantajn – artajn, muzikajn, verkajn! Kune ni riĉigu la Esperantan kulturon. Ĉar... ni povas, kaj ni fortas kune!

Sopiras pri la Montreala UK?

Vi ne estas sola! Sed... Restas memoroj kaj arkivoj! Jen kelkaj utilaj ligiloj:


Kongresa Arkivo de UEA (ĉiuj ekzempleroj de Kongresa Sciulo (la Kongresa Kuriero), la listo de aliĝintoj, Kongresa Libro, ktp.: uea.org/kongresoj/UK/2022


Komuna fotujo: mallonge.net/fotoj2022

Gastlibro de la UK: mallonge.net/gastlibro2022

Telegram-grupo de la UK: mallonge.net/esperanto2022

La UK-retejo (funkcios tra 2023): esperanto2022.ca





La Honora Konsulo de Ukrainio, Eugene Czolij, kun Ĵenja Amis



La montreala UK finiĝis per bato al tradicia indiĝena tamburo — bela tuŝo por honori la kongresan temon



Efemera Artgalerio: unua, unika, tipe montreala!

La Efemera Artgalerio estis unu el pluraj unikaĵoj de nia kongreso. Al ĝi estis dediĉita aparta salono, kie okazis prelegoj, kulturaj eroj, diversaj atelieroj (ekz., kurso pri pentrado, atelieroj de INK/ Bobelarto), aŭtoraj duonhoroj kaj plej diversaj prelegoj kaj honorigaj ceremonioj. La montreala UK estis la plej arte inklinata kongreso el tiuj, kiujn mi spertis – kaj mi demandas min, ĉu eble eĉ ĝenerale en la kongresa historio?

La galerio enhavis plej diversecan kolekton de pentraĵoj, akvareloj, skulptaĵoj, litografiaĵoj, desegnaĵoj kaj alispecaj verkoj de lokaj artistoj, pluraj el kiuj estas niaj nuntempaj artistoj. Estis entute ĉ. 50 verkoj! Kelkaj verkoj estis elektitaj speciale por illustri kanadajn kaj kebekiajn librojn, kiujn KEA kaj ESK eldonis lastatempe, kaj instigi akiri tiujn librojn. Alĝeri-devena montreala pentristo Chlag Amraoui (cetere, Honora

Komitatano de la UK) havis rekordan kvanton de verkoj en la galerio – dekon da originalaj pentraĵoj. Estis kelkaj grandformataj portretoj de D-ro Zamenhof fare de Chlag, estis kelkaj eroj de inuita arto, kaj estis eĉ litografiaĵo de mondfama Jean-Paul Riopelle, unu el la plej konataj kebekiaj artistoj. Mi ege esperas sperti aliajn efemerajn artgaleriojn aliloke dum la UK-oj. Montrealo digne transdonas la artan torĉon!

Ĵenja Amis




Neniam sola!



Efemera Artgalerio ne estis la sola loko, kie montriĝis artaĵoj! Dum la Internacia Arta Vespero estis ekspoziciita memorinda verko de Ila

Firouzabadi, iran-devena montreala skulptistino. Ila estas unu el teamanoj de konata kanada / kebekia filmfaristo Mateo Rankin, kiu filmis dum la UK (post iom da tempo aperos fikci-drama filmo pri la kongreso). Same kiel Chlag, Mateo Rankin estis Honora Komitatano de la Kongreso. La artaĵo de Ila estas mirinda busto de Zamenhof. Ŝi kreis ĝin kun helpo de alia konata iran-devena montreala artisto Payam Mofidi. Notu la skribaĵon "Neniam Sola" (jes-jes, de la fama kanto!). La tekniko estas tre nekutima: temas pri la printado en 3D de la kapo de Zamenhof, muldita kaj kovrita per travidebla rezino. La brusta parto estas ceramika, muldita kaj kovrita per netravidebla blanka rezino.

Ĵenja Amis






Dank' al filma laboro de Alex Miller (Usono), ĉiuj eroj de la Internacia Arta Vespero spekteblas rete! Buntega programo inkluzivas prezentojn de pluraj kanadanoj: Eveline Ménard (Kebekio), Luko Rooyackers (Ontario) kaj Andreo Sly (Brita Kolumbio). Krome, dum la vespero prezentiĝis du novaj kantoj de David Gaines (klasika komponisto el Usono, la aŭtoro de la Simfonio Esperanto): “Ho, mia kor” (unue prezentita antaŭ viva publiko) kaj tutnova kanto “La Ora Ŝipo”, speciale verkita por la Montreala UK, laŭ la vortoj de fama kebekia poeto, Émile Nelligan, en traduko de Trefleo Mercier. Du KEA-estraranoj: Andreo Sly kaj Ĵenja Amis, partoprenis en la prezento de tiu kanto. Estis debuta Esperanta koncerto de du talentegaj kebekiaj artistoj: Kristina Miroshkina kaj Étienne (Stefano) Laflamme. La Internacian

Artan Vesperon konkludis, kiel tradicie, la prezento de la Internacia Esperanto-Koruso, sub la gvido de Zdravka Bojĉeva. Estis tre varia repertuaro. Ĝi inkluzivis, interalie, ukrainan kanton “Bruas kaj muĝas Dnepro Vasta”, kiun enkondukis Ĵenja Amis (kaj dum kiu la spektantaro staris solidare kun Ukrainio), indiĝenan kanton el Ameriko kaj, denove, la amatan “Haleluja” de Leonard Cohen, kiu fariĝis la simbolo de la Montreala UK. La koruson akompanis Stefano Laflamme. Alex ne nur filmis, sed ankaŭ prezentis ludadon per banĝo! La “majstroj de la ceremonioj” — la prezentantoj de la koncerto — estis Linda Le Nepveu (la LKK-ano pri arto) kaj Brandon Sowers.

Koncerto: mallonge.net/IAV2022

Malantaŭ kulisoj: mallonge.net/kulisoj2022



Montreala katedralo bonvenigis esperantistojn



Hans Becklin

Dimanĉon, la 7-an de Aŭgusto en Montrealo, Kanado, okazis la tradicia ekumena diservo kadre de la Universala Kongreso. Tamen, tiu ĉi diservo estis konsiderinde malsama kompare kun tiuj, kiujn mi ĝis nun ĉeestis dum Universalaj Kongresoj, pro tio ke ĝi enhavis kiel sian duan parton protestantan meson laŭ la Anglikana ordo en *Adoru*. La liturgio kongruis kun la situo, la anglikana katedralo Christ Church troviĝanta iom kontraste en la vigla urbocentro de tiu ĉi franclingva kaj historie katolika metropolo, kvankam tuj apud la plej grava anglalingva

universitato de Kanado, McGill. Kompletigis tion ĉi celebrado fare de la loka anglikana pastro Joel Amis, kies aktiveco dum la kongreso ne limiĝis al diservado — ĉar li estis membro de la LKK de la 107-a UK, lia laboro estis plurkampe necesa. Predikis mi, la usona luterana pastro Hans Becklin, pri Luko 12: 32-40 laŭ la Reviziita Komuna Legaĵaro (uzata, inter aliaj, de Luteranoj kaj Anglikanoj en Usono kaj Kanado, kaj kiu siavice baziĝas sur la Roma Legaĵaro pretigita post la Dua Vatikana Konsilio samtempe kun la Misalo de Paŭlo VI). Mia predikaĵo esploris la diversajn

nuancojn de la diro de Jesuo, en kiu li petas sian etan gregon de disĉiploj ne timi, ĉar la Patro jam donis al ili la regnon.

Sekvante la plej fruajn tradiciojn de la eklezio (kiu tamen estas iom fremda al la nuntempa praktiko de la okcidentaj eklezioj, restante ĝenerale konata nur en la orientaj), la diservo estis dividita en du partojn, la diservon

de la kateĥumenoj kaj la diservon de la fideluloj. Formale, nur la unua parto estis la Ekumena Diservo, kiu enhavis plurajn himnojn, ĉiujn legaĵojn, la predikaĵon, kaj finiĝis per komuna konfesado de la fido per la simbolo de Niceo. Post paŭzo kaj poreŭkaristia

alivestiĝo fare de la gvidantoj, sekvis la unuan parton la komuna meso Luterana-Anglikana, konkreta pruvo de la ekumena kunlaborado de tiuj ĉi konfesioj ne nur en apartaj landoj, sed ankaŭ internacie. En 2019, la Luteranaj kaj Anglikanaj eklezioj de Usono kaj Kanado formale



rekonis en siaj asembleoj tion, kio jam de jardekoj neformale ekzistis en la praktiko, nome, ke la kvar eklezioj inter si konsentas pri ĉiuj gravaj dogmoj kaj povas je ĉiuj niveloj rekonigi la validecon de la aliaj. Por ni esperantistoj, tio kulminis en la komuna celebrado de la meso fare de pastro Amis kaj mi, splende vestitaj respektive en kazublo kaj

dalmatiko kaj nerekonieble de malsamaj konfesioj. Oficiale, ĝis tiu deklaro tio ne estus lica, malgraŭ jardekoj da kunlaboro, pro interkonsentoj inter Luteranoj kaj Anglikanoj, kiuj ĉesis validi ĉe la landlimo.

La diservo daŭris 90 minutojn kaj enhavis proksimume 65 ĉeestantojn ĝis la

paŭzo inter la du partoj. Tiam foriris manpleno, kvankam restis multaj pro la beleco de la muziko kaj la liturgio. La himnojn elektis la planantoj ĉefe por speguli la diversecon de himnoj Luteranaj kaj Anglikanaj, ĉiam atentante la legaĵaron. Sed ankaŭ aliajn partojn de la kristana historio ĝi reprezentis.



Ĵenja Amis kaj Andrew (Andreo) Sly (ambaŭ KEA-estraranoj) gvidis la kantadon. Ĉeestis ĉ. 65 personoj

Dum la procesio je la komenco, la homoj kantis *Patro Nia, Ni Alvenis*, originale verkitan de Clarence Bicknell, kaj unike kunplektantan fadenojn kristanajn kaj Esperantistajn en unu pledon antaŭ Dio. La muziko etendiĝis ankaŭ en la komunan tradicion de la okcidenta eklezio, kun gregoriaj ĉantoj kaj diversaj rondeloj. Gvidis la muzikon kanadaj orgenisto Andrew Sly kaj ĉefkantisto Ĵenja Amis. Helpis Usonanoj Tony Harris kaj Brajeno Harmon. Komuniigis trideko da homoj diverskonfesiaj kaj diverslandaj, laŭ la praktiko inter kaj Anglikanoj kaj Luteranoj en Nord-Ameriko, kiu bonvenigas al la altaro iun ajn baptitan kristanon sendepende de ties konfesia aparteno.

Kvankam la grego kunveninta estis, honeste dirite,

eta — almenaŭ laŭ mia ĉiudimanĉa normo — mi povas honeste diri, ke malmultaj spertoj de komuniado de la fideloj same emociis min dum mia pastreco kiel tiu ĉi. Venis ni, nemalofte trans oceanojn, por ekkoni unu la alian, kaj jen ni estas-- ne nur parolantaj unu komunan lingvon, sed fandiĝantaj en la unusolan korpon de Jesuo pro la unu pano kaj la unu kaliko, malgraŭ malsamecoj, kiuj devus nin dividi. Kaj sonas nove kaj freŝe tiuj ofte de mi ripetataj vortoj, kiam mi diras ilin en Esperanto: Jen la Korpo de Kristo, la pano de la ĉielo. Jen la Sango de Kristo, la kaliko de la savo.

La tuta diservo spekteblas en YouTube:

mallonge.net/diservo2022

Unue aperis en *Dia Regno*

Kiel ni proksimiĝu al Unesko en Kanado

Garry Evans



Ĉiuj aktivaj Esperantistoj certe scias, ke ekde 1954 UEA havas oficialajn rilatojn kun Unesko (la Organizo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Tiuj rilatoj estas eble la plej rimarkinda sukceso de Esperanto dum la lastaj 100 jaroj. Ni fieru, ke Esperanto estis, kaj daŭre estas, agnoskita kiel grava tutmonda movado.

Sed ne ĉio glatas. Pasintjare la kampanjo por konvinki Uneskon deklari la 26-an de julio (la tagon, kiam Esperantujo festas la eldonon de la Unua Libro de Esperanto en 1887) la “Internacian Tagon de Esperanto” ne sukcesis. Multaj landasocioj aliĝintaj al UEA sendis leteron al sia nacia Unesko-komisiono por peti subtenon al tiu

propono, sed bedaŭrinde sen efiko. Dum sia Ĝenerala Konferenco en novembro 2021 Unesko akceptis la proponon krei plurajn novajn “internaciajn tagojn”, interalie de la svahila lingvo, sed malakceptis tiun pri Esperanto.

Kiel kanadanoj, kiamaniere ni povas pliprofundigi niajn rilatojn kun Unesko? Ĉu estas ia vojo por kreskigi nian influon sur la organizaĵo, por ke eble dum la sekva Ĝenerala Konferenco, kiu okazos je la fino de 2023, nia propono pri “Internacia Tago de Esperanto” estu akceptita? Krome, ĉar la filozofio kaj idearo de Unesko tre similas al tiuj de Esperanto, verŝajne multaj kanadaj esperantistoj trovos grandan valoron implikante sin en la

laboron de nia nacia Unesko-organizaĵo.

Tamen, ne estas tiom facile. Individuoj ne rajtas rekte membriĝi en la Unesko-komisiono por Kanado. Oni devas aliĝi al unu el ties “retoj”. Estas 9 tiaj retoj:

1. Reto de Biosferaj Rezervejoj
2. Koalicio de Inkluzivemaj Urboj
3. Uneska Lerneja Reto
4. Junulara reto
5. Reto de Unesko-katedroj en Kanadaj universitatoj
6. Monda Heredaĵo
7. Uneska Reto de Kreativaj Urboj
8. Uneska Reto de Tutmondaj Geoparkoj
9. UNEVOC Reto (pri teknika kaj profesia edukado kaj trejnado)

Detalojn oni povas trovi en la retejo de la organizaĵo (kaj en la angla kaj la franca) ĉe en.ccunesco.ca.

Do, ja estas eblecoj por junuloj, lernejoj instruistoj kaj tiuj, kiuj laboras en kanadaj instancoj.

Individuaj junuloj povas iĝi membroj de la “Junulara Konsila Grupo” de la Junulara Reto. Ĝiaj celoj estas “labori en komunumoj tra Kanado por konstrui interkulturan kaj intergeneracian dialogon, instigi socian novigadon en la Nordo, kaj trakti demandojn pri paco kaj akordigo (reconciliation).”

Multaj lernejoj estas membroj de la Lerneja Reto (ekzemple 15 en Ontario). Por instruistoj, se via

lernejo jam membriĝis, certe valoras la penon partopreni en ĝia Unesko-agadoj; se ne, kial ne esplori kiel membriĝi kiel lernejo?

Se vi laboras por iu urbo en Kanado, pensu pri la du retoj, kiuj rilatas al urboj. En la Reto de Kreativaj Urboj, membriĝas nur Montrealo, Kebeko kaj

Toronto. Sed 98 urboj kaj urbetoj estas membroj de la Koalicio de Inkluzivemaj Urboj, inter ili ĉiuj gravaj urbegoj de la lando.

Resume, konstrui pli intimajn rilatojn kun Unesko en Kanado ŝajnas esti grave. Se iuj membroj de KEA legantaj ĉi tiun artikolon havas iajn ligojn kun Unesko, aŭ ideojn kiel proksimigi nian organizaĵon al ĝi, bonvole sciigu la estraron de KEA.






3-A VIRTUALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
24.-27.11.2022



Montrealo denove forte VoKis!

La Montreala UK finiĝis en aŭgusto, sed ne finiĝis ĝiaj kontribuoj al jam Tria Virtuala Kongreso de Esperanto (VK). Kreita kiel anstataŭaĵo por la ĉeestaj kongresoj, la tri pasintaj VK-oj jam havas siajn tradiciojn kaj fidelajn partoprenantojn. Montrealaj kontribuoj estas jen alia tia tradicio. Ĉi-foje montreala UK faris prelegon pri la 107-a UK (parolis Ĵenja Amis, Zdravka Metz, Nicolas Viau kaj Linda Le Nepveu). Spekteblas ankaŭ pluraj koncertoj: ekz., tiu de Yves Desrosiers, Bangô Esperanto kaj de la Internacia Arta Vespero. Estas aliaj kontribuoj, kiel tiu de la Ekumena Diservo. Plus, estas kelkaj mallongaj filmetoj kaj la tuta programo de la kongresa kinejo, kiun oni montris montrealo. Estas du plenlongaj filmoj kaj la tuta aro da filmoj de indiĝenaj filmfaristoj. Pli da informoj:

vk.retevent.com




Dimanĉo - Nacia vespero

- ▶ Organizis la prezidanto de la LKK Normand Fleury kaj Zdravka Metz
- ▶ Miksado de diversaj artaĵoj por montri la bunteco de la kanada kulturo
- ▶ Buffalo Hat Singers
 - ▶ Indigena kantado kun tamburoj
- ▶ Lydia Etok
 - ▶ Virinaj inuitan gorĝan kantadon



Ĵenja Amis

Montrealaj Zamenhojoj malkovritaj!



La partoprenantoj de la 107-a UK en Montrealo malkovris ne nur nian landon, provincon kaj la urbon, sed ankaŭ multajn aferojn pri la vizito de Zamenhof al Ameriko kaj Montrealo. Kun valorega helpo de Jean Alain, ni malkovris tombojn de ĉiuj familianoj de Zamenhof, kiujn li vizitis en 1910. En junio mi gvidis ekskurseton kun kelkaj montrealanoj al la loko, kie estis entombigita la onklino de la Majstro — Anna Cona Samenhof, en kies domo oni kantis la pra-Esperantan himnon (legu pli pri tio en la daŭrigo de la artikolo de William Mann pli poste en ĉi tiu numero). Do, jen interesa fakto: la artikolo de s-ro Mann naskigis

ne nur la teatraĵon “1910”, sed ankaŭ tiun ĉi historian esploron pri montrealaj Zamenhojoj. Mi prelegis pri la Montrealaj Zamenhojoj dum la ĉi-jara UK kaj planas daŭrigi la esploron kaj publikigi la malkovrojn. Mi ĝojis, ke nia samlandano Bill Mak eĉ iris viziti la tombon de la onklino tuj post la UK. Li, fakte, vokis min per Telegram de tie, por ke mi povu de distance gvidi. Atendu do la daŭrigon de la rakonto pri la Montrealaj Zamenhojoj!




Ĵenja Amis



Usono Persone: aŭskultendas ankaŭ kanade!

Jen belega iniciato de niaj najbaroj el Usono, la lando kiu plej multe ĉeestis nian Universalan Kongreson: “Usono Persone”! La podkasto lanĉiĝis pli-malpli tuj post la UK, per la epizodo, kiu multe parolas pri la kongreso kaj diversaj ĝiaj eroj — inkluzive pri la teatraĵo “1910”. Jam aperis sep epizodoj, kaj ĉiuj aŭskulteblas per YouTube: youtube.com/@usonepersone1268 Bonan aŭskultadon!

Ĵenja Amis



The screenshot shows a YouTube video player interface. The address bar contains the URL: youtube.com/watch?v=Ihh_M0zhPJU&list=PLmGyYYPB4misHjEID77X0pPGTCeyRQ-VG&ab_channel=.... The search bar contains the text "usone persone esperanto". The video thumbnail shows three runners in silhouette against a bright blue sky. The text on the thumbnail reads "Usono Persone #001 Kvazaŭ komenco". Below the video player, the channel name "Usono Persone" is visible with 112 subscribers and a "Subscribe" button. The video has 88 views and was uploaded on Oct 28, 2022. The description below the video reads: "Ĝuu la debutan epizodon de Usono persone... en kiu Rafa, Brandon kaj Hanso preparolas la Universalan Kongreson en Montrealo, la estontecon de la Esperanto-movado en Nordameriko, kaj plurajn novajn librojn."

Zamenhof-festoj tutmonde: superrigardo en Eventa Servo

Baldaŭ okazos en la tuta mondo diversaj eventoj, renkontiĝoj kaj festoj lige kun la Zamenhof-tago, la 15-a de decembro. Por montri la viklecon de tiuj okazoj, la retejo Eventa Servo ekdisponigis specialan paĝon: zamenhof.eventaservo.org. Ĝi ligas al la serĉilo de Eventa Servo, ĉe kiu jam aperas pli ol 30 rilataj eventoj!



La paĝo estas rezulto de kunlaboro inter Yves Nivelsteen, komisiito de UEA pri reta agado kaj kunordiganto de la Fonduso Instigo, Fernando Ŝajani, kreinto de Eventa Servo, kaj Lode Van de Velde, eldonisto (Eldonejo Libera).

UEA invitas la Esperanto-komunumon kapti la okazon aldoni al la listo ankaŭ sian eventon aŭ feston ĉirkaŭ la Zamenhof-tago. Ĉu mankas via festo? Aldonu ĝin! Instruĉian filmeton pri kiel registriĝi oni vidu ĉe: mallonge.net/es1. Se restas dubo aŭ se vi spertas praktikan malfacilaĵon, ne hezitu sendi retmesaĝon al kontakto@eventaservo.org.

Renkontu Trefleon Mercier: KEA-estrarano, tradukisto

Lumo, pere de Bob Williamson, intervjuis Trefleon (Trefflé) Mercier pri lia sperto rilate la tradukadon de la klasika kanada anglalingva romano de Lucy Maud Montgomery, *Anne of Green Gables*, en Esperanton. Tiu traduko, la unua konata en la Esperanta mondo, estis eldonita de Mondial ĝustatempe por la UK en Montrealo.

BW — Ĉu vi povus prezenti vin? Kiu vi estas?

TM — Mi estas emerita tradukisto naskiĝinta en dulingva komunumo de Norda Ontario en 1939, kiu ekinteresiĝis pri Esperanto kaj komencis lerni ĝin kiel junulo. Kiel multaj esperantistoj, mi interesiĝis pri lingvoj kaj eĉ aldonis la hispanan al mia kolekto. Tamen, mi vere serioziĝis pri Esperanto kaj esperantistiĝis kiam mi translokiĝis al Ŝerbruko, Kebekio, pro mia profesio en 1964. Tiam mi organizis klasojn kaj instruis la lingvon kvazaŭ mi estus spertulo! (Aŭdaco de memfida junulo.) La kulmino de unu el tiuj klasoj estis ĉeesti universalan kongreson; tiu estis mia unua UK kaj tri amikinoj kaj mi iris al Heksinko en 1969. La sperto estis granda rivelado troviĝi inter



Trefleo (Trefflé) Mercier

tiom da homoj el plej diversaj landoj kaj interparoli nur unu lingvon. Mi sentis min konkerita por la vivo! Poste alvenis en mian vivon universitata profesoro pri franca lingvistiko, kiu interesiĝis pri la fenomeno Esperanto: Petro Collinge. Petro donis al mi novan impulson. Ni streĉe kunlaboris kaj organizis multajn aktivecojn. Li organizis sukcesan kurson ĉe la loka universitato kaj ni starigis novan lokan klubon. Estis la “ora epoko” de Esperanto en Ŝerbruko! Bedaŭrinde ĝi finiĝis, kiam Petro tro frue forpasis.

BW — Kial vi ekinteresiĝis pri tradukado en Esperanton?

TM — Traduki por mi estas tute natura ekzerco. Dum mia tuta profesia vivo mi devis redakti kaj

traduki en la anglan kaj la francan, krom pli kaj pli eĉ en la hispanan por usona kliento. Kiam mi perfektigis mian Esperanton mi nature deziris uzi tiun fascinan lingvon kaj speciale fronti defiojn pri malfacilaj tekstoj. Vi scias, bona maniero pliboniĝi en iu lingvo estas traduki. Vi voras vortarojn kaj gramatikojn!

BW — Kiajn malfacilaĵojn vi frontis kiam vi laboris pri *Maria Chapdelaine* kaj *Nokta ŝoforo*?

TM — Pri *Nokta ŝoforo* ne estis aparta malfacilaĵo, sed *Maria* prezentis plurajn “kapdolorojn”. La problemo pri tiu romano estas traduki esperanten la tipajn esprimojn de la kebekia dialekto en la familiaraj dialogoj. La franca lingvo ne vere helpas, ĉar la kebekia dialekto estas tute

aparta lingvaĵo kvankam ĝi devenas de la franca. Tio signifis traduki esperanten sen la tipa sapor de la originala kebekia. Tipa ekzemplo el la romano estas “Toffe, Edwidge, toffe!” Se vi komprenas la anglan, vi povas dedukti, ke “toffe”


venas de “tough”; mi tradukis tion en la romano per “Rezistu, Edwidge, rezistu!” Probable “Persistu, Edwidge, persistu!” estus tiel bona se ne pli. La franca aŭtoro de *Maria Chapdelaine*, Louis Hémon, devis amuziĝi, kiam li kreis la tipan dialogon de ĉe ni. Kaj mi imagas, ke estas la sama defio por tiuj kiuj tradukas la kebekian en aliajn lingvojn.

BW — Kial vi elektis traduki la anglalingvan romanon *Anne of Green Gables*?

TM — Tiu romano



La ĉi-supra foto aperinta sur la kovrilo de la revuo *La Praktiko* en oktobro 1968 montras grupeton de lernantoj de Esperanto en Ŝerbruko, Kebekio. Je la maldekstro staras Lorcán Ó hUiginn, tiama prezidanto de KEA, kaj en la mezo, en la fono, la kursgvidanto Trefflé Mercier.



estas fama klasikaĵo en anglalingva Kanado, kiel *Maria Chapdelaine* ankaŭ estas klasikaĵo en franclingva Kanado. Oni instruas ambaŭ en lernejoj kaj ambaŭ estas tradukitaj en multajn naciajn lingvojn. Mi serĉis defion pri angla literaturo kaj mi ĝin trovis. Estas vere interesa verko, bele strukturita kun belaj dialogoj kaj ne nur por infanoj!

BW — Ĉu *Anne of Green Gables* prezentis apartan malfacilaĵon al vi?

TM — Malpli ol *Maria Chapdelaine*. La lingvaĵo estas ĝenerale pli facila, malgraŭ la fakto, ke Lucy Maud Montgomery, la aŭtorino, uzis esprimojn

malofte uzatajn en la nuntempa angla kaj kelkafoje malfacile troveblajn en vortaroj aŭ la interreto. Bela ekzemplo estas kiam Anna diras al Mateo, ke ŝi estis “brought up by hand”. Kiu diras tion nuntempe por diri ke ŝi estis adoptita? Mi serĉis en la reto kaj trovis diversajn konjektojn, inter ili “esti batita”! La aliaj tiaj problemoj estis pli facile solveblaj, ofte pro la kunteksto.

BW — Ĉu vi havas planojn por aliaj tradukoj?

TM — Pri literaturo, ne, kvankam estas tiom da eblecoj. Mi ne estas tiel tradukema, kiel mia kolego Detlef Karthaus! Eble mi ŝatus “ataki” nuntempan verkaĵon. La Esperanta legantaro estas tiel malvasta. Se iu, kiel eldonisto, ekzemple, farus ekcitan proponon, mi certe konsiderus ĝin.

BW — Kiel oni povas havigi al si ekzemplerojn de viaj tradukoj?

TM — Pri *Maria Chapdelaine*: Esperanto-Societo Kebekia, <http://www.esperanto.qc.ca/fr> aŭ 6595, rue Briand, Montréal (Québec) H4E 3L4; pri *Anna de Verdaj Gabloj*: Eldonejo Mondial, Novjorko: <http://www.librejo.com>; ankaŭ sendube [Amazon.com](http://www.amazon.com); kaj pri la kompaktdisko *Nokta ŝoforo*: Boutique Audiogram, www.audiogram.com 355, rue Sainte-Catherine O, bureau 600, Montréal, QC H3B 1A5; ankaŭ vendita ĉe Spotify, You Tube Music, Apple Music.

Biblioteko.ca: Libraro Ludovika disponeblas rete!

Jes, vi ne mislegis! La tuta kolekto de Libraro Ludovika de KEA estas havebla por la membroj de nia asocio! Dank' al laborego de Martin Morris, profesia bibliotekisto, la tuta biblioteko estas zorge katalogita, serĉebla, kaj ĉiu libro de ĝi estas pruntebla por la membroj de KEA kaj ESK. Aldone, en la sama katalogo, troveblas la tuta biblioteko de la Esperanto-Societo de Kebekio. Vi povas serĉi librojn, muzikon kaj periodaĵojn. Kiam vi trovis, kion vi serĉas, vi povas mendi la erojn. Oni sendos ĝin al vi tute senpage — dank' al malavaraj

donacoj de kelkaj individuoj el Kanado. Vi tamen devos mem resendi la erojn, post kiam vi legis / aŭskultis. Simple iru al la retejo biblioteko.ca. La biblioteko eĉ havas la detalan instrukcion pri la uzado, listojn de rekomendoj (ekz., kolekto de UK-2022 kaj Baza Legolisto de W. Auld) kaj eĉ lokon por sugestoj. Notu, ke temas ne nur pri malnovaj libroj. Dum la ĉi-jara UK, KEA-estraro komisiis al Martin Morris novigi la kolekton, kaj vi povas ankaŭ prunti kelkajn el plej novaj eldonoj — inkluzive tiujn de KEA / ESK mem! Bonan legadon!

Ĉareto Listoj Lingvoj Ensalutu al via konto Serĉhistorio

Bonvenon al la biblioteko Kanada Esperanto-Asocio

Titolo ▾ gabloj

Detala serĉo | Aŭtoritatoserĉo | Lastatempaj komentoj | Nubo da e

Hejmo > Rezultoj de serĉo por 'gabloj'

Nenio troviĝis!

Nenio troviĝis por tio en katalogo Kanadaj Esperanto-Bibliotekoj.

Raportu problemon

Montru listojn

Publikaj listoj

- Ludovikito
- Kolekto UK 2022
- Baza Legolisto de Auld
- View all

Viaj listoj

Ensalutu por krei viajn proprajn listojn

Kiel uzi la bibliotekon

Pliaj informoj pri kiel pruntepreni de la Biblioteko, kaj peti skanaĵojn

Kiel uzi

Historio

Lerni pli pri la historio de la Biblioteko, kaj pri ĝia posta historio

Historio

Funkciigita de Koha

Kanada Junularo aktivas!


Junularo Esperantista Kanada (JEK) estas la junulara sekcio de KEA. Ĉiu membro de KEA, kiu havas 30 jarojn aŭ malpli, estas membro de JEK kaj povas partopreni ĝiajn eventojn. JEK serĉas novajn membrojn kaj volontulojn. Se vi interesiĝas pri la juna Esperanta movado en Kanado, aliĝu al niaj kanaloj!

Discord: <https://discord.gg/exZg3hTkgu>

Twitter: https://twitter.com/jek_esperanto

Retpoŝto: junularoesperantistakanada (ĉe) [gmail.com](mailto:junularoesperantistakanada@gmail.com)

Jordan Zero



Jordan Zero

MEKARO-2023 ĉe-lage!

Post 3-jara deviga paŭzo pro la pandemio, jen revenas plia amata Esperanto-evento: MeKaRo, aŭ Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto, kiu okazas unu jaron en Kebekio kaj alian en Ontario, alterne! Ĉi-foje ni ĝuos kampanan ekskurson en la regiono de la Georgia Golfeto, en la turisma urbo Midland, ĉe la Granda Lago Huron. MeKaRo okazos je la 20-a ĝis la 22-a de majo 2023 (la longa semajnfino en majo). Vizitu la retejon mekaro.ca Ĝi jam havas la aliĝilon, programon, informojn pri loĝado kaj ligilon al la Google-grupo de partoprenontoj. Ĝis la revido en MeKaRo!

20a – 22a de Majo, 2023

Programo

Loĝado

Kotizo

Transportado

Horaro

Aliĝilo

Aliĝintoj


Bonvenon!



Bonvenon al la retejo de MeKaRo 2023! Ĉi-foje ni ĝuos kampanan ekskurson en la regiono de la Georgia Golfeto, centrigita en la turisma urbo Midland. **MeKaRo okazos je la 20a ĝis la 22a de majo, 2023.**

Du kanadaj filmoj en Usona Bona Filmfestivalo!

Ĉi-oktobre okazis jen la kvara eldono de Usona Bona Filmfestivalo. Partoprenantoj el pluraj landoj konkursis, inkluzive de du kanadaj filmoj. Ambaŭ kanadaj filmoj venis de montrealanoj: unu de Cynthia Wu-Maheux, profesia aktorino. Ŝi kreis kaj aktoris en belega kaj kortuŝa kontraŭmilita poezia 5-minuta filmo. La dua kanada filmo estis tiu de Ĵenja Amis, kiu faris, helpe kun Alex Miller, filmeton pri la unua Esperanto-kanto en Ameriko. Jes, tiu same, kiu premieris vive en 1910, dum la Sesa Internacia Kongreso, kaj kiu poste repremieris en la teatraĵo "1910". Ĝi estas la unua kanto eldonita en Esperanto en Ameriko, kaj ĝi estis perdita dum pli ol cent jaroj. Ĵenja sukcesis remalkovri ĝin kaj aŭdigi dum la Montreala UK ĉi-aŭguste. [Spektu la tutan kolekton de 30 filmoj](https://www.youtube.com/@EsperantoUSA) en la YouTube-kanalo de Esperanto USA: [youtube.com/@EsperantoUSA](https://www.youtube.com/@EsperantoUSA) La iniciatinto kaj ĉefa motoro de la festivalo estas Alex Miller, el Atlanto: profesia aktoro, filmfaristo kaj unu el aktivegaj volontuloj de la Montreala UK. Pensu partopreni en la sekva eldono de la festivalo! Ĉiuj informoj en la retejo de Esperanto-USA: esperanto-usa.org/eusa/film_festival/eo



Lumo: 120-jara!

“Pri—Per—Pro—Por Esperanto” Sub tiu ĉi slogano, en Montrealo, en januaro 1902, aperis la unua numero de *La Lumo*, kiel posteulo de La Kanada Esperantisto (Espérantiste Canadien). Ĝi aperis kun la sama bela bildo de la knabino, tenanta ampolon (filino de unu el pioniroj de la frua tempo). La revuo estis trilingva: franca-Esperanta-angla, kun belaj bildoj kaj varia enhavo (novaĵoj lokaj kaj mondaj, korespondpetoj, lecionoj kaj ekzercoj, vortaro, propagandaj artikoloj, artikoloj por virinoj). La revuo dormis de 1904 ĝis la 1960-aj jaroj. Indas festi la 120-jariĝon, kaj daŭran pri-Lumadon de la Movado en Kanado kaj tutmonde! La arkivo de La Lumo baldaŭ troviĝos en biblioteko.ca.

Sed kio pri la muzik-notoj sur la kovrilo? Jes, temas pri *La Espero* — sed ne tiu, pri kiu vi eble nun pensas! Estas alia versio, de eĉ pli frua tempo, ol tiu, kiu fariĝis nia oficiala himno. Estas komponaĵo de Claes A. Adelsköld, el Svedio. Li komponis tiun ĉi version en 1891. Aŭskultu ĝin ĉi tie: mallonge.net/FruaEspero

30 L A L U M O

QUELQUES MOYENS DE PROPAGANDE
(Suite)

Par ANDRÉ MOUVREY

Chacun observe, dès lors la marche, qu'il préféra, mais il faut toujours en revenir à ceci : simplicité et utilité de la langue, diversité de ses adeptes, réputation de l'argument des différences de prononciation (le plus fréquent), insister sur ce point que l'Espéranto peut servir même auprès de ceux qui l'ignorent, etc... Du reste, les objections de vos interlocuteurs vous serviront de plan tout fait. Sachant l'Espéranto vous pourrez répondre à tout ce qui touche la constitution même de l'Idéone, les articles de l'Espérantiste, les préfaces des Manuels, les études sur la question placée à la fin des Commentaires, vous permettrez de répondre aux arguments théoriques, enfin votre expérience personnelle qu'il dépend de vous d'écrire, votre correspondance en Esperanto, vous fourniront une mine suffisante de faits à opposer aux arguments d'ordre pratique. A l'issue de la conversation, proposez d'envoyer à ceux qui seraient désireux d'être éclairés davantage la brochure 122. "L'Espéranto seule solution de la langue internationale."

(A suivre)

Leo Tolstol, the Great Russian author says: "The sacrifices which every member of our European world will make in devoting some time to the study of Esperanto are so small and the results so immense that one can not refuse to make this attempt."


AL LA KOLEKTANTOJ

Mi kolektas poŝtmarkojn eksterlandajn tujajn aŭ ne.

Mi estas preta interŝanĝi kun la amikoj esperantistaj.

L. W. SCOTT, Greffier de la Couronne, Montréal, Canada.

DEKZICANTULO LEKNI



PRINTEMPO

La bela naturo disfloris,
Aromon plenigas l'aeron,
Animoj forlitiĝis deziras
Al kampo, al verda arbar!

De supro la blua ĉielo
Karesas animojn, okulojn,
La mondo nun kvazaŭ moviĝis
Kaj ĉiujn allogas al si.

Kaj celas nun ĉies deziro
En spacon de l'verda naturo,
Vekiĝas belsona kanto
Kaj sonas en pura faer!

IVAN SELEZNEV. — Sio JOHNSON. — Kaj vi kederas vin kapabla viviĝadi mian filmon simile kiel ŝi estis edukita?
Sio BLANK. — Jes. Tamen, kun vi devos viviĝadi dum unu aŭ du jaroj, ĝis mi lernas kiel vi ŝin edukis.

Melekes (Rusujo), 13, VIII, 3863.

ESPERO.
Himno Esperanta. Cf. Adelsköld.

Al'ĉi tiu ĉi versio.



2. La la... (vocal line)
3. ... (vocal line)
4. ... (vocal line)
5. ... (vocal line)
6. ... (vocal line)
7. ... (vocal line)
8. ... (vocal line)
9. ... (vocal line)
10. ... (vocal line)
11. ... (vocal line)
12. ... (vocal line)

No 2 (Espérantiste Canadien, No 7) En Montrealo, la 1^{re} de Februaro 1902a

En la mondo venis nova scienco —
(L. ZAMENHOF)

LA LUMO


PRI PER PRO POR ESPERANTO



LA LUMO,
en MONTREALO,
KANADO.

PREZIO: 25 CENTS

FRANCO: 1.00



En norda Ameriko : Vagonaro haltigita pro la neĝo.



En Kanado : Ripozo dum la Ĉasado

LA LUMO

Organo de la helpanta lingvo internacia "Esperanto"

Eldonata Ĉiumonate

ADMINISTRACIO KAJ REDAKCIO

79 ST. CHRISTOPHE ST., EN MONTREALO, KANADO

KOMITATO DE LA REDAKCIO

A. REMBERT, Administranto
 J. B. A. LEO LEYMARIE, - Ĉefredaktoro
 A. P. BEAUCHEMIN, Redaktoro de la Esperanto-parto
 CHAS F. LARKIN, . . . Redaktoro de la angla parto

JARA ABONO

Kanado kaj Unuigitaj Statoj \$o 5o
 Eksterlandoj frankoj 3 00

Ni ricevas eksterlandajn poŝtmarkojn por la kosto de la abono.

Cinj letersoj koncernantajn la redakcion devas este adresitaj al la Ĉefredaktoro.

NOTRE SITUATION

Nous faisons ici, en Canada, une lutte très dure ; nos efforts doivent être assez nombreux pour obtenir des résultats appréciables.

Recevant partout ou presque partout un encouragement manifeste pour ce qui est de l'idée d'une langue internationale, nous devons surtout réserver notre patience et nos arguments pour faire comprendre la supériorité de l'Esperanto sur les langues actuellement en vedette pour occuper la place définitive de langue auxiliaire internationale.

Nous trouvons en la chute du Volapuk un ennuyeux précédent, les personnes s'étant occupé de la question trouvent en cet événement un mauvais présage pour l'avenir de l'Esperanto, mais veulent bien après discussion admettre que nous avons plus de conditions vitales que la langue de l'Abbé Schleyer.

Il est très rarement question de la langue Islyenne, car elle n'est connue ici que par des communiqués d'agences et n'a pas l'avantage d'avoir fait ses preuves dans le Canada.

Il n'est jamais question de mettre sur les rangs le Spelin ou la Langue Bleue qui ne sont pas connues ici.

Le mélange proposé par M. Paul Chappelier, fait sourire, même nos adversaires acharnés; car le Canada, mieux que n'importe quel pays au monde, peut comprendre l'erreur d'une semblable fusion. L'Anglais est ici en lutte constante avec le Français et ceux de ces derniers qui ne parlent pas bien la langue de Shakespeare, ceux qui lui laissent tout en la causant des tournures françaises font rire : quant aux gens des campagnes qui parlent une langue qui n'est ni anglaise ni française lorsqu'ils veulent paraître très au courant ils s'attirent les quolibets de tous, tant l'ensemble de leur conversation est grossier.

Nous avons donc à lutter :
 1o Avec les latinistes ;
 2o Avec ceux qui veulent le Français;
 En lisant la rubrique *A travers nos confères*, nos lecteurs verront quels ont été de part et d'autres les arguments échangés. Nous croyons avoir obtenu la meilleure position, car nos adversaires préconisant le français ne reste plus dans la lutte ; les latinistes dont J. B. L., de St. Hyacinthe semblait être le vaillant et courageux porte-drapeau demandant à connaître la langue du Dr Zamenhof comprenant, un peu tard peut-être, que la première force pour nous combattre

NIA SITUACIO

Partoprenante tie ĉi, en Kanado, tre severan bataladon, niaj penadoj devas esti sufiĉe multaj por ke ni ricevu ŝatindajn rezultatojn.

Ricevante ĉie, aŭ prekaŭ ĉie, kuragiĝon elvideblan por la ideo de lingvo internacia, ni devas precipe rizervi nian paciencon kaj niajn argumentojn por komprenigi la superecon aŭ plivalorecon de Esperanto kontraŭ la lingvoj nuntempe celantaj okupi la difenitan lokon de helpanta lingvo internacia.

Ni sentas, pro la falo de Volapuko, enuigan antaŭaĵon ; la personoj, kiuj sin okupis pri tiu temo, sentas, pro tiu okazitaĵo, malbonan antaŭsignon por la estonteco de Esperanto ; kvankam, post kelke da kontraŭparoladoj, ili volonte rekonas ke Esperanto enhavas pli da vivajn kondiĉojn ol la lingvo de Sinjoro Abato Schleyer.

Oni tre malofte parolas pri la Islyna (Islyenne) lingvo, ĉar ĝi esta konata tie ĉi nur per agentaj komunikoj kaj ĝi ne havis la oportunaĵon por montri sian efikecon en Kanado.

Oni neniam parolas pri la Spelina lingvo (langue Spelin) aŭ pri la Bolaka lingvo (langue bleue), kiuj ne estas konataj tie ĉi.

La duaj proponita de Sinjoro Paul Chappelier ridetigas eĉ niajn plej incitantajn kontraŭbatalantojn ; ĉar la Kanadanoj povas, pli bone ol la aliaj tutmondanoj, kompreni la eraron de tiela miksaĵo, kiu estas la franca kaj la angla lingvoj akceptitaj kiel internaciaj lingvoj. Efektive, la angla lingvo estas tie ĉi konstante batalanta kontraŭ la franca, kvankam ambaŭ estas rajtigataj de la regnaro. La rezultato de tiuj kumirantaj lingvoj estas ke la francoparolantoj lernas paroli malbone la anglan lingvon kaj aliflanke la angloparolantoj neniam volas paroli la francan lingvon, kiu vere estas por ili tre malfacila.

Tie ĉi ni do nur havas por kontraŭbatali : Unue, la latinanojn ; Due, tiujn kiuj deziras nur la francan lingvon.

Legante la rubrikon *Tra niaj kolegoj*, niaj legantoj vidas kiuj estis ĉiaflanke la argumentoj intersangitaj. Ni kredas ke ni atingis la plej bonan rezultaton. Ĉar niaj kontraŭuloj batalantaj

LA LUMO

komprenas, eble iom malfrue, ke, por bone batali kontraŭ ni, estas necese instruiĝi pri la lingva kombino kaj vortfarado de nia lingvo internacia Esperanto.

A. P. BEAUCHEMIN.

BUSINESS

The general adoption of the Auxiliary International Language, with its unique vocabulary, which renders it not only the most simple, but the most copious and exact of all languages, will inevitably mark an era of great progress in the world's history. Business men will be able to deal direct with the inhabitants of all other countries; they will send circulars and commercial literature to all quarters of the globe, with the certainty of their being read and understood by all nations; they will write or dictate all foreign correspondence and documents direct to their shorthand-writers, without the assistance of translators, as there are already two shorthand systems in Esperanto, which would ensure far greater accuracy and despatch; and their agents and traveling salesmen will be able to make sales as effectually and expeditiously in foreign countries as they could in their own.

At the present time a large number of the principal houses in Europe know Esperanto. But let us suppose the case of an English-speaking commercial traveler in South America, who wishes to dispose of his wares to a Peruvian, and that they are ignorant of each other's language. I will assume that the traveler has provided himself with a small Esperanto-Spanish and Spanish-Esperanto dictionary, costing only a few cents. This he hands to the Peruvian, who reads the directions in Spanish, learns the sixteen rules and the pronunciation of the alphabet. Then, the traveler, even if he is ignorant of Esperanto, may use his Esperanto-English and English-Esperanto dictionary in the same manner. All they have now to do is to select the different word-building elements they require, and they will thus be able to carry on a simple conversation with comparatively little inconvenience, a proceeding which would be impossible in any other language. No doubt each would arrange his words according to the order peculiar to his mother-tongue; but the Esperanto language is flexible and adapts itself readily to all idioms. (a fact which I have fre-

LA LUMO

Organ of the auxiliary international language "Esperanto"

Published Monthly Edited in Collaboration

Administrative and Editorial Offices:

79 ST. CHRISTOPHER ST., MONTREAL, CANADA

COMMITTEE OF EDITORS

A. REMBERT, Administrator
 J. B. A. LEO LEYMARIE, Chief Editor

ESK 40-jariĝis kaj la Montreala Esperanto-klubo 60-jariĝis, kaj daŭre junas!

Ĉi-jare ne estas nur *Lumo*, kiu havas belan datrevenon. Festas siajn jubileojn ankaŭ Esperanto-Societo Kebekia — ESK. Ĝi estas fondita la 5-an de septembro 1982. Normando Fleury — la estro de la LKK por la Montreala UK — estis ĝia kunfondinto kaj plej longdaŭra prezidanto. La nuna prezidanto de ESK estas jen alia LKK-ano: Nicolas Viau (vic-prezidanto kaj delegito pri eksteraj rilatoj).

Sed la datrevenoj kebekie ne finiĝas! Festas sian 60-jariĝon ankaŭ Montreala Esperanto-Klubo (MEK).

Ĝi estis fondita la 17-an de aprilo 1962. La fondinto estis François (Frank) de Kinder (1891–1970), kaj lia filo ankaŭ ĉeestis la malferman ceremonion por la UK.

Mi kopias elĉerpaĵon pri Frank de Kinder el la eldono de *La Riverego / Lumo* de marto 2022.

Frank de Kinder estis kunfondinto kaj la unua prezidanto de Montreala Esperanto-Klubo (MEK),

en 1962. Li estis bone konata en la Esperantomovado de Kebekio kaj Kanado. En 1967 (la jaro de la famega tutmonda ekspozicio, Expo 67), nome de la Skolta Ligo, li organizis budon pri Esperanto, kiu aktivis dum ses monatoj.

En 1968–69 li okupis vic-prezidantan postenon en la estraro de Kanada Esperanto-Asocio. Frank de Kinder sugestis, ke estu speciala Propaganda Komitato, al kiu estis elektitaj Frank De Kinder, Paul Durette, Di Biasio, Peter Laufen. Tiu komitato, prezidata de Jacqueline Riverin, kunvenis

ĉiumerkrede ĉe la domo de Frank De Kinder. Tiuj kunvenoj estis sukcesaj. La filo de Frank, Maurice de Kinder (nask. 1926), same lernis kaj aktivis en MEK (esperantistiĝis en 1966, partoprenis la UK-on en 1969). Kiam la klubo ricevis ejon en Aréna Père-Marquette, li helpis sian patron pri la aktivecoj.



Ĵenja Amis

UK-aktivuloj ĉe la Internacia Tago de Paco

La UK finiĝis, sed ne finiĝis aventuroj de pluraj UK-volontuloj! Komence de septembro 2022 pluraj aktivuloj de la montreala kongreso vojaĝis por prezenti kun la Internacia Esperanto-Koruso (IEK)

dum la Internacia Tago de Paco de UNESKO en Tolosa (Eŭskio — Hispanio). La programon preparis Zdravka Bojtcheva, la estrino de la IEK. Fakte, por la Koruso, la montreala UK estis ankaŭ okazo provludi la kantojn, kiujn oni ankaŭ prezentis en Tolosa! La tutan eventon organizis kaj subtenis François Lo Jacomo (Francio), kun helpo de eŭskaj esperantistoj kaj Zdravka Bojtcheva. Ni prezentis kun aliaj tri korusoj – Madrida Junulara Koruso, Junulara Koruso de Eŭskio kaj Koruso de Cecilia Espinosa (Kolombio). Kelkajn kantojn ni kantis kune, inkluzive de du kantoj en la eŭska lingvo. La Internacia Tago de Paco devis okazi en



La Internacia Esperanto-Koruso kantis en kvar publikaj placoj en Tolosa

Tolosa (ho ve, same kiel la UK) en 2020. Kaj same kiel la UK, ĝi estis nuligita, kaj finfine okazis en 2022. La ĉefa kanto de la festivalo estis speciale verkita por tiu ĉi evento – oni prezentis ĝin

virtuale en 2020, kaj jen, finfine, en 2022 ni povis kanti ĝin kune, kun ĉiuj kvar korusoj. La komponisto kaj dirigento estis tre konata eŭska muzikisto, Josu Elberdin. Tiun kanton (“Zatoz”) akompanis infano-geniuulo — blinda pianisto kun rara genetika degenera malsano,

kiu kaŭzas tro fruan aĝiĝon. Li akompanis absolute brile! Estis mirinda sperto ne nur vidi belegan Eŭskion, sed ankaŭ kanti en Esperanto en impresa koncerthalo kaj sur kvar publikaj placoj. Sed eĉ pli agrable estis revidi plurajn partoprenantojn de la UK post apenaŭ kelkaj semajnoj kaj denove labori kun kara Zdravka Bojtcheva.



Fina spektaklo, kiam la kvar korusoj estis kunigitaj por tri komunaj kantoj

El inter Montrealaj aktivuloj ĉeestis Linda Le Nepveu (LKK-ano pri arto de la UK 2022), Suzano Roy, el Trivero (respondeculino pri la postkongreso kaj la LKK-ano de la UK 2020), Alena Adler (reĝisoro kaj aktoro en la teatraĵo “1910” kaj kantisto de “Stelmanio”), kaj mi mem. Pluraj aliaj korusanoj ankaŭ partoprenis nian kongreson.

Krom la prezentaĵoj de la korusoj, okazis ankaŭ panelo pri la rolo de junuloj en la kreo de paco. La panelon partoprenis reprezentanto de ĉiu koruso. La Internacian Esperanto-Koruson bonege reprezentis Linda Le Nepveu. Pluraj ĵurnalistoj ĉeestis tiun eventon, kaj ni ĝojas, ke tiel oni povis ankaŭ konatiĝi kun Esperanto!

Ĵenja Amis



Linda Le Nepveu estis unu el panelistoj



Internacia Esperanto-Koruso kantis La Esperon en Tolosa



Aŭtuna Odo, originala poemo

de Kanada Esperantistino Betty Salt el Kalgario; el *Lumo*, 1964

Ho Kara, vasta, bela, ĉarma lando,
Mia Kanado! Kiel ridetante
Vi etendiĝas de la mara rando
Trans stepoj kaj arbaroj, kunportante
Viajn riĉaĵojn sur kaj sub via brusto,
Ĝis de alia mar' de sala gusto.

Kiel mi amegas parton mian
Kie sunhelaj tagoj ĉiam ridas,
Kie sur blua ĉielo benon Dian
Ĉe ŝinukarko mi tiel ofte vidas...
Blove desegnas en la okcidento.

Aŭtuna gloro tra la land' troviĝas
Kvazaŭ vasta brilo de fajraro:
Folioj multkoloraj disbloviĝas
Flirte en la koroj de l' homaro.

Sorĉas silenta solentim' la koron,
Kaj kreitaĵoj faras Di' adoron.

Kritikantoj, plendu, se vi volas:
Jen mi, kiu valorigas la bonŝancon
Loĝi tie, kie mi parolas
Libere, ĝoje plongas en la dancon
De vivo, kaj ricevas ĉiun specon
De ŝanco... krome ja l'aŭtunbelecon!



Historia Parko de Bela Joe en Meaford, Ontario, kun Arbo de Amikeco. La Historia Societo de Bela Joe (Beautiful Joe) honoris Kanadan Esperanto-Asocion pro la aperigo de la Esperant-traduko de Beautiful Joe (Bela Joe).



Bela Joe



MARSHALL SAUNDERS

Arbo de Amikeco - Tree of Friendship
 This Sugar maple is planted to commemorate the second edition of Beautiful Joe in the global Auxiliary language, ESPERANTO.
 The Canadian Esperanto Association
 2022

Sycamore Tree:

This Sycamore (*Platanus occidentalis*) is a Carolinian species. Its shedding bark is normal making the trunk appear like camouflage. This specimen is said to be the oldest most northerly sycamore in North America and is several hundred years old.

Paradise Islands:

These kiosks were inspired by Margaret Marshall Saunders' sequel, *Beautiful Joe's Paradise* (1906). The Paradise Islands here are home to plaques memorializing beloved pets and working animals from all over the world. Plaques can be purchased from the Beautiful Joe Heritage Society.
www.beautifuljoe.org

(Margaret) Marshall Saunders (1861 - 1947)

Margaret Marshall Saunders was born in Milan, Nova Scotia, lived in Toronto and is buried in Mount Pleasant Cemetery. Miss Saunders visited her literary sister-in-law, Louise Moberg, here in Meaford where she met Joe. This notable inspired her to write *Beautiful Joe*, the 2nd and definitely the most successful of 24 books that she printed.
www.beautifuljoe.org

4 New Information Standards

La Sesa Internacia Kongreso de Esperanto

Washington, 14-21 Septembro, 1910 (British Esperantist)

(Bildoj el la Notlibro de Ĉeestinto)

La Malferma Kunsido.

La Sesa Mondkongreso oficiale malfermiĝis lundon la 15an, matene je la deka, en la granda aŭditorio de la Arlington Hotelo. La salonego, bele ornamita per Esperantistaj flagoj, estis tiel plena, ke multaj samideanoj devis stari. Inter la delegitoj sur la estrado oni povis rimarki la pitoreskan kostumon de du ĥinoj.

La kunsidon formale malfermis Kapitano Perogordo el Madrid, anstataŭ la prezidinto de la Kvina Kongreso, S-ro Pujula, kiu ne povis veni Amerikon. Li proponas al la Kongreso, en la nomo de la K.K.K., la jenan estraron, kiun oni aklande akceptas: Prezidanto, John Barrett, prezidanto de la Esperantista Asocio de Nord-Ameriko kaj Estro

de la Oficejo de la Amerikaj Respublikoj; vicprezidantoj, D-ro Yemans kaj D-rino Ivy Kellerman-Reed; sekretarioj, Gabriel Chavet, sekretario de la K. K. K. [Konstanta Kongresa Komitato -- Red.], kaj Edwin C. Reed, sekretario de la Loka Organiza Komitato. Li ankaŭ anoncas la vicprezidantojn, kiujn rajtas ĉiu kongresfarinta nacio: Britujo, W. W. Mann; Francujo, Rollet de l'Isle; Germanujo, D-ro Mybs; kaj Hispanujo, Kapitano Perogordo. Tiam leviĝis D-ro Hale, kaj en la nomo de S-ro Barrett — kiu bedaŭrinde pro malsano ne povis ĉeesti — diris al la kongresanoj kelkajn vortojn de kora bonveno, kaj petis, ke D-ro Yemans bonvolu prezidi la kunvenojn. D-ro Yemans, okupinte la seĝon de honoro, tuj legis plan komunikon de S-ro Barrett,

THE BRITISH ESPERANTIST

The Official Organ of the British Esperanto Association.

VOL. VI. N-ro 70. OKTOBRO, 1910. PREZO 3 PENCOJ.

KOSTO DE ABONO, AFRANKITE.		ENHAVO.	
En Granda Britujo.		Kongreso Parolado de D-ro Zamenhof	200
Por unu jaro	... 3 pencoj.	La "Sesa Kongreso" en Washington	184
Unu numero	... 3 pencoj.	Sur la "George Washington"	185
EKSTERLANDE.		Norjorko	186
Por unu jaro	... 80.75 fr. 4. M. 3.	Individuismo al la Sesa?	187
Laŭ Internacia Mono	... 80.75 fr. 4. M. 3.	Zamenhof Alivana	188
Abonoj estas akceptataj de la komitato de ĉiu lando, kaj devas esti pagataj per portomandato al ĉiujlandaj monaĝoj. Sin tiri al la Sekretario, 417-17, High Holborn, London, W.C.		La Lingva Komitato	189
REDAKCIO.		Esperanto de la Laboristaro	190
Manuskriptojn, k.t.p., oni bonvole sendu al la Redakciana Komitato, 417-17, High Holborn, London, W.C.		Statistiko pri la Kongresanoj	191
Pri artikoloj la Komitato respondecas al si la rajton korekti la erarojn de stilo, k.t.p.		Niagara	192
Ordinare oni ne povas resendiri artikolojn neakceptitajn.		En Minsko	193
ANONCOJ.		Kongreso Decidaro	194
Pri Anoncoj, sin tiri al la Direkto, THE BRITISH ESPERANTIST, 417-17, High Holborn, London, W.C.		Impresoj pri Augsburg	195
		Brita Kroniko	196
		Libroj kaj Gazetaro	199
		The Board of Education and Esperanto	200
		New Members, Fellows, Examinations, F.K.I.	200

Parolado de D-ro L. L. Zamenhof

de malfermo de la Sesa Kongreso Esperantista en Washington.

Lando de liberaco, lando de estonteco, mi vin salutas! Lando, pri kiu revas kaj suspiras multaj suferantoj kaj senkulpaĵ persekutitoj, mi vin salutas. Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklesio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klines min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.

Saluton al vi, Usono, plej potenca reprezentanto de la nova mondo. Ni, filoj de la malnova kaj maljuna kontinento, venis al vi kiel gastoj; sed ne vidanta turisma enŝipigis nin, ne la espero de ia komerca akiro pelis nin al via bordo, ni venis al vi, por alporti al vi novan senton kaj novan ideon, ni venis, por alporti novan kuraĝon al tiuj niaj samidanoj kaj samideanoj, kiuj ĝis nun laboris inter vi kaj kies vortoj pri la nova popolo eble ŝajnis al vi tro fabelaj. Peco de tiu miksedevena kaj tamen lingve kaj kore unigita popolo nun staras antaŭ vi ruzo kaj vivante. Rigardu nin, ankultu nin, kaj kovrinkigu, ke ni ne estas fabelo. Ni estas divergentanoj, kaj tamen ni sentas nin kiel samgentanoj, ĉar ni

komprezas nin kiel samgentanoj, havante ninan bazeton humiligi aŭ fremdlingve balbutigi unu la alian. Ni esperas, ke dank' al nia laborado pli aŭ malpli frue la tuta mondo similigos al ni kaj farigos unu granda homa gento, konsistanta el diversaj familioj, interne apartlingvaj kaj apartmoraj, sed ekstere samlingvaj kaj sammoraj. Al tiu nia laborado, kiu celas krei ion post ion unuigitan, sekve fortigitan kaj spirite altigitan homaron, ni nun invitas vin, filoj de Usono. Kaj ni esperas, ke nia voko ne restos vana, sed ĉi baldaŭ ebe resonos en ĉiuj anguloj de via lando kaj tra tuta via kontinento.

Nur tre malmultaj el ni povis veni en vian landon, ĉar ni, Esperantistoj, ne estas homoj riĉaj; de nia nuna Kongreso ni sekve ne povas atendi gravajn decidojn, kiuj havis signifon por la tuta Esperantistaro. Ni venis al vi, Usonanoj, precipe por pasigi en via mezo kaj antaŭ viaj okuloj unu semajnon de nia Esperantista vivo, por montri al vi almenaŭ malgrandan pecon de tiu vivo, por alporti al vi semon; kaj ni esperas, ke post nia foriro tiu semo potence germinos kaj kreskos, kaj en via

kiu telegrame esprimas persone sian bedaŭron, ke pro postuloj de sia kuracado li ne povas partopreni, kaj invitas la ĉeestantan samideanaron al solena akcepto merkredon vespere en la salonego de la Internacia Oficejo, kiam li povos mem saluti ilin. Li diras, ke li estas profunde interesata pri la Kongreso kaj fidus, ke ĝi havos tre grandan Influan, disvastigante la uzadon de Esperanto tra Usono kaj tra la mondo.

Poste parolis D-ro Mybs, ano de la K.K.K. kaj vicprezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio. Li esprimas la komunan bedaŭron pro la foresto de Ĝeneralo Sebert kaj Rektoro Boirac, kaj faras proponon — aklame akceptitan — ke oni sendu al ili telegramojn de danko pri la grandegaj servoj, kiujn ili dum la pasinta jaro faris al Esperanto per sia sindonema laboro. Li prezentos en posta kunsido la raportojn, kiujn tiuj du sinjoroj komisiis al li legi en ilia nomo.

Dektri Registraraj Rerezentantoj.

S-ro Chavet havas la parolon. Li diras, ke ĉi tiu Kongreso, laŭ la vidpunkto de oficiala reprezentado, estas la plej grava, kiun la Esperantistoj ĝis nun havis. Dekdu registaroj sendis specialan delegiton. Ili estas: Brazilujo, Ekvatorio, Gvatemala, Ĥinujo, Hispanujo, Rusujo, Honduras, Kosta Riko, Meksikujo, Persujo, Urugvajo, Usono (tri reprezentantoj: D-ro Yemans

kaj S-ro Charles Stewart por la tera kaj mara militistaroj, kaj S-ro Wolcott por la departemento de internaj aferoj, kiu petis S-ron Reed verki specialan raporton por ĝia ĉiujara raporto). Ankaŭ la Usonaj Ŝtatoj Carolina, Louisiana kaj Oregon estis reprezentitaj de S-roj V. C. Dibble, J. G. Haupt kaj J. C. Cooper respektive. Poste venis al Ameriko ankaŭ plua delegito registara, sed tro malfrue por partopreni la kunsidojn -- el Japanujo. Entute do estis reprezentitaj 13 registaroj, kio klare montras, ke Esperanto estas jam akceptata ĉie kiel neŝancebla kaj utiliginda vivanta fakto. La registaroj ne kutimas sin okupi pri ĥimeroj.

Speciale kurioza por la aŭskultantaro estis la parolado, kiun faris ĥinalingve ambasadoreja sekretario Lu Ping Tien, tradukita esperanten de S-ro Osmeña el Filipinaj Insuloj. Li diris, ke li certe faros tre favoran raporton al sia registaro, kaj esperas, ke tiu decidus baldaŭ enkonduki la lingvon en la lernejojn de Ĥinujo. S-ro Mello Souza, parolante en flua Esperanto por la Brazila Registaro, diris, ke tiu jam ekutiligis Esperanton, metante en la publikaj telefonejoj kaj telegrafejoj afiŝojn en Esperanto. Kapitano Perogordo el Madrid faris la laŭte aplaŭditan sciigon, ke la Reĝo Alfonso XIII, per persona letero rekomendis la lingvon al sia Ministro de Internaj Aferoj. Kapitano Postnikov, reprezentanto de la rusa Ministrejo de

Komerco kaj Industrio, gratulis la Esperantistaron pri tio, ke ili altiris al sia afero la atenton de tiom da registaroj, kiujn la forteco kaj seriozeco de nia movado nepre baldaŭ konvinkos.

S-ro Chavet legas la multajn telegramojn kaj leterojn, salute senditajn al la Kongreso el ĉiuj partoj de la mondo. Tiajn sendis la U.E.A. Kongreso en Augsburg, S-ro Edwards en Gibraltaro, la Terruen Grupo en Hispanujo, Esp. Soc. en Simbirsk, Internacia Scienca Revuo en Kötschenbroda, S-ro Moscheles kaj la Londona Klubo, Bombay Esp. Grupo, Bohema Unio en Praha, Ĉiostudenta Asocio, S-roj Michaux, Privat, k.t.p.

Poste propono de D-ro Yemans, ke la Kongreso sendu salutan telegramon al la Prezidanto de Usono, S-ro Taft, estis aklande akceptita, kaj tiam la Majstro leviĝis por fari sian tradician ĉiujaran paroladon. Kelkminuta ovacio lin salutis. Lia trafa parolado, kiun ni presas aliloke en ĉi tiu numero, daŭris ĝis la meztaga horo, kaj estis aŭskultata kun plej granda atento kaj intereso. Ofta aplaŭdado montris, ke la ĉeestantaro plene konsentas liajn tre pravajn dirojn. Kunkantado de "La Espero," kondukata sur la piano de Prof. Querino de Oliveira el Brazilujo, finis la matenan parton de la kunsido.

Salutoj de l' Naciaj Delegitoj.

La posttagmezon oni komencis per sendo de saluta telegramo al Eksprezidanto Roosevelt, laŭ propono de D-ro Yemans, kiu diris, ke lia eminenta amiko ĵus persone sendis al li leteron, per kiu li certigis sian plenan aprobon kaj simpatian pri nia afero. La tutan ceteran kunsidon okupis la paroladoj de la diverslandaj Esperantistaj delegitoj. Dudek-tri nacioj estis reprezentitaj: Aŭstrio (S-ro Gottschall), Kroatujo (Plesche), Britujo (R. Sharpe), Skotujo (Warden), Irlando (D-ro Pollen), Kimrujo (S-ino Theodore), Francujo (Cotton), Germanujo (D-ro Arnhold kaj S-ino Hankel), Gibraltaro (Pollen), Hispanujo (Kap. Perogordo — raportita en iu gazeto kiel Pierre Gordon!), Italujo (Chavet), Malta (D-ro Yemans), Rusujo (Kap. Postnikov), Litovujo (Tabenski), Polujo (S-ino Essigmann), Svisujo (Forestier), Hindujo (Tedmann), Sudafriko (Carter), Brazilujo (Querino de Oliveira), Kanado (Geldert), Meksiko (Vualobos), Porto Riko (Negrón), Peruo (Reed), Urugvajo (Muñoz), Usono (Spillmann), Filipinaj Insuloj (Osmeña), kaj Aŭstralio Orienta kaj Okcidenta (Fryer kaj Skurrie).

Ĉiu delegito raportis tre kontentigan progresadon de Esperanto en sia lando, kaj kelkaj el la paroladoj estis agrable amuzaj. S-ro Sharpe, parolante por Britujo, aldonis ion por Torquay,

kies unikeco konsistas en tio, ke tie troviĝas 120 Esperantistoj, kiuj ĉiuj estas Esperantistinoj, kiuj ne nur sendis koregan saluton al la Majstro, sed petis, ke li ankaŭ transdonu al li por ĉiu el ili varman kison. (Por ŝpari la tempon, oni akceptis la kison kiel donitan.) D-ro Pollen, salutinte por la "Verdega Insulo," demandis, kie estus Ameriko sen la Irlandanoj, kaj ricevis laŭtan aplaŭdon kiel respondon. D-ro Arnhold faris tre belan paroladon en la nomo de Germanujo. Li parolis pri la grandaj sukcesoj lastjaraj de Esperanto en tiu lando, pri la 230 grupoj nun tie ekzistantaj, kaj sciigis, ke la Saksa Registaro komisiis lin fari specialan raporton post lia reveno hejmen. Li finis citante la belan parolon skribitan en oraj leteroj sur la granda ŝipo "George A Washington," kiu portis la Majstron al Ameriko : Ĉiam observu honestecon kaj justecon kontraŭ ĉiuj nacioj, ĉiam vivu en harmonio kaj paco. Kio pli taŭga por tio, ol Esperanto? Kap. Postnikov ankaŭ trafe parolis pri la utilo, kiun li spertis el Esperanto. Antaŭ multe de jaroj: ankoraŭ ne-Esperantisto, li vizitis San Franciskon, provizite per kelkete da nesufiĉaj anglaj frazoj. Nun, Esperantisto, li denove venas, kaj vidas tiun saman Amerikon, tiujn samajn Amerikanojn. Antaŭe ili estis por li nur objektoj; nun ili estas homoj! S-ro Reich (Novjorko) parolis por "la multaj milionoj, kiuj uzas la hebrean lingvon, kiuj eble pli ol ĉiŭ alia popolo suferas pro la monda

diverslingveco kaj diversreligieco, sed al kiuj en Esperantujo oni etendas sinceran manon de frateco kaj amikeco."

Prof. Spillmann vigle parolis en la nomo de Usono. En lia lando, li diras, oni ne timas novaĵojn, speciale kiam novaĵo estas bona, kaj li estas certa, ke Esperanto estas bona! Usono ĉiam estis kaj estos la lando de la Espero. Esperanto rapide disvastiĝas ĉi tie, kaj li ne dubas, tre baldaŭ, rezulte de la Sesa Kongreso, Usono estos la teatro de tre grava agado por nia lingvo, kies praktikeco hodiaŭ plene montriĝis. En Usono Esperanto vivadas kaj vivados, kaj tiuj standardoj (li montras la usonan kaj Esperantan flagojn fiksitajn super la estradoj) baldaŭ unuiĝos!

Post la fermo de la oficiala parto de la kunsido parolis diversaj samideanoj reprezentante kelkajn specialistajn asociojn: Kap. Postnikov por la Universala Ligo; S-ro Albert Warrington por la Teozofia Societo, kiu diras, ke Teozofio, starante kun Esperantismo sur la komuna fundamento de universala frateco, nepre laboros por nia lingvo; kaj D-ro Farred, perso el Ispahan, kiu portis specialan fratan saluton el Baha Ullah mem, la respektigata estro de la vasta Bahaja movado, kiu unuigas nun en Persujo kaj Hindujo, en amika kunlaborado por la bono, multajn milojn da Mohamedanoj, Hindoj, Parsioj, Judoj kaj Kristanoj.

Je la kvina okazis la oficiala grupfotografiĝo, sur la granda ŝtuparo de la Registara Trezorejo, kiam la kongresanaro gajhumore sin submetis al la pafado de vigla bandeto de fotografistoj, profesiaj kaj neprofesiaj. Vespere, post la longa malferma kunveno, ĉiu samideano estis preta por la anoncita "lunluma ekskurso" sur la Potomac, la trankvila kaj ĉarma rivero, kiu beligas la regionon ĉirkaŭ Washington. Feliĉe la malbona vetero, kiu unue minacis, poste cedis al la sorĉo de nia lingvo, kaj la Esperantistaro povis ĝui en plena ĝojo la kelkmejlan veturon sur la vaporŝipo "St. John," preskaŭ kvar horojn da plej agrabla ripozo.

Kunsido de la Lingva Komitato.

Mardo estis difinita al diversaj specialistaj kunvenoj. Ili okazis en la oportunaj ĉambroj, kiujn afable metis je la dispono de la Kongreso la George Washington Universitato. El la ĉefa estis tiu de la Lingva Komitato, la plena protokolo de kies kunsido aperas en la *Oficiala Gazeto*. Ĉi tie ni povas nur citi resume kelkajn el la plej komuninteresaj punktoj.

D-ro Mybs, kiu prezidis, legis la interesan raporton de S-ro Boirac pri la laboroj, kiujn faris dum la pasinta jaro la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio. Tiu raporto, poste prezentita publike al la kongreso, estas ja bona respondo al tiuj senpaciencaj, kiuj tute senbaze plendas ke ia

L.K. nenion faras. Kiel prave diras S-ro Boirac, ĝi plene montras, ke la L. K. laboradas laŭ la ĝusta vojo por la vivado de nia lingvo, kaj ke ĝi meritas konservi la konfidon de la Esperantistoj. Jen la fakoj en ĝi traktitaj: Subkomitato pri la Propraj Nomoj; Komisiono pri Teĥnika Vortaro; Komisiono pri Gramatiko; Komisiono pri Komuna Vortaro; Studkomisionoj pri Ĉiulanda Esperanta Verkaro; Projekto de Regularo pri Kronado de Verkoj; Oficiala Organo; Komisiono pri Internaj Aferoj.

S-ro Rollet de l'Isle ankaŭ legis tre interesan raporton pri la laboroj de la komisiono de la Scienca Asocio pri la Teĥnika Vortaro. Rilate al diskuteto naskiĝinta el tiu raporto, pri la dezirindeco de tio, ke vortaraj komisionoj havu ĉiam kiel eble plej diverslingvan konsiston, D-ro Zamenhof rimarkigis, ke estas ĉiam tre utile havi slavojn en lingvaj studaj komisioj, ĉar la slavoj staras iom flanke de la grandaj lingvoj, kaj povas plej bone kontroli la grandon de internacieco de iu radiko. Tre ofte oni en lingvaj laboroj akceptas vortojn aprobitajn de la plimulto, sed tamen ne bonajn, ĉar la vortoj ne estis kontrolitaj de slavoj.

Rilate al la propono de S-ino Haskel, pri sintakso de gramatiko de Esperanto pli detala ol la "Fundamento," D-ro Zamenhof opiniis, ke ni ne devas tro frue enkateni nian lingvon; ke afero, kiu hodiaŭ ŝajnas al ni bona, povas morgaŭ ŝajni

nebona kaj ke sekve pli bone estas, ke ni restu sur la fundamento de niaj deksex reguloj, kaj lasu al la lingvo ian elastecon pri ceteraj punktoj. Povas ja troviĝi dubaj punktoj. Sed ju pli oni legas bonajn verkojn, des pli solviĝas tiuj duboj.

El tiu demando pri “dubaj punktoj” leviĝis decido starigi, per kunlaborado de la diversaj kompetentaj naciaj Asocioj Esperantistaj, kvazaŭ oficialan demandaron, kiun la Majstro laŭ unuanime esprimita deziro de la ĉeestantaj Lingva-Komitatoj, konsentis respondi — ne oficiale, sed kiel gvidanto — en la paĝoj de la *Oficiala Gazeto*. Certe la tuta Esperantistaro, kiu multe bedaŭris la ĉesigon de la trafikaj Zamenhofaj respondoj en La Revuo, ĝoje salutos kaj kore dankas tiun decidon de la Doktoro, daŭrigi tiun utilan serion.

Poste, sekve de plua diskuto pri la neceseco de detala oficiala gramatiko, D-ro Zamenhof esprimis la opinion, ke “nebone estas verki gramatikojn ĉiam pli kaj pli dikaj, ĉar tiaj verkoj nur fortimigas la lernantojn. En la *Esperantisto* de la unuaj jaroj oni bone skribis Esperante, kaj tamen oni havis nur la deksex regulojn. Oni diras, ke Esperanto estas tre facila. Kiam nova varbito volas lerni la lingvon, li deziras aĉeti plej bonan libron, kaj oni donas al li la plej dikan. Li do opinias, ke la lingvo estas tiel same malsimpla, kiel la ceteraj.

Ekzemple, en kelkaj gramatikoj, anstataŭ simple montri la verbajn formojn as, is, os, tre klarajn, oni presas ĉiujn malsimplajn formojn, mi estas estinta, k.t.p., kaj la lernanto kredas, ke li devas ĉiujn parkere lerni. Li konsilas, ke la verkistoj de gramatikoj antaŭ ĉio represu la deksex regulojn, kaj diru, ke el tio konsistas la gramatiko. Poste ili aldonu komentariojn pli detalajn laŭ sia plaĉo, sed ili klare montru, ke la oficiala parto estas nur la deksex reguloj.” Tiun deziron de la Majstro plene konsentis ĉiuj ĉeestantoj.

Alia interesa kunveno estis tiu de la Esperantistaj Ĵurnalistoj. Oni tie faris la unuajn paŝojn al organizata interhelpado, per sistema interŝanĝado de propagandaj artikoloj, k.t.p., inter la diversaj naciaj Esperantistaj gazetoj. Por faciligi tion, oni ekstarigis “Internacian Gazetistan Asocion,” kiu havos du ĉefajn celojn: (1) utiligi la nacian gazetaron por Esperanto, kaj (2) utiligi Esperanton por la naciaj gazetoj. Detalojn oni povas havi ĉe S-ro Sergius Winkelmann en Dresdeno.

Okazis ankaŭ kunvenoj de Juristoj, Kuracistoj, Fervojistoj, Inĝenieroj, Flegistinoj, Katolika Unuiĝo, kaj Liberpensuloj.

Akceptoj ĉe la Registaro.

Posttagmeze la plejmultaj el la vizitantoj partoprenis en ekskurso al la belaj Kaskadoj de la

Potomac. Dume D-ro Zamenhof, la Estraro de la Kongreso, kelkaj [de] la Esperantistaj registaraj reprezentantoj kaj la naciaj vic-prezidantoj faris oficialan rondviziton al la diversaj Ŝtataj Ministrejoj. Sub la vigla kondukado de D-ro Yemans, kiu persone konis multajn el la departementestroj, ni estis akceptataj de S-ro Hale, asistanta sekretario pri Eksteraj Aferoj, S-ro Oliver, unua asistanta sek. de Milito, la fama Generalo Wood, stabestro, S-roj Ireland kaj Winter, asistantoj de la Ĥirurgiisto, S-ro Magee, sek. de la Amerika Nacia Ruĝa Kruco, S-ro Winthrop, asistanta sek. de la Maristaro, kaj S-ro Hayes, asistanta sek. de Terkulturo. Tiuj sinjoroj montris ĉiuj multe da intereso rilate al Esperanto, kies nepran utilecon ili bone komprenis, kaj sincere deziris al nia movado plenan sukceson. Precipe interesiĝis S-ro Magee en la Ruĝkrucejo kaj S-ro Hayes en la Terkultura Fako. La lasta, kies laboro ankaŭ havas rilaton kun la Edukada Fako, estis multe frapita de la progreso, kiun jam faris Esperanto en la lernejoj en Eŭropo, kaj evidentigis per siaj vivaj demandoj, ke la Esperantistoj trovas ĉe li varman aprobon kaj subtenon. Sendube la vizito al tiuj eminentuloj, kaj la propagandiloj kiujn ni disdonis al ili, faciligos ne malmulte la vojon al Esperanto en la oficialajn rondojn en Usono.

“Kiel Plaĉas al Vi.”

Pro la minacanta vetero oni iom ektimis, ke ne povos okazi unu el la ĉefaj eroj de la kongresa programo: la eksterdoma prezento de la Shakespeare-a teatraĵo "As You Like It," laŭ la bona kaj belstila traduko Esperanta de D-rino Ivy Kellerman-Reed. Vidiĝis tamen ke kredeble estos nur pluveto, kaj la kongresanoj kunvenis grandamase en la beletan bienon de la Bristol Lernejo por ĉeesti la spektaklon. Oni trovis tie scenejon ĉarme aranĝitan kiel arbaron, kio faris en la mistera duonlumo de la noktiĝo, kun la fajrmuŝetoj brilflirtantaj ĉirkaŭe, plej agrablan impreson, kaj vekis ĉe la spektatoro humoron tute taŭgan por elĝui la delikatan poeziecon de la ludo. La aktoraro, konsistanta el anoj de konata loka trupo sub la sperta direktado de Robert Nugent Hickman, ja ne havis facilan taskon ellerni en la daŭro de kvin semajnoj kaj prezenti en lingvo por ili antaŭe nekonatan, gravan teatraĵon kia "As You Like It," sed ili tiun taskon plenumis bonege kaj lerte. Ilia elparolado, kvankam ĉe kelkaj roloj iomete "amerikaneca," estis ĝenerale rimarkinde bona, kiam oni konsideras la cirkonstancojn. Orkestro de la Nordica Mandolina kaj Gitara Klubo kaj kantistoj el la Musurgia Klubo bone kunhelpis pri la belaj kantetoj, kiuj aŭdiĝas en la daŭro de l'

dramo, kaj entute la vespero estis granda sukceso tre ĝuita de ĉiu ĉeestinto. Nur la ĝuado estus ankoraŭ pli granda, se la aŭskultantaro estus povintaj sidi sur molaj kanapoj, anstataŭ sur la revon-malhelpantaj lignaj seĝoj provizitaj! La sekvintajn du vesperojn la prezentado estis malfermita al la ne-Esperantista publiko, kaj allogis multenombrian ĉeestantaron.

La Literatura Konkurso.

Je la naŭa merkredon matene, sub la prezido de S-ro Lowell, okazis la disdonado de premioj por la Kongresa Literatura Konkurso. Kvankam mankis la solena pompo kaj brilo de la famaj Floraj Ludoj Barcelonaj, la ĉeesto de la Reĝino de la Flora Kortego, S-ino Marie Hankel, igis ĉi tiun kunvenon tre ĉarma familia festeto.

Prezentite de la Majstro, ŝi diris, kiel feliĉa ŝi estas viziti Amerikon, al kiu ŝi portas de sia regnanaro trans la vasta maro multe da bondeziroj kaj milionon da salutoj. Poste ŝi prezentis la premiojn al la feliĉaj gajnintoj, multaj el kiuj, je aklamaj petoj de la ĉeestantoj, devis respondi per paroladeto. Jen la nomoj, temoj, kaj premioj: S-ro Mello Souza el Rio-de-Janeiro por poemo pri Universala Frateco, gajnis arĝentan medalon; honoran mencion ricevis Prof. F. H. Loud el Colorado Springs. Similan premion ricevis F-ino Esther Higgs el Bromley, Anglujo, por prozaĵo pri la

sama temo; honora mencio, F-ino Maisch el Philadelphia, Usono. La arĝentan medalon por plej bona rakonto originala en Esperanto gajnis S-ro H. S. Hall el Cleveland, kaj S-ro E. L. Clarke el Clarke Universitato, Worcester, U.S.A., la honoran mencion. S-ro R. T. Bye ricevis la premion por la plej bona rakonto verkita de junulo. La premio de dek dolaroj, proponita de la Washingtona Komerca Ĉambro, por la plej bona tezo pri la Utileco de Esperanto en la Komerco estis aljuĝita al S-ro W. A. Vogler en Hamburg, Germ. S-ro W. L. Church el Boston, por la plej bona tezo pri la Biblio, gajnis la premion donacitan de la Ĉefpastro de l' Usona Senato, kaj nia agema samideano S-ro James Robbie, en Edinburgo, por tezo pri "la Simileco inter Lincoln kaj Zamenhof," gajnis lukse binditan verkaron de la Majstro, prezentitan de anonimulo. La kunisido finiĝis per paroladeto de D-ro Zamenhof, kiu atentigis la gajnintojn pri la valoro — ne materiala sed interna — de la premioj, kaj esprimis la esperon, ke ĉiu premiita persono estos pro tio instigitaj al duobligita fervoro pri nia afero.

Dua Agada Kunsido.

Je la deka sekvis la Dua Agada Kunsido. D-ro Yemans komunikis al la Kongreso salutan telegramon, senditan de Prezidanto Taft: "La Prezidanto dankas vin kore pro via saluta

telegramo, kaj sendas siajn plej bonajn dezirojn por la sukceso de la Sesa Internacia Kongreso de Esperanto.” Varma aplaŭdado akceptis tiun afablan bondeziron.

S-ro Chavet legis pluajn telegramojn kaj leterojn ricevitaĵojn.

D-ro Yemans sciigis pri bedaŭrinda morto de S-ro Montt, Prezidanto de la Ĉilia Respubliko. Li proponis, ke la ĉeestantoj stariĝu por honori lian memoron. Li aldonis, ke pro tiu funebro, la anoncita akcepto, farota al la kongresanoj de S-ro John Barrett en la Oficejo de la Amerikaj Respublikoj, ne povos okazi.

D-ro Mybs kiel ano de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, nun prezentis, en la nomo de ĝia prezidanto Generalo Sébert, raporton pri la agado de tiu komitato dum la pasinta jaro. La plej grava parto de tiu raporto (plene publikigota en la *Oficiala Gazeto*) rilatis al la Internacia Financa Konsilantaro, kiun laŭ decido de la Kvina Kongreso en Barcelono la K.K.K. devis ekstarigi kaj priraporti al la Sesa Kongreso. La raporto sciigis, ke ĝis nun elektis siajn reprezentantojn al tiu Konsilantaro Aŭstrio, Belgujo, Britujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Rusujo, Svisujo kaj Usono. La K.K.K. nun opinias, ke ĝia tasko, en la starigado de la I.K., estas preskaŭ finita. Ĝi ricevos kaj publikigos nomojn de pluaj konsilantoj, ankoraŭ

ne elektitaj, sed lasos al la Konsilantaro mem la zorgon entrepreni sian propran organizadon kaj organizi sian funkciadon. Tamen, por helpi la komencon de tiu laboro, Generalo Sébert, kiel Prezidanto de la K.K.K., proponas, ke la Kongreso esprimu pri la afero siajn dezirojn. Oni trovos tiujn deziresprimojn, kiujn la Kongreso unuanime aprobis, ĉe la fino de ĉi tiu raporto, en la Oficiala Decidaro de la Kongreso. [Red.— Ne necesas aperigi tiun Decidaron.]

Poste presentiĝis diverslandaj invitoj pri la loko de la estontaj Esperantistaj Kongresoj. S-ro Postnikov, prezidanto de la Rusa Esperantista Ligo, memorigis, ke la unua Rusa Esperantista Kongreso decidis proponi, ke la Internacia Kongreso en 1912, 25-jara jubileo de la lingvo, okazu en Ruslando. La rusoj diros en Antverpeno, kiun urbon ili definitive elektis el la multaj, kiuj taŭgas por tiu celo. Rilate al tio S-ro Chavet sciigis, ke la K.K.K. antaŭ jam unu jaro ricevis proponon, ke la Oka Kongreso okazu en Krakovio, kaj ke la sama propono estis antaŭ nur du monatoj plue farita de la Unua Esperanto-Tago en Vieno, kies tri prezidantoj estis unu pola, unu bohema, kaj unu germana.

Inviton pri la Kongreso de 1913 prezentis S-ro Chavet en la nomo de la Itala Esperantista Federacio. Li diris, ke akcepto de tiu invito nepre

multe vigligos nian movadon en tiu bela lando. S-ro Georges Warnier, parolante en la nomo de la Parizaj samideanoj, invitas la Esperantistaron kongresi en 1914 en Parizo, okaze de la grava internacia Esperantista festo, kiun la tieaj samideanoj projektas por tiu jaro, kaj kiu certe kunvenigos multege da Esperantistoj el ĉiuj landoj.

D-ro Mybs, vicprezidanto de la L.K. kaj ĝia Akademio, prezentas al la Kongreso la jam aluditan raporton de S-ro Boirac pri la agado de tiuj du institucioj. Laŭ lia propono la ĉeestantaro leviĝas je la honoro de la Lingva-Komitatoj — kaj laŭ propono de D-ro Zamenhof je la honoro de ĉiuj Esperantistoj — mortintaj dum la jaro. Fine, komunikinte la dezirojn esprimatajn en la L.K. kunveno, li proponas je ĉies aplaŭdo, ke la Kongreso danku S-ron Boirac por lia raporto kaj esprimu sian plenan konfidon al la Lingva Komitato. Tiun proponon, subtenitan de D-ro Pollen, la ĉeestantaro aklame aprobis.

D-ro Yemans legis interesan leteron de la Prezidanto de Agada Komitato por la Universala Ekspozicio, kiu okazos en Novjorko en 1913. Tiu sinjoro sciigis, ke okaze de tiu Ekspozicio kunvenos reprezentantoj el ĉiuj parlamentoj de l' mondo, kun celo fari leĝojn pri internacia paco. Ĉar Esperanto estas tre facile lernebla kaj uzebla, li

proponas, ke oni klopodu por interesi pri Esperanto la partoprenontojn kaj se eble instruu ilin pri la lingvo. Li sugestis, ke oni aranĝu je la sama okazo kongreson de Esperanto en Novjorko.

Esperanto ĉe la Laboristaro.

Post fermiĝo de la oficiala parto de la kunsido, ricevis la parolon S-ro Frank Morrison, Sekretario de la Amerika Federacio de Laboro, grava ligo kiu kunigas la Meti-unuiĝojn de pli ol du milionoj da Usonaj laboristoj. Li venis al la Kongreso speciale por konstati, ĉu efektive Esperanto havas praktikan valoron. Tio, kion li vidis, kaj la tuja kompreniteco kaj entuziasma akcepto de lia parolado, frazon post frazo tradukita Esperanten de la skribanto, sufiĉis ja por konvinki lin. [...Red. — *la laŭvorta transskribo de la parolado ne aperas ĉi tie*]

La posttagmezo estis difinita al ekskurso al Mount Vernon, la hejmo kaj tombejo de George Washington. Bela vetero — agrable varma, sed tute ne tro varma — favoris la kongresanojn, kiuj trovas tre interesa la malnovan domon, ĉarme lokitan sur altaĵeto apud la Potomac. Ĝi estas tipo de la prastila Sudusona planteja biendomo, kun speciala ejo por la sklavaro, kiun oni en tiu epoko kutimis posedi. La domo estas nun konservata de la Usona Registaro. Ĝi estas atingebla aŭ per elektra rapida veturanta tramo aŭ rivere per

vaporŝipo. Kelkaj el ni, interŝanĝante kun aliaj samideanoj la biletojn, povis ĝui ambaŭ vojojn, kaj trovis speciala ĉarma la revenon laŭ la belaj bordoj de la Potomac.

Vespere tiu senlaca propagandisto, S-ro Riĉard Sharpe el Torquay, faris, laŭ speciala peto de multaj amerikaj samideanoj, anglalingvan paroladon pri la

norma

elparolado de

Esperanto. Kiel

bone scias niaj

legantoj, S-ro

Sharpe estas

kvazaŭ

specialisto pri tiu

temo, kiun li ofte

priparolis kun la

Majstro, kaj la

usonaj amikoj

trovis liajn

rimarkojn plej instruaj kaj utilaj, montrante sian intereson poste per viglega pafado de demandoj.

“Basbalo”

Multaj Esperantistoj — inter ili la Majstro — iris posttagmeze por vidi la “basbalan” konkurson inter la Cleveland kaj Washington ludistaroj. La misteroj de tiu nacia ludo, kiu vekas la

entuziasmegon de multmiloj da junaj kaj maljunaj sportistoj tra tuta Usono, estis klarigitaj detale en Esperanta libreto speciale eldonita de la konata firma Spalding, tre lerte tradukita de iu pseŭdonomita “Erik.” S-ro T. S. Rice, sportredaktoro de la *Washington (D. C.) Times* diras tie, ke “ĉiu Esperantisto devus koni ‘basbalon,’ ĉar nenio tiom helpas al la kreskado de

lingvo, kiel tiu ludo.”

Efektive, oni povus tion kredi, legante pri la florema slango uzata de ĝiaj adeptoj, kiu igas raporton pri la ludo tute nekomprenebla por la profanulo. Evidente la ludo postulas grandan

lertecon kaj fortikecon, kaj oni diris al mi, ke plej bona profesia batisto aŭ ĵetisto povas gajni ĝis 1,000 dolaroj en monato. Unu estis eĉ tiel populara, ke li povis stariĝi kiel reprezentanto por sia ŝtato en la Usona ĉefparlamento. La spektatoroj pro sia entuziasma tintilsonorado kaj strangaj blekoj de ĝojo aŭ malaprobego,



FIRST GROUP—At the Ball Game. Left to Right: Col. Pollen, William Mann, Mme.

UNDA GRUPO—Ĉe la Stacia Pilkado. Legantoj dekstren: Kolonelo Pollen, William Mann.

memorigis min iom pri la ĉeestantoj en la batalo de toroj en Barcelono. Certe la ludo devas esti tre interesa kaj alloganta, kiam oni funde ĝin komprenas, sed persone, post duonhoro da rigardado, mi jam "havis sufiĉe," kaj foriris al la "Marista Kazerno" por ĝui la bonegan muzikon de la Marista Orkestro, unu el la plej famaj muzikistaroj en Usono, ĉe kiu speciala lokaro estis rezervita al la Esperantistoj.

Dum la vespero S-ro Chavet el Parizo, kvazaŭ heroldo por "la Sepa," faris paroladon kun lumbildoj pri Antverpeno. Lia interesa parolado, kaj la bele presita kaj ilustrita broŝuro pri tiu urbo, kiun disdonigis la belgaj samideanoj, certe logos al Eŭropo proksiman jaron grandan amason da Usonaj amikoj. Paroladis ankaŭ Prof. Spillman pri "Videbla Parolado," scienca sistemo kiu celas priskribi por surduloj la parolsonojn per speciale formitaj literoj. Tiun sistemon verkis Prof. A. Melville Bell, patro de la elpensinto de la telefono. Oni povas ricevi detalajn sciigojn ĉe la Volta Bureau en Washington (D.C.).

Kunsido de l' U.E.A.

De la 9a ĝis la 10a horo estis dediĉita al agadaj kunsidoj de la diversaj distriktoj de la Esperantista Asocio de Nord-Ameriko, por elekti konsilantojn. Je la 10a horo okazis ĝenerala kunsido de la

Universala Esperanto-Asocio, en la salonego de la Hotelo Arlington. Pastro P. Hoffman (Del. Baltimore) prezidis. S-ro Schubert (Del. Washington) legis salutan leteron de S-ro Hodler, Vicprez. de U.E.A., kiu donas informon pri la lastjara progreso de U.E.A., kaj sciigas la opinion de la komitato, ke U.E.A. devus starigi en Usono centran oficejon, kun kiu korespondus rekte ĉiuj delegitoj Amerikaj, kaj kiu estus la centro por tiu kontinento. La cetero de la kunveno fariĝis kvazaŭ propaganda, laŭ propono de S-ro Warnier el Parizo, kiu diris, ke ĉar la duono de la ĉeestantoj ne estas ankoraŭ Esperantianoj, bone estus doni al ili kelkajn klarigojn pri la celo, kresko kaj agado de U.E.A. Li poste do montris per trafa parolado la grandan praktikan utilecon de tiu Asocio, kaj ĝian pli kaj pli rapidan sukceson. Li finis invitante ĉiujn ankoraŭ ne aliĝintojn, aliĝi al U.E.A.

Paroladis ankaŭ S-ro Hodges, konata ĵurnalisto, kiu sub la pseŭdonimo de "La Optimisto" regule skribas multe ŝatatan artikolon en la tre disvastiĝinta gazeto Filadelfia, *North American*. Li sprite kaj kortuŝe rakontis, angle, kiel li konvinkiĝis, ke Esperanto, la lingvo de l' Optimismo, estas la ideala lingvo por internaciaj rilatoj. Lian paroladon, varme aplaŭditan, tradukis po-fraze la skribanto. (Unu el la plej interesaj incidentoj de l' Kongreso estis la neformala

kunveneto, kiun oni aranĝis la antaŭan vesperon por amike akcepti S-ron Hodges inter la naciaj delegitoj. La senĉesa kaj viglege viva babilado kaj ŝercado inter la dudeknacia ĉeestantaro, kaj la spritaj demandoj kaj respondoj, kiun pere de tradukoj faris al ĝi la "Optimisto," nepre estus konvinkinta la plej malmolege stultan nekredemulon pri la ĉiotaŭgeco de Esperanto).

Kelkaj vortoj de D-ro Zamenhof, kiu salutis al ĉeestantajn Esperantianojn kiel "kamarado en U.E.A.," finis la kunvenon. La dua kunveno, kiu okazis la sekvintan tagon, estis difinita tute al akcepto aŭ diskuto de la multaj presitaj kaj disdonitaj raportoj, voĉdonitaj en Aŭgsburg.

En la Oficejo de l' Amerikaj Respublikoj.

Ni jam diris, ke la anoncita akcepto de S-ro Barrett, Prezidanto de la Esp. Asocio de Nordameriko, al la Esperantistoj ne povis oficiale esti farata, pro la subita morto de Prezidanto Montt. Oni poste tamen sciigis ke S-ro Barrett faros akcepton neoficialan kaj kvazaŭ privatan. La tuta kongresanaro do iris jaŭdon vespere al la loko difinita, la Internacia Oficejo de Amerikaj Respublikoj, kies estro S-ro Barrett estas. La Oficejo kies koncepton oni dankas al S-ro Roosevelt, estas konstruaĵo rimarkinde bela kaj

imponanta. Enirinte tra la masivaj pordegoj oni troviĝas antaŭ ĉarma meksika *patio* [teraso – Red.] malfermata al la ĉielo.

Meze de arta baseno ŝprucas elektrekolorita fontaneto, kaj ĉe la anguloj de la korto kreskas aro da ombrantaj palmoj kaj diversaj arboj, po unu el ĉiu lando Amerika. Ambaŭflanke de tiu *patio*, larĝa marmora ŝtuparo kondukas supren ĝis vasta ĉefsalonego. Ĉe ties eniro staris S-ro Barrett kaj kun bonkora rideto kaj kelkaj afablaj vortoj bonvenigis la Majstron kaj la samideanojn. Preteririnte la belege ornamitan halegon oni alvenis en flankan ĉambreton, kie elegantaj lakeoj servis delikatajn refreŝigaĵojn. Poste oni estis libera trapromeni kaj rigardi la vidindaĵojn de la Oficejo: konsiliĝejon, kun ĝia grandega ovala tablo, ĉirkaŭata de la riĉe blazonitaj seĝoj, po unu por ĉiu respubliko; la balkonon kaj terasojn, el kie oni havis sorĉe belan vidon trans herbejoj ĝis la lunlumata Potomac; la mirindan reliefigitan mapegon de Ameriko... Etektive, la Oficejo estas inda monumento al la spirito de internacia arbitracio, pro kiu ĝi konstruiĝis kaj kiun ĝia funkciado helpas praktike efektiviĝi.

Vendredon, la 19an.

La fruan parton de vendreda mateno la pli laboremaj kongresanoj pasigis ĉe specialistaj kunvenoj, el kiuj tiuj de l' pacifistoj, instruistoj kaj

la teozoj kolektis plej multe da ĉeestantoj. Kunsidis ankaŭ, sed malpli multenombre, la financistoj kaj poŝtovicistoj. Persone mi povis ĉeesti nur la tre sukcesan teozofan kunvenon, sed amikoj, kiuj ĉeestis aliajn kunvenojn, diris ke en ĉiuj oni havis tre interesan kaj amikan diskutadon.

Posttagmeze je la kvina okazis festeto, kiu estis plua signo de la aprobo, kun kiu la Usona Registaro rigardas nian movadon. S-ro Huntington Wilson, unua adjunkta sekretario de l' Departemento de la Ŝtato, kiu pro la foresto de l' Prezidanto kaj la Sekretario de l' Ŝtato estis la plej altranga oficisto en Washington, kun sia edzino faris neformalan akcepton al la Estraro de la Kongreso kaj la diversaj naciaj delegitoj. Ĉeestis ankaŭ kelke da personoj el la naciaj ambasadorejoj en Washington. Estis bona okazo por propagando, kaj dum oni trinketis teon kaj manĝetis kuketojn laŭ la ĝentila maniero deca ĉe tiaj ceremonietoj, oni klarigis al iliaj diplomatiistaj moŝtoj la ĉarmojn de Esperanto kaj la Esperantismo. Por tio tre utilis la multlingveco de nia Esperantista delegitaro, ĉar mi persone aŭdis vivajn babilojn en angla, franca, germana kaj hispana lingvoj. Tiu denova kvazaŭ oficiala rekono pri la akceptindeco de Esperanto estis gracia ĝentilaĵo, kiun la Esperantistoj multe ŝatis.

La Internacia Balo.

Unu el la plej agrablaj okazoj de Esperantista Kongreso estas la internacia balo, al kiu la gejunuloj — kaj kiu Esperantisto, almenaŭ spirite kaj temperamente, ne estas juna! — sin dediĉas kun tiom da fervoro, kiom al la propagando. Kompreneble do la gaja dancado, kiu havis lokon vendredan vesperon en la bela salonego de la “Arlington,” estis tre granda sukceso. Mankis ja la belaj naciaj kostumoj, kiujn oni vidis en Cambridge kaj Dresden, sed tio ne malhelpis la dancadon! Oni vidis tamen ne malmulte da uniformoj, Kolonelo Pollen portis sian kutiman miksidevenan kaj moŝtegan vestaĵon; kiel Reĝo de Esperantolando, la longega S-ro Baff paŝadis simbole tien-ĉi-tien en la “stelstrioza” kostumo de “Onklo Sam,” kaj la sinjorinoj portis robojn, kiuj estis konstanta plezuro por la okulo. La programo, kiu laŭ Usona kutimo konsistis preskaŭ ekskluzive el dutempoj kaj valsoj, estis iom aventuroplena por la Eŭropanoj. La dutempo tute ne estas tiel facila, kiel ĝi ŝajnas, kaj la valso estas nur dutempo alivestita. Se la kompatinda alilandulo trovis usonaninon kun... simpatiaj piedoj, bone; se ne... Pli sendanĝere estis danci kun samlandanino! La du solaj alispecaj dancoj, la “Virginia Reel” kaj la “Filipina Danco,” havis nomojn, kiuj antaŭvidigis ion novan, sed la unua estis simple nia “Roger de

Coverley” kaj la alia – ja tre bele kaj gracie dancita de ok paroj de junaj filipinoj, estis simple la “Kvadriloj”! Sed malgraŭ tio la vespero estis plene ĝojiga, de la solena Parada Promenado, kiu ĝin komencis kaj en kiu partoprenis egale junuloj kaj nejunuloj, ĝis la lasta rapida valso. La muziko, ludita de anoj de la fama "Marine Band," estis sufiĉe vigliga kaj rapidiga por kontentigi eĉ la plej Usona antaŭeneman samideanon, kaj la manĝaĵetoj servitaj mezvespere estis bonegaj. Multe aplaŭdita kantado de S-ino Williams estis plua ĝojo en ĉiel agrabla festo.

La Solena Ferma Kunsido.

La Ferma Kunsido okazis je la deka sabaton matene en la granda salono de la hotelo. D-ro Yemans prezidis. Li diris, ke neniu povas dubi pri la granda sukceso de la Kongreso: neniam antaŭe ni vidis inter ni tiel multe da registaraj delegitoj. Ni ŝuldas dankon al ĉiu, kiu helpis kaj prizorgis la Kongreson: al la Gemajstroj kaj la eksterlandaj amikoj, kiuj multenombre venis tiel longan vojon; al la ĵurnalistoj, kiuj tiel afable raportis pri la Kongreso; al S-ro Reed kaj la Loka Komitato pro ilia senlaca klopodado.

S-ro Chavet legis la telegramojn plue ricevitaĵojn. Salutis la Kongreson — parolante Esperanton por la unua fojo — delegito de la Meksika registaro, kaj deziras al nia afero plej grandan sukceson.

S-ro Cooper, en la nomo de la Ŝtato Oregon, kaj poste S-ro Haupt, en la nomo de la Panam-ekspozicia Komitato, proponas, ke la Esperantistoj kunvenu por sia Internacia Kongreso en 1915 en New Orleans, okaze de la granda ekspozicio, per kiu oni en tiu dato intencas festi la malfermon de la Panama Kanalo. Festante la forigon de grandega baro fizika, oni samtempe festu la forigon de la spirita baro de la lingvoj.

Ilin sekvas S-ro Lewis, kiu en bela kaj elokventa parolado proponas, ke la Kongreso de 1915 okazu en San Francisco. En tiu multnacia urbo, belege lokita apud la Pacifika Maro, ja intertuŝas la Oriento kaj la Okcidento, kaj la "Golden Gate" estas kvazaŭ centra trairejo por Eŭropo, Ameriko kaj Azio.

Poste parolas S-ro G. Dawes, kiel reprezentanto de la Suda Komerca Kongreso. Li subtenas la proponon de S-ro Haupt, kaj en la nomo de la Komisiono en New Orleans invitas la Esperantistojn kongresi en la fama "Kvaronluna Urbo" apud la Meksika Golfo.

D-ro Yemans, dankante pro tiuj diversaj invitoj de ne-esperantistaj korporacioj, rimarkigas, ke ilia multenombro bone montras, kiel multe pligraviĝas kaj prosperas nia movado.

S-ro Joaquim Bernardo Calvos, registara delegito

de Kosta Riko, salutas la Kongreson. Lia Registaro tre ŝatas la honoron de la invito sendi reprezentanton al la Kongreso, kaj rimarkas kun kontenteco la grandan progreson, kiun faras Esperanto.

S-ro Chavet raportas pri diversaj proponoj ricevitaĵoj de la K. K. K.: (1) Propono de la Holanda Esperantista Societo, ke la membroj de la Lingva Komitato estu elektataj de la Organizitaj Esperantistoj en la koncernantaj landoj;(2) propono de S-ro Warrington pri Ligo pri Monda Federacio; (3) propono de S-roj Twombly kaj Scott, ke oni sendu esprimon de respekto al Pastro Schleyer, elpensinto de Volapük, kaj ke oni nomu ĉi tiun Sesan Kongreson la Naŭa Internacia Kongreso, pro tio, ke okazis antaŭ la niaj tri kongresoj de Volapük.

Li sciigis, ke la unuan proponon la K.K.K. decidis transsendi al la esploro de la Lingva Komitato, kiu cetere jam ricevis similan proponon de la Germana Esperantista Asocio.

Pri la tria, li sciigis, ke la K.K.K. proponas al la Kongreso jenan decidon: ke ne konvenas nomian Sesan Kongreson la naŭa internacia, kaj plue, ke ĉar la Majstro en sia parolado en Bulonjo jam esprimis per tre altaj kaj belaj vortoj la estimon kaj dankon de ĉiu Esperantisto al la eminenta elpensinto de Volapük, kaj ĉar la *Esperantisto*

ĉiam konservis tiun estimon, ne ekzistas sufiĉa motivo por speciala esprimo nuna pri ĝia renovigo.

Ĉe ĉi tiu punkto D-ro Zamenhof stariĝas kaj diras: "Pri la ĵus farita propono permesu al mi diri kelkajn vortojn. Mi ne scias, ĉu S-roj Twombly kaj Scott deziras, ke ni ĝuste nun sendu telegramon; sed pri unu afero mi estas certa, nome ke nia sincera amo al Abato Schleyer estas konstanta. Neniu pri tio dubas." (*Varma aplaŭdo.*)

La duan proponon legas S-ro Warrington, jene: "La Sesa aŭdis kun plezuro, ke la Usona 'Congress' (Parlamento) ĵus adoptis rezolucion, ke la Prezidanto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj nomu komisionon de kvin personoj rilate al universala paco, kaj ke tiu rezolucio devenis de la Ligo por Monda Federacio en Novjorko, kiu ĝin antaŭenpuŝis ĝis sukceso." D-ro Yemans subtenas, kaj la ĉeestantaj unuanime aprobas la proponon.

Statistiko pri la kongresanoj.

S-ro Chavet donas interesan analizon pri la nombro de la kongresanoj. Li diras, ke enskribiĝis entute 357 membroj. Tiu statistiko tamen estas sensignifa sen interpreto. El la aliĝintaro 274 estas usonanoj, de 35 diversaj ŝtatoj el la tuta 46. Kiam oni konsideras, ke Usono enhavas dekoble malpli da Esperantistoj ol Eŭropo, sur teritorio egale

granda kaj tial kun egala malfacileco de vojaĝado, kaj ke Esperantistan Kongreson en Eŭropo ĉeestas mil Eŭropanoj, oni vidas, ke por konservi egalan proporcion en Ameriko bezonas nur 100 ĉeestantoj. Tial oni devas esti tre kontenta, ke kunvenis ne nur cent, sed pli ol tricent! Da Eŭropanoj, estis 62; el Ameriko eksterusona, 17. Entute, 23 nacioj estis reprezentitaj.* [*Jen kelkaj detaloj: el Usono, la Distrikto Columbia (kie okazis la Kongreso) sendis 59 anojn; La Ŝtato Novjorko 28; Ohio kaj Massachusetts po 18, Maryland 15. El la pli malproksimaj Ŝtatoj, Kalifornio sendis 4, Washington 2 (estas almenaŭ 20 lokoj kun nomo Washington en Usono!), Colorado 2, Kansas, Nebraska, k.t.p., po 1. La 17 ne-usonaj Amerikanoj venis el Brazillando, la Filipinaj Insuloj, Meksiko, Peruo, Portoriko, Urugvajo, Kanado. El la Eŭropanoj, Francujo sendis 17, Anglujo 14, Hispanujo 9, Germanujo 7, Rusujo 5, Polujo 3, k.t.p. Afriko donis 1, Aŭstralio 2, kaj Ĥinujo 2.)]

S-ro Francisco Sanchez Latour, registara delegito de Gvatemala, kiu ĝis nun ne povis ĉeesti, salutas la Kongreson. Li diras, ke vojaĝinte tra Eŭropo, li ofte povis nur malfacile komprenigi sin. Li esperas, kaj eĉ povas antaŭdiri, ke post malmultaj jaroj ĉiu uzos Esperanton por siaj rilatoj kun aliaj landoj. Estas granda honoro por li reprezenti sian registaron ĉe la Kongreso, kaj li faros ĉion eblan

por helpi al siaj samlandanoj la lernadon de la nova kaj tiel utila lingvo.

Alproksimiĝas nun la fino de la kunsido. S-ro Warnier leviĝas por esprimi la koran dankon de la Eŭropaj kongresanoj al la Usonaj samideanoj pro ilia tre gastama akcepto. Li esperas, ke tiu unua Amerika Esperantista Kongreso Internacia rezultigos progreson eĉ pli grandan, ol sekvis la kvin antaŭajn Kongresojn en la respektivaj Eŭropaj landoj. Kaj li fine certigas ilin, ke ĉiu Amerikano — kaj ili estu multaj! — kiu venos al Antverpeno la proksiman jaron, trovos tie la plej koran kaj varman bonvenon. (*Aplaŭdado.*)

S-ro H. D. King (Novjorko) proponas, je aklama akcepto, ke la Kongreso danku S-ron Charles L. Tate kaj Pastron Smiley, kiuj sukcese klopodis por enkondukigi Esperanton per speciala leĝo en la publikajn lernejojn de la Ŝtato Maryland.

Prof. Spillman proponas, kaj la Kongreso unuanime akceptas, danki S-ron Osmeña el Filipinujo kaj ĉiujn oficistojn de la Organiza Komitato de l' Kongreso.

S-ro Chavet, konstanta sekretario de la Kongresoj, legas la Kongresan Decidaron. La plej gravan oni trovos detale ĉe la fino de ĉi tiu raporto [Red. - ne aperas].

D-ro Yemans esprimas sian ĝojon, ke la Kongreso

havas tiel bonan kaj kapablan sekretarion, kiel S-ro Chavet, kiun en la nomo de la Kongreso li kore dankas pro lia lerta kaj energia laboro. (*Aklama aplaŭdado.*)

S-ro Edwin C. Reed, kiel Loka Sekretario de la Kongreso, proponas dankojn al la Prezidanto de la Kongreso, S-ro John Barrett, por la helpo, kiun li donis pri la akceptigo de nia lingvo en oficialaj rondoj: al la Vicprezidanto, D-ro Yemans, kiu tiel lerte kondukis la kunsidojn; al la kvar Esperantistaj Policianoj, kiun la Policestro difinis por nin servi dum la semajno; al la organizintoj kaj geaktoroj de la teatra prezento de "Kiel Plaĉas al Vi," kaj fine al la organizintoj kaj ludintoj de la Basbala Ludo. Tiun dankaron la ĉeestantoj aklame aprobis.

Ferma Parolado de l' Majstro.

Nun leviĝas la Majstro por fermi la Kongreson. Li diras: "Laŭ la tradicio de niaj ĝisnunaj Kongresoj, mi permesas al mi diri kelkajn vortojn de adiaŭa saluto. Mi volas diri kelkajn vortojn pri la semajno, kiun ni ĵus travivis. Kiam mi decidis veni al Ameriko, mi konfesas, ke mi komencis mian

vojaĝon kun iom da dubo. Ŝajnis al mi, ke Usono estas ankoraŭ tro juna en nia movado por fari Kongreson. Oni devis tamen subteni niajn Usonajn amikojn, kaj kiam mi venis, mi vidis kun ĝojo, ke miaj duboj estis vanaj. La Sesa estis sama kiel la aliaj Kongresoj kaj restos en nia memoro same. Mi devas esprimi mian dankon al ĉiuj helpintoj,

speciale al Gesinjoroj Reed — ĉion vi vidis, mi do ne ripetas — ankaŭ al ĉiuj, kiuj helpis. Krom tio, ni ŝuldas dankon al la lando mem, por la invito, kiun faris la Usona Registaro al aliaj landoj. Estas tre grava fakto, ke 13 Registaroj estis oficiale reprezentitaj. La lokaj aŭtoritatoj ankaŭ montris al ni grandan helpon, kaj en via nomo mi ilin kore dankas.

"Nun ni rigardu, ĉu la Kongreso donis iajn rezultatojn. Pri tio

neniu dubas. La rezultatoj estos tre gravaj. Ĝi forte levos la prestiĝon de nia afero en la okuloj de la mondo. Kaj ankaŭ al multaj el niaj Usonaj amikoj, kiuj ankoraŭ ne havis la okazon aŭskulti Esperanton parolatan de alilanduloj, la Kongreso sendube multe helpos pri la elparolado de nia lingvo. Mi estas certa, ke kiam ni ilin revidos, ni ne plu rekonos ilin, sed demandos pri ili, el kiu nacio



ili venas? Kaj nun, ĉar ni devas disiri al niaj hejmoj, al ĉiu mi diras: Feliĉan vojon! Feliĉan vojaĝon! kaj esperas, ke mi vidos grandan parton el vi en Antverpeno. " La Sesa Kongreso estas fermita."

Kaj post kantado de "La Espero," fortepiane kondukate de S-ro Richard Sharpe, oni disiĝas — ĝis revido en Antverpeno...

Sed la Kongreso ankoraŭ ne tute pasis. Posttagmeze okazis agada kunsido de la Esperantista Asocio de Nordameriko, kaj vespere D-ro Pollen, antaŭ granda aŭskultantaro en la salonego de la "Arlington," faris anglalingve propagandan paroladon: "Ĉirkaŭ la Mondo kun la Verda Standardo." Liaj interesaj kaj tiel diverslandaj spertoj certe konvinkis multe da ne-Esperantistoj al varbiĝo en niajn rangojn.

Kaj tiel finiĝis la Sesa...

Kelkaj Impresetoj.

— Kaj pri Washington mem? — oni eble demandos, Ĉu tiu urbo pli plaĉis al vi, ol tiu socia enigmejo Novjorko?

— Jes. Ĝiaj belaj arbkovritaj placoj kaj parkoj, ĝiaj noblaj publikaj konstruaĵoj, ĝiaj elegantaj domoj kaj trankvilaj aleoj multe kvalifikis la impresojn, kiujn mi ricevis en Novjorko. Precipe mian koron ĝojigis la digna kaj vasta plano, laŭ kiu oni antaŭprojektis la iom post ioman kreskadon de la

komunumo. Kiam la tuto plenumiĝos, Washington estos la plej bela urbo en la mondo. Mi klare konstatis, ke almenaŭ en sia ĉefurbo la Usonanoj volas havi tipon de tiu spirito de libera kunlaborado kaj solidareco, kiu espereble en ia estonta tempo disvastiĝos tra la tuta homa socio. Sed ĝis tiu ora epoko la spirito de Washington kaj la spirito de Novjorko multe interbatalos. Tamen ia enmaskita instinkto de optimismo diras al mi, ke Washington venkos...

Nebezzone estas, ke mi priskribu ĉion vidindan, kio nin tie plezurigis. Nur du-tri tipajn objekton mi volas rimarkigi kiel simbolojn de la granda socia malvolviĝo, kiu en Washington ellaboriĝadas: la gracie majesta Kapitolo, el kie radias spiritaj vojoj al la konsiliĝejoj de kvardek-ses ŝtatoj; la mirinde elpensita kaj organizita Nacia Biblioteko, kie estas trovebla kvazaŭ tuj ekzemplero de preskaŭ ĉiu iel grava libro en la mondo; la belega drenakirita "Marista Promenejo" apud la plorantaj salikoj de la rivero, kies akvoj kaj marĉejoj iam regis nedisputate sur ĝia loko; kaj fine tiu brilanta blanka obelisko, ĉiame loganta alten la rigardo, simpla, vasta kaj frapanta kiel la Vero... Kaj pri la ceteraj belaĵoj de la urbo, ĉu ne staras skribite en la "Libro de l' Kronikoj," kiun pretigis Esperantiano Schubert, kaj kiun recenzas Lia Recenzista Moŝto A. E. W. sur alia paĝo?

— Kritikoj pri la Kongreso ? Nu... Efektive, mi estis tiom okupata per la kongresaj laboroj, kaj la kaptado de notoj por ĉi tiu gaja rakonto, ke mi ne povas diri, ĉu estis io kritikinda! Persone, mi nenion malagrablan spertis. Kiel loĝejo, la "Arlington" estis bonega; bonega ankaŭ kiel oficiala babilejo ĝi estis, ankaŭ kiel kunvenejo ĝenerala. La Akceptejo, dank' al la sindonema kunhelpado de lokaj samideanoj kaj samideaninoj, glate funkciis, la Librovendejo sub la lerta direkto de l' netrudema sed laboreganta amiko Arthur Baker kaj la helpantino enkasigis bonan monon por sistema propaganda, kaj... kio restas por kritiki? se vi esceptas nur la Centran Manĝejon... kiu ja, pro la nesufiĉeco de la bonhumoraj sed nur home kapablaj negraj kelneroj, ne ĉiam povis nin servi tiel rapide, kiel postulas Esperantista apetito. Sed la Centra Manĝejo estis almenaŭ ne kara, kaj la estro faris sian eblon por kontentigi la specialan deziron de dudek mildmanieraj vegetaranoj! Kaj jen vi havas ĉion!



Al Niagaro.

Dimanĉon matene, multaj el ni Eŭropanoj — interalie D-ro kaj S-ino Zamenhof — ekveturis per frua vagonaro al la fama akvofalego. Kiu ja forlasus Amerikon, ne vidinte tion? Nia kompanio

estis duone tiu sama, kiu venis Novjorkon sur la "George Washington": D-roj Mybs kaj Arnhold, S-ro Winkelmann, S-ino Thiard, F-inoj Jahns, S-ino Essigmann, S-ro Chauveau, kaj mi mem. La veturo estis tra belega montetara pejzago. El la observa vagono oni povis bonege ĝui la rimarkindaĵojn de la vojo, kiu dum multaj mejloj iris laŭ la pitoreskaj bordoj

de la Susquehanna Rivero. En Buffalo, kien ni alvenis post tuttaga vojaĝo, ni devis forlasi nian komfortan "Pullman" kaj atendi inter grandega amaso da kolektiĝintaj ekskursantoj alvenon de la speciala vagono por Niagara Falls. Ĝi estis plene, kaj nur malfacile oni trovis lokojn.

Negrave, ni iel alvenos! Kaj tra la krepuska duolumo ni ekiras laŭ la bordo de la larĝega defluo el Lago Erie, tra kampoj, trans pontoj, eĉ

laŭ la mezo de la ĉefaj stratoj, ĉiam kun la melankolia sonorado de la lokomotivo en niaj oreloj, ĝis pli granda bruo kaj brilo anoncas Niagara. Iom da marĉando kun tro ekspluatemaj hotelestroj, laviĝo, vespermanĝo, kaj ni denove eliras, avidaj por vidi la Falegon. Kelkminuta promeno, kaj ni staras sur la ponto, kiu kondukas al la Insulo de l' Kapro. Ni ankoraŭ ne vidas la Falojn, sed ni vidas fee belan amasegon da akvo, kiu ondegante dancas, saltas kaj disŝpruciĝas laŭ mil fantaziaj formoj, sub la arĝenta lumo de la luno, kuregante en nehaltigebla potenco kaj furiozeco malsupren, ĝis punkto, kie neklare vidata pendanta nebulaĵo montras la finan profundegaĵon. Tien fervore ni direktas niajn paŝojn, kaj baldaŭ, gvidate de la kreskanta bruego, alvenas al nigra amasigita grupo, kiu rigardas, rigardas... Estas la fama Prospect Point. Baldaŭ estas loko por ni, kaj tiam ni ankaŭ rigardas, rigardas... Kia vidaĵo! Tiu senĉesa kompakta alflueganta maso da akvo, kiu dum eble tridek mil jaroj tiel same fluadis, faladis glate trans tiu rokego, disŝutote en ŝaŭmo kaj nebulo kaj bruo, en la fundon de tiu abismo... Kelke da paŝoj pluen, oni sin trovas en kompara silento post elstaranta pinto, kaj la rigardo povas ampleksi neklare la plimalproksiman kanadan bordon, la trankvilan akvon tuj sub la Faloj, kaj la potencan arkon de la granda pendoponto, kun la lumoj de

elektraj tramoj trans ĝi rampantaj... Tiel sub la hela bela luno, ni ricevas nian unuan impreson de Niagara...

Lundon matene la Majstro havis la plezuron vidi kelkajn membrojn el sia familio: lia onklino S-ino Nathan Lewis, la kuzino F-ino Helen Lewis, kaj lia kuzo S-ro Jack Zamenhof, kiujn li ne vidis de pli ol dudek jaroj! Estis en la domo de S-ino Lewis, ke okazis tiu fama unua festo pri Esperanto, pri kiu parolas la Majstro en "Esperantaj Prozaĵoj," kiam la junaj gimnazianoj kunkantis pra-Esperante la himnon: "Malamikete de las nacjes..." Kun la aliaj ŝi nun venis por bonvenigi sian nepon kaj lian edzinon, kaj rekonduki ilin kun ŝi al Montrealo, kie la ceteraj familianoj senpacience atendas ilian alvenon. Ĝis lia foriro el Ameriko, la Gemajstroj devas esti iliaj gastoj. Estis la ŝatita privilegio de la skribanto akompani la Doktoron kvazaŭ korpogardisto, por helpi en okazo de atakoj de intervjuistoj, k.t.p.

Kiam la samfamilianoj iom satigis sian reciprokan avidecon aŭdi ĉiujn novaĵojn – kaj oni povas al si prezenti, kiom da rakontindaĵoj amasiĝis dum 28-jara foresto! – ni ekveturis en kaleŝo por viziti la belaĵojn de Niagara.

Bildigi en ilia tuta ĉarmo la mirindaĵojn de tiu fama loko estas neeble; tiom multe la realeco superas ĉian priskribon. Kiu plumo povus esperi

fiksi sur papero la potencegon de l' spektaklo de la Kanada Falego, vidata el Luna Insulo? Kiu vortopentristo povus esperi kapti la milmil saltantajndiĝojn kaj ŝaŭmiĝojn de la Rapidoj en la Granda Gorĝo? Eĉ fotografaĵo plej preciza ne sukcesus sentigi al nevidinto la vastan pulsantan vivantecon de l' tieaj akvofortoj. Nur la memoro fidele konservas la bildon...

Efektive, en tiu tago ni travivis multon. Kvazaŭ kinematografie, diversaj epizodoj ekmoviĝas en mia memoro... Mi vidas la Majstron komike aspektantan en la oleizita vesto kaj kapuĉo, kiun oni al ni surmetis por ke ni povu sen malsekiĝo iri sub la Falego sur la Kanada flanko. Malsupreniro per lifto, kaj jen tra gutetanta koridoro elborita el la roko, ni alvenas al unua elrigardejo malalte lokita, truo el kie oni vidas, ankoraŭ de antaŭe, la faladantan fronton de la akvo. Apude, arke elŝpruciĝas el la roka muro la granda verda flufasko de ia turbinejo. Pluen ĝis dua truo, kun la bruo nun multe pli granda, kaj fine ni staras ĉe la tria kaj lasta truo, kaj rigardas eksteren. Kia spektaklo! Ni estas rekte sub la Falego, kaj vidas ĝian malantaŭan flankon! De ie supre ŝutiĝas kun terura forto la tuta masego de l'akvo, kaj kun bruego disfrakasiĝas kontraŭ la rokoj je kvar metroj de niaj piedoj. La bolegado kaj blovegado de l' aerfluo, kiuj furiozas en tiu kaldrono sub la

falanta arko de l' akvo, estas nepriskribebla. Duonblindigite de l' ĉiuflanken pelegata ŝaŭmaĵo, surdigite de l' muĝego, kun konfuzitaj sentoj oni staras, staras sorĉate kaj rigardas...

Post tiu sensimila sperto ni veturas pluen por vidi la Rapidojn. Plua ekstazo antaŭ pluaj mirindaĵoj, kiujn mi ne provos priskribi! Kiel faris jam sendube miloj kaj miloj da turistoj, ni lasas fotografi nin sur la bordo apud la fluego. Foliumante la libron de l' vizitantoj en la fotografista dometo, ni trovas la nomon de Kolonelo Pollen, kiu ĉeestis tiun lokon dum sia propaganda vojaĝo lastan jaron. Ĉe la elirejo de la ŝnurfervojo, per kiu oni reiras la supron de la Gorĝo, mi trovas en la butikoj de memoraĵoj ekzempleron de l' *British Esperantist*. Montriĝis, ke ĝi apartenis al unu el la komizinoj, kiu iom eklernis nian lingvon.

Unu plua impreso pri Niagara, kaj ni devos repreni nian vojon al Montrealo. Oni ne povas viziti Niagaron, ne rimarkante, kiom la homoj ekspluatas la grandan akvofalon. Unu aspekto de tiu ekspluatado tute al mi malplaĉis, la aspekto, kiun ni vidis tuj ĉe nia alveno. Ĉiuflanke, sur la Usona bordo, oni trovas memoraĵejojn, poŝtkartejojn, hotelojn, hotelaĉojn, restoraciojn, manĝejojn, k.t.p., kies evidenta sola celo estas, elpoŝigi kiom eble plej multe da mono al la ekskursistoj, kiuj milope vizitadas la lokon. Tiu

spektaklo de l' homa komercemo, apud tiu mirinda belaĵo de l' Naturo, iel ofendas kaj vundas. La bananŝeloj kaj ŝiritaj ĵurnaloj postlasite de fi-turistoj, en la plej ĉarmaj lokoj, ne helpas kuraci la doloron de l' poeta koro! Stranga miksaĵo, la homo!

Pri la alia aspekto de l' ekspluatado, ve-kriadis kaj denunciis publicistoj en ĉiu parto de l' mondo. Rigardante el Prospect Point al la Kanada flanko, la vizitanto vidas, tie malsupre apud la piedo de l' bordkrutaĵo, malhelan malaltan konstruaĵon el ŝtono. Dekstre, super senzorge ŝutitaj amasoj da rubaĵo, staras la maleleganta trabaro de iaj maŝinaĵoj. Tiu tute nepitoreska afero estas turbinejo, kies elektra forto funkciigas dinamojn kaj lumigas urbojn en radio de du cent mejloj. Pli suden, tri pluaj elektroproduktejoj malornamas la pejzaĝon. Sendube naskiĝos aliaj. Kaj sur la Usona flanko staras la malbela budaro kaj turaro de granda fabrikejo de aluminio, ankaŭ profitante la forton de la Faloj... Nu, persone, mi ne domaĝas tiun ekspluatadon de l' akvo. Estas por mi io alpensiga en la ideo, ke en la homo estas potenco, pli kaj vasta, ol tiu mirinda akvo-fluo, potenco, kiu iam post iam malkaŝas kaj utiligas ĉiujn sekretojn de l' materialo, la potenco de l' homa spirito. Nur mi bedaŭras, ke la inĝenieroj ne sciis helpigi sin per la Arto, por doni al siaj laborejoj formon pli

bele taŭgan kaj simbolan pri la du grandaj Fortoj, la Homa kaj la Natura, kiuj ilin konstruigis. Kaj ankaŭ iom mi bedaŭras, pensante, ke eble la fina faro de parto el tiu elektra forto estos funkciigi lumanoncon por la "Purpuraj Purigaj Piloloj" de ia ĉarlatano... Sed negrave! Ne ĉiam la homo laboros al banalaj celoj...

Sur la Vojo Kanadon.

Kaj nun, antaŭen al Montrealo!

Tiun urbon ni volis atingi per vojo de Lago Ontario kaj la rivero S. Laŭrenco, multe pli bela ol la veturo per la fervojo. Ni ekiris el Lewiston per la "Kingston," granda vaporŝipo kun triopa vico de ferdekoj laŭ la tipo kutima sur la lagegoj. Ĉar estis la ekskursi sezono, malfacile estis trovi kajutojn – ni pasigos pli ol tridek horoj por trairi la tutan longon de la lago – kaj ni eĉ iom ektimis, ke la "Gemajstroj" devos dormi sur seĝo. Ni baldaŭ jam ne povis distingi la Usonan bordon, kaj efektive oni facile kredus esti sur la oceano. Toronton ni bedaŭrinde ne povis bone traviziti pro manko de tempo. D-ro Mybs, S-ino Tiard, kaj aliaj samideanoj, kiuj alvenis pli frue en la tago kaj reunuiĝis kun ni sur la ŝipo, diris, ke la urbo estas tre vidinda. En Kingston ni devis transiĝi en ŝipon malpli grandan, la "Rapids King," ĉar ĝis ni alvenos en Montreal ni trauros multe da rapidoj. Antaŭ ol atingi la unuan, ni devis trairi la faman Lagon de la

Mil Insuloj. Tre belaj estas la verdaj ombraj bordoj de tiuj ĉarmaj libertempejoj, kaj la elegantaj somerloĝejoj, kiujn multe da riĉuloj konstruigis sur ili.

La traĵo tra la rapidoj estas interesa kaj ekscitanta sperto. Ili estas ses, el kiuj la ĉefaj estas tiuj apud Lachine. La strangaj turniĝoj kaj kirliĝoj de la fluo pli kaj pli multiĝas, ĝis fine, per lertega pilotado kaj dum komuna spiroretenado la ŝipo trairas malsupren inter du proksimaj tavoloj da roko en la denove trankvilan akvon de l' rivero. Ni veturas pluen preter Caughnawaga, la Indiana rezervejo, kiun priskribis tiel interese poste S-ro Claudius Colas en la Londona Klubo, kaj fine, pasinte sub la mirinda Victoria Jubilea Ponto, ni vidas la kamentubaron de l' Montrealaj fabrikejoj, la grenelevatorojn kaj dokojn de l' industria kvartalo, kaj la majestan silueton de Mont Royal en la malantaŭaĵo.

En Montrealo.

Sur la enŝipiĝejo atendis areto da pluaj kuzoj kaj kuzinoj de l' Majstro. Okazis ĝoja familia reunuiĝo, intima sceno en kies feliĉeco mi ankaŭ, estante ano de la "granda rondo familia," partoprenis kun kora kunsento. Oni nin kondukis en la bela familia aŭtomobilo al la Hotelo Windsor, kie ni devis esti dum kelkaj tagoj la gastoj de "kuzo" Louis Zamenhof. Tiun saman vesperon festeneto, kiun

ĉeestis dekdu Zamenhofoj aŭ bo-Zamenhofoj, inaŭguris la alvenon de la Majstro en Montreal.

Kvankam la Doktoro vojaĝis nun por tiel diri nur "private," li devis submeti sin la morgaŭan tagon al intervjuo de redakcio de la *Montreal Daily Star*, en kiu poste aperis pli ol unu kolono [kolumno - Red.] da raporto pri nia afero. La ceteran tempon de sia restado en Montrealo la Gemajstro pasigis tre plezure en veturoj kaj ekskursoj kun sia parencaro. Dum la somero la familio okupas belan kamparan dometon en Beaconsfield, dudek mejlojn for apud la S. Laŭrenco. Du-tri fojojn ni iris tien aŭtomobile, kaj la rapida veturo laŭ la bela bordo de la rivero estis sperto tre plezuriga. La intimaj kunvenoj en la ĉarma villo estis tre agrablaj. Neniam mi vidis familion pli unuecan, pli ame interligitan en ĝiaj anoj. Estis efektive pli ol unu familio: S-ino Nathan Lewis (la onklino), F-ino Helen ŝia filino; siaj aliaj filinoj Stephanie kaj Eŭgenia kun siaj edzoj S-ro Jacobs kaj S-ro Levy; ŝia filo S-ro Felix; kaj ŝiaj nepoj S-roj Jack kaj Louis Zamenhof. Krom tiuj estis ankoraŭ S-eto Reginald kaj S-ino Natalio, la infanoj de S-ino Jacobs, kaj fine la infaneto de S-ino Levy. Estis amuze kaj plezure por la Majstro aŭdi la bravajn ekprovojn, kiujn faris liaj belaj kuzinoj por paroli Esperante. Ili promesis bone ĝin ellerni ĝis la Antverpena Kongreso, kiun ili esperas ĉeesti ope. Eĉ la knabĉjo Reginald volis saluteti Esperante sian onklon, kaj

faris specialan verdan standardeton por flirtigi ĉe nia alveno. Tiel, per babilado kaj muzikado – ĉar la kuzinoj bele kantis kaj estis rava plezuro aŭdi ilin, Polinojn, ludi la muzikon de Chopin – la kelkaj tagoj rapide pasis. Sed ĉio devas iam ĉesi – atendas la Majstron liaj profesiaj devoj en Varsovio – kaj ian vesperon la familio staras en la Grand Trunk Stacidomo en Montreal, antaŭ la vagonaro kiu portos la amatajn "ge-kuzojn" al Novjorko, por enŝipiĝi Eŭropon, al la malnova hejmo trans la maro en Varsovio... Kun ama zorgo ili rezervis al la Gemajstroj specialan saloneton, kie ili povos komforte dormi dum la tutnokta vojaĝo. Kortuŝate ili ĉirkaŭprenas kaj kisas ĉiun parencon, staras ankoraŭ mallongan tempon sur la ŝtupo; sonorilo sonas, ankoraŭ kelkajn momentojn ni vidas la karan amindan personeton de la Doktoro kapsignanta adiaŭon... kaj jen ili estas for. Kun sento preskaŭ nostalgia de persona perdo kaj manko, mi forlasas la stacidomon. Longe mi memoros tiun scenon, kaj la ĉarmajn tagojn, kiujn mi travivis ĉe la gastama Zamenhofa familio en Montreal.

Mia longa rakonto estas nun preskaŭ finita. Unu

pluan semajnon mi pasigas en Kanado, ĉe mia onklo en St. Lambert, kaj tiam, kun S-ro Warden el Edinburgo enŝipiĝas sur la "Laurentic" por Anglujo. Post rapida kaj agrabla vojaĝo ni alvenas en Liverpool.

Epilogo.

Nu, mi vidis Amerikon, vidis la Amerikajn samideanojn. Mi revenas certa, ke nia movado tie baldaŭ tre potence antaŭeniras, kaj mi tiun

certecon havas, ĉar mi persone konatiĝis kun la fervoreco kaj sindonemeco de la samideanoj, kiuj faros kaj partoprenos en tiu antaŭenirado, kaj plue ĉar mi scias, ke malgraŭ la komercema spirito de multaj Usonanoj, Usono estas ankaŭ lando, kie bele floras jam multe da tiaj idealaj movadoj, kiaj la Esperantismo. Al la multaj novaj amikoj, kiujn mi faris dum mia vojaĝo, mi sendas trans la maro vivan memorigan saluton, kaj korajn bondezirojn por plena

sukceso de ilia klopodado. Ĝis revido en Antverpeno!



Garry Evans, prov-ludante S-ron Mann, antaŭ la UK

William W Mann, decembro 1910

Kanada Esperanto-Asocio

La estraranoj de KEA dum 2020–2021:

- Prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
- Vic-prezidanto: Paul Hopkins — Sooke BK
- Kasisto: Raymond Brisebois — Londono ON
- Sekretario : Bob Williamson — Halifakso NS
- Redaktoro: Ĵenja Amis — Montrealo QC
- Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
- Estrarano: Garry Evans — Montrealo QC
- Estrarano: Elizabeth Holden – Otavo ON
- Estrarano: Trefleo Mercier – Ŝerbruko QC

Adreso:

110 Grand Ave. 414, London, Ontario, N6C 1L8,
Kanado

Retejo: <https://esperanto.ca/>

Facebook: [facebook.com/
KanadaEsperantoAsocio](https://facebook.com/KanadaEsperantoAsocio)

YouTube: [youtube.com/channel/
UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng](https://youtube.com/channel/UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng)

Lumo

Redaktoro: Ĵenja Amis. **Provlegistoj kaj helpantoj:**
Bob Williamson, Francisko Lorrain.

Renkontiĝoj en Kanado

Montrealo kaj Kebekio: la dua kaj la lasta vendredo de la monato, 18:00, Résto Vego (foje okazas ankaŭ virtualaj kunvenoj, kontrolu rete)

Viktoria Kafejo de Esperanta Kulturo: ĉiŝabate, 10:00

Halifaksa Videkunveno: dimanĉe, 11:00

Toronta Konversacio por Komencantoj: dimanĉe, 13:00

Alberta Kunvenu! marde, 19:00

Otavo Konversacia rondo tutmonda: la lasta ĵaŭdo monate, 19:00

Londono, Ontario: sabate je la 14-a horo

Vizitu Eventan Servon por ĉiuj detaloj!

<https://eventaservo.org/>

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi : www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.